ADA CSISZÁR

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY

EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO

Unua volumo

BUDAPEST 1998

Ada CSISZÁR

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY
EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO

PRI LA VIVO KAJ PLENA VERKARO
DE
D-RO KÁLMÁN KALOCSAY

Unua volumo

Budapest, 1998

Copyright © Budapest, 1998. Ada CSISZÁR

Respondeca eldonanto: Ada CSISZÁR
KAL-ĈI Dokumentaro, Budapest, 1998

Kálmán Kalocsay

(1891-1976)

Enkonduka rimarko

Laŭ la Horaca postulo "nonum prematur in annum" t.e. la verko kuŝu naŭ jarojn antaŭ publikigo. Dume oni povas ĝin brosi, eĉ se ne paroli pri tio, ke post tiom da tempo la aŭtoro povas rigardi sian kreaĵon malpli patrinokule, pli objektive.

OMAĜE AL K. KALOCSAY dormis pli ol naŭ jarojn en la tirkesto, estas jam tempo, ke ĝi venu sunlumon.

Ĉe la finredakto – pro la granda amplekso – ŝajnis oportune aperigi la materialon po partoj. Tion ebligas ĝia laŭtema aranĝo, ĉar ĉiu tereno de la multflanka agado de Kalocsay taŭgas kiel memstara libreto. La strukturo de OMAĜE... estas sama, kiel tiu de plejparte hungarlingva memorlibro: IN MEMORIAM DR KALOCSAY KÁLMÁN (1994).

Tiun ĉi libreton – la unuan en la vico – baldaŭ sekvos tri pluaj, kies enhavon oni legas en la Skiza enhavtabelo. Pensante pri novaj esperantistoj, en la Indekso de temoj troviĝas iom da informoj pri la verkoj de Kalocsay menciitaj ĉi-libre.

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY estas verko kiel eble plej detala pri la unika personeco kaj multflanka agado de la elstara kultivanto de la Esperanta kulturo. Ĝia riĉa enhavo konpensos sian modestan eksteraĵon.

D-ro Árpád MÁTHÉ

ANTAŬPAROLO
Al la unua volumo

Tiu ĉi libro celas – krom la omaĝo al d-ro Kálmán Kalocsay – ke la riĉa spirita heredaĵo de nia klasikulo fariĝu komuna trezoro de la esperantistaro.

La libro enhavas plurcent indikojn de la giganta verkaro de Kalocsay. Liaj artikoloj estas listigitaj laŭ temoj, poemoj kaj tradukoj laŭ titoloj. La kunmeton riĉigas mozaikoj el la movado, kiuj pli malpli apartenas jam al la historio de Esperanto. Apud la centra figuro de Kalocsay, en la fono aperas – eĉ se kelkfoje ombre – pluaj rolantoj: parencoj, kolegoj, eminentaj kaj malpli konataj esperantistoj vivantaj en la epoko de Kalocsay.

Klasifiki tiun verkon – laŭ literatura genro – ne estus konvena, ĉar ĝi enhavas materialojn plej diversajn: bio-bibliografiajn indikojn, erojn el la verkoj de Kalocsay, eseojn, rememorojn, intervjuojn, anekdotojn, leterfragmentojn, fotojn, poemojn, citaĵojn, ktp.

La aspekton kaj la personecon de Kalocsay bone prezentas pli ol ducent fotoj kaj rememoroj de samtempuloj, kiuj havis bonŝancon renkontiĝi, kunlabori kaj esceptokaze amikiĝi kun tiu geniulo. La personeco kaj la agado de Kalocsay estis tiel multflanka, ke mi dediĉis al ĉiu "faceto" apartan ĉapitron, ene subĉapitron eĉ subsekcion. Tiu ĉi aranĝo faciligas orientiĝon al personoj, kiuj deziras ĝin studi. La temojn ĝenerale kompletigas bibliografio. Ekzemple ĉe libro-konigo estas listigitaj recenzoj kaj en subsekcio referencoj al la verko.

Laŭteme estas listigitaj verkoj de Kalocsay, kiuj aperis en revuoj disŝutite. Sen registro multaj el ili dronus en la maron de literoj, aliaj restus por ĉiam perdiĝintaj, ĉar ili kaŝiĝas sub *nekonataj plumnomoj, litersignoj eĉ anonime.* La libro fermas ankaŭ tiun breĉon. Kaj kio estas same grava: laŭ tiuj listoj oni povas facile redakti pluajn Kalocsay-librojn.

Ĉe la redaktado mi klopodis kiel eble plej registri ĉiujn publikaĵojn PRI Kalocsay, tamen jam en la komenco mi devis rezigni pri la senmanka listigo. En la gazetoj certe kuŝas artikoloj, kiuj venis nek al miaj manoj, nek al tiuj de Kalocsay.

Mi ne hezitis – el raraj, malaperintaj revuoj – kelkfoje represigi fragmentojn el artikoloj de eminentaj aŭtoroj, se tiuj bonvenis al iu temo. Ankaŭ tiuj pecoj multe helpos interesiĝantojn iom pli funde studi ian laboron aŭ ideon de Kalocsay.

La aplikata dekuma sistemo de kvar subdividoj estas simpla kaj klara:

la unua cifero indikas ĉapitron (ekzemple 5 Ĉapitro 5);
la dua cifero montras subĉapitron (5.12);
la tria cifero rilatas al sekcio de ĉapitro (5.12.1);
la kvara cifero indikas subsekcion (5.12.1.0).

Tiu ĉi sistemo ebligas precizajn referencojn de unu parto al la alia. Tio estas des pli grava, ĉar pluraj aferoj estas traktitaj aŭ menciitaj en diversaj lokoj en ie pli detale ol en aliaj.Tiel oni facile trovos ĉion rilaton al la temo, kaj oni povas kompletigi iun ajn informon. En la subsekcioj (referencoj) estas listigitaj verkoj, kiuj mallonge aŭ pretere okupiĝantaj pri la koncerna temo, entenas tamen rimarkindan penson, opinion.

Dum la laboro mi klopodis trarigardi la itineron *El Abaújszántó ĝis la Esperanta Parnaso.* Eminentaj verkistoj, amikoj kaj respektantoj de Kalocsay helpis min en tio.

Mi esperas, ke la legantoj akceptos tiun ĉi libron tiel ame, kiel ĝin kolektis, verkis kaj redaktis la kontribuantoj.

Budapest, 1998

Ada CSISZÁR

ĈAPITRO 1

1.1. LA DEVENO DE KÁLMÁN KALOCSAY

Dum la jaroj de la dua mondmilito, kiam la influo de la Hitlera naciismo atingis Hungarion, la ŝtatanoj estis listigitaj ankaŭ laŭ deveno: kristano aŭ judo. La antisemita reĝimo forigis el la gvidantaj postenoj tiujn, kiuj ne povis pruvi sian kristanan devenon inkluzive ĝis la geavoj.

Kalocsay same devis kolekti atestilojn des pli, ĉar en lia laborloko (*Hospitalo Szent László)* kelkaj el liaj kontraŭuloj - kiu ne havas enviajn kolegojn? - flustris, ke la ĉefkuracisto estas "suspektinda persono": esperantisto. La movado pikis iliajn okulojn, ĉar tiu "kamuflas danĝerajn bolŝevistojn".
Kalocsay fine posedis multe pli da dokumentoj ol estis postulita. Supozeble dum la kolektado kaptis lin la pasio de genealogo por esplori la originon de la pragepatroj, ekkoni la historion de lia familio. La naskiĝ- kaj edziĝdokumentoj ebligis la starigon de genealogia tabulo. Post zorga esplorado la dokumentoj liveras ankaŭ interesajn indikojn pri la familio. Nome ili montras la nacian devenon de la prauloj; kaj - kiu scias - eble ankaŭ la sangmiksiĝo influis favore la generon de la talenta ido, Kálmán Kalocsay.
El la genealogia kunmetaĵo oni povas konstati, ke ĉe la patrobranĉo okazis nomŝanĝiĝo. József *Kalusztovszky* (Kalustovski), la praavo de nia Kolomano, surmetis la familian nomon de la patrino: *Kalocsay.* Konkludante el diversaj familiaj dokumentoj, la nomhungarigo okazis probable en la 1830-aj jaroj.
Pri la patrina branĉo de Kálmán troviĝas vere historia atestilo. Rudolfo la Dua (imperiestro de la Romia Imperio de Aŭstrio kaj Hungario, inter 1572 kaj 1608) donis nobelan titolon al la familio *Panda* kun la nobelnomo: Bönyi. Böny estas vilaĝo en la nordokcidenta parto de Hungario, kie troviĝas la bieno de la familio.
La skribaĵo de la pli ol kvarcentjara pergameno jam multloke tute forviŝiĝis, aliloke ĝi estas apenaŭ legebla. Feliĉe Vince *Panda* (avo de Kálmán) en 1887 farigis ekstrakton pri la valora dokumento por konservi, almenaŭ parte, la tekston al la *Panda*-idaro.
La restaŭrita ruĝa-blua-orkolora blazono ankoraŭ gardas la iaman brilon kaj la grifo - kun glavo en la ungegoj - memorigas al formortinta gento, al la *Panda*-familio.



La nobeliga dokumento (1580)

Blazono de la familio *Panda*



Ekstrakto de nobeliga dokumento



La genealogia tabuleto de Kálmán Kalocsay
Kunmetis Gyula Csiszár



La nacia deveno de Kálmán Kalocsay

1.2. LA INFANAJ JAROJ -DUONORFE

1891.10.06. En malgranda Nord-Hungarlanda vilaĝo Abaújszántó naskiĝis knabeto. La patrino Jolán Panda estis 24-jara, la patro d-ro Kálmán Kalocsay 31-jara, kiam alvenis la etulo. La feliĉaj gepatroj eĉ ne konjektis, ke la vojo de filo el Abaújszántó kondukos al la Esperanto-Parnaso. La infano estis tute sama kiel la ordinaraj novnaskitoj. Eble lia tre oblongforma kapo ŝajnis iom stranga al gekonatoj neinfluataj de patrina amo. Nenia signo anoncis al la familio, ke la etulo fariĝos fiereco de la naskoloko, fame konata kaj honora eĉ trans la landlimoj.
Pro la frua morto de Jolán Panda (ŝi mortis en 1893 pro meningito) la knabeto ne havis gefratojn. La ununura filo per la baptado ricevis la antaŭnomojn: Kálmán Vince.
Pri la fruaj infanaj jaroj de Kalocsay kaj pri la etoso de la gepatra hejmo apenaŭ estas indikoj. Eĉ la loko de lia naskiĝdomo estas nekonata. Parencoj, proksimuloj, atestantoj de tiu tempo jam de longe ne vivas. Kalocsay ne skribis memuaron kaj li en sia alta aĝo ne apartenis al tiuj olduloj, kiuj nostalgie priploras la forpasintajn jarojn. Tre malofte li menciis ian infanaĝan memoron. Li opiniis, ke *nur tiu parolas ĉiam pri la pasinto, kiu en la nuno jam ne kapablas aĝi.*
- Mi pensas pri la pentraĵo de Rippl-Rónai: "Kiam oni vivas jam el rememoroj" - diris li foje.
Vane estis ĉiu instigo por verki aŭtobiografion. Li eksplikis sian ĉi-rilatan opinion ankaŭ en la poemo: *Letero al Julio Baghy* verkita en 1936 okaze de la 25-jara jubileo de ilia esperantistiĝo:

...
Nun estus mia vico, kion fari?
Ĉu zorge kaj pedante do prepari
aŭtobiografion? Ĝena tasko:
skribi sub pli-malpli sincera masko
pri l' tragedio aŭ pri l' komedio
de mia viv' , - Mi petas la publikon:
ĝi serĉu en la Enciklopedio
ĉiun eksteran daton kaj indikon;
almeti ion estus malfacile:
mi vivis al normala hom' simile.

...
Hm, hm, anstataŭ montri min aŭdace
mi emas kuntiriĝi erinace...
(AD p. 13-14)

Se la esperantistaro iam bezonas Kalocsay-biografion - li diris - nu post mia morto verku ĝin la posteuloj.
Do ni devas nun kontentiĝi per indikoj ĉerpitaj el la postlasitaj paperoj.
En la korespondaĵo de Kalocsay troviĝas letero de N. Hohlov (datita en 1923). Li intencis verki studon pri Kalocsay. Tiucele li sendis demandaron por akiri informojn. La demandon pri la familio Kalocsay respondis jene:
"Mia patro estis juristo, kiu en siaj junaj jaroj verkis kelkajn poemojn kaj novelojn. Kelkaj el ili estis aperintaj en gazetoj. Li estis violonisto aŭtodidakte, kaj li faris kelkajn kantojn. Mian patrinon mi ne konis. Ŝi mortis en mia dua jaro. Oni rakontas

pri ŝi, ke ŝi estis pasia versamanto kaj sciis parkere multajn poemojn de Petöfi. Mi havis duonpatrinon: ŝi ne estis malbona edukpatrino, sed la varmon de patrina amo ŝi ne povis al mi doni. Tiun ĉi mi trovis ĉe mia patrina avino, kiu loĝis en Budapeŝto, kaj kiun mi adoris. Ĉe ŝi mi pasigis miajn somerajn libertempojn..."
Vere, la avino Katalin Dörnhöfer klopodis, ke la "kompatinda orfo" ne restu sen amo. Ŝi iom troigis la dorlotadon de Kálmán. La amo estis reciproka. Tion pruvas ankaŭ poemeto (nedatita), per kiu li salutis la avinon:

Nomfesta gratulo
En ĉi festo bela, granda
plenigas nin plena am'
amo ĉiam pli floranta
kaj ĉesonta neniam.
Kronu ni do amoplene
Blankan kapon de avin'
kaj diskriu mi solene
tra la landoj, tra la lim'
longe vivu ŝi en ĝojo
kies tag' la nuna dato,
kara avino, benato.
(Elhungarigis Márton Fejes)

Dum la infanaj jaroj kaj ankaŭ poste Kálmán tre amis alian Panda-familianon, onklon Vince, kiu dimanĉe zorgis pri la "edukado" kaj amuzo de Kálmán. La edukado havis ĉefe religian karakteron: t.e. vizitado en la kalvina preĝejo, ĉar onklo Vince apartenis al tiu eklezio. Kálmán estis romkatolika kaj li akompanis kelkfoje onklinojn - Irma kaj Gizela - al katolikaj mesoj. Kiel li rakontis, ambaŭ religiaj ceremonioj ege enuigis lin. Tamen la dimanĉaj antaŭtagmezoj estis tre agrablaj - ĉefe kun la onklo - ĉar en la programo estis ankaŭ promenado kaj ili vizitis bierejon kaj sukeraĵejon. La parenca amo kaj amikeco inter Kálmán kaj onklo Vince daŭris ĝis la morto de la onklo en 1931. La nomon Vince Panda (nomo ankaŭ de la avo) Kalocsay foje uzis plumnome. La onklo ne forgesis pri "Kalĉi" (karesnomo de Kálmán) en sia testamento. Kaj la kuzo dum jardekoj prizorgis la tombon de Vince.
Post la morto de Jolán Panda, la familio transloĝiĝis en la urbon Gyula, kie la patro okupis gravan postenon kiel tribunala juĝisto. Kálmán en tiu urbo frekventis la unuan klason de la elementa lernejo. Li daŭrigis la lernadon en Miskolc, kien la patro estis translokita en 1897.
La patro de Kálmán en 1895 edziĝis al la 17-jara Margit Benyó. El tiu ĉi geedzeco naskiĝis du infanoj: Margit kaj László. La gefratoj restis por Kálmán nur "duongefratoj", ĉar la patro - eĉ en sia testamento - favoris la infanojn de Margit Benyó.
La patro pensiiĝis en la dudekaj jaroj eĉ tiam vivoforta viro. Li havis bonan sanon ankaŭ en sia olda aĝo, krome, ke li tiam estis preskaŭ surda. Li vivis 92 jarojn, mortis en 1952.

EL LA FAMILIA ALBUMO



La patro (31-jara)

La patrino (22-jara)

KIVONAT

anyakönyvéből

Jelen kivonat hitelességét nevem aláírásával
a pleb. egyház pecsétével hivatalosan bizonyítom.

La naskiĝdokumento de
Kálmán Vince Kalocsay

Kálmán (ok-monata)

Dörnhöfer Katalin
la karega avino

La du-jara Kálmán
kun la avino

Kálmán (tri-jara)

La ok-jara Kálmán

Vince Panda
la amata onklo

Kálmán (14-jara)
kun la onklinoj
Irma kaj Gizella Panda

ĈAPITRO 2

LA GIMNAZIANO

2.1. PRI LA LERNEJA KAMARADO KAJ AMIKO

Miajn gimnaziajn studojn mi komencis en Igló, daŭrigis en Rimaszombat kaj finis en Miskolc, kien mia fervojista patro estis translokita. Post du tiaj gimnazioj, en kiuj veraj, la infanan animon ekkoni klopodantaj profesoroj kaj amikoj - samlernejanoj formis mian medion, kie do mi fartis bone, redaktis gazeton, rolis, estis favorata de miaj profesoroj, mi alvenis en gimnazion, kie surprize frida indiferento akceptis min flanke de profesoroj, flanke de samklasanoj de la sesa, ĉar mi estis kaj restis en iliaj okuloj "nova knabo". Kiam mi la unuan fojon pasis en la lernoĉambron, kie jam sur ĉiu benko sidis du infanoj, mi devis stari antaŭ iliaj benkoj, kiel almozulo inter ironiaj rigardoj de la knaboj, ĝis... min kompatis la alia "nova knabo", Kálmán Kalocsay, kiu pasintjare devis enpaŝi en la kalvinan gimnazion el la katolika, ĉar ĉi lasta havis nur la unuajn kvar klasojn. Kalocsay do akceptis min kiel trian sur sia benko.

Tiel komenciĝis nia amikeco en septembro de 1906, kaj pasis sennube, sen eĉ kolereto ĝis la forpaso de Kálmán. Baldaŭ malkaŝiĝis la identeco de niaj opinioj, vidmanieroj, sopiroj al la kulturo, muziko, literaturo kaj pri la hungara politiko jam en la 7-a, 8-a gimnaziaj jaroj. Kálmán vivis en pli bonaj vivcirkonstancoj ol mi. Lia patro, bonega juristo de tribunalo ebligis por li aboni la literaturan revuon *Nyugat* (Okcidento), la poemvolumojn de eminentaj poetoj Ady, Babits, ktp. Mi ricevis ilin de Kálmán ne nur por legi, sed ankaŭ por priparoli, taksadi la legaĵojn. Kálmán klarigis al mi la esprimojn, por mi nekompreneblajn vortojn, parolturnojn, pensojn de la nova hungara poezio.

Ĉiu klasika verko de la mondliteraturo interesis nin. La germanajn poemojn, kiujn ni devis lerni parkere, Kolomano jam en la sepa klaso klopodis arttraduki hungaren en la sama versformo kaj mezuro kaj ĉiam pli lerte, kio ĝojigis nin.

Inter niaj profesoroj - domaĝe - troviĝis nur du-tri, kiujn ni - la ĉiam restintaj "novaj knaboj" - povis estimi, eĉ ami, sed eĉ ili ne rimarkis la eksterordinarajn kapablojn de Kalocsay. Ne ĉiu lernobjekto interesis lin, kaj laŭ siaj atestiloj li ne estis eminenta lernanto, ĉar - laŭ mia konvinko - li ne volis esti tia. Li ne ŝatis la trigonometrion, sed kiel artifikon eklernis la dedukton, solvometodon de malfacilega ekzemplo, kaj li povis la dedukton returne, komence de la solvo parkere reciti, kio estis rimarkinda plenumaĵo.

Kalocsay estis belvestita junulo kun interesa, iomete demona vizaĝo. En la junaĝo li multe suferis pro tio, precipe de iom pli aĝaj knabinetoj. Pli malfrue li plaĉis ankaŭ al ili. Niaj samklasanoj ne ekkonis kaj ne aprecis tiam lian valoron. Mi mem rememoras, kiel foje savis Kolomano la tutan klason de la konstanta parkera lernado de 15-20 versoj el la *Iliado*. La profesoro de la greka lingvo punis nin per tio. Sed Kolomano seninterrompe deklamis ĝis la fino de la instruhoro versojn el la epopeo por pruvi, ke tio ne estas puno. La profesoro kolerege atentis la tekston por kapti Kolomanon ĉe eraro, sed li ne sukcesis.

Ĉi tiu profesoro vizitis miajn gepatrojn por peti ilin, ke ili malpermesu mian amikadon kun Kolomano, ĉar li havas por mi nefavoran influon. Tio okazis ankoraŭ en nia komuna studjaro. Sed kiam miaj gepatroj ekkonis mian amikon, ili ekamis lin, precipe mia patrino, kiu traktis lin - kiam ŝi sciiĝis, ke Kolomano estas duonorfo - kiel sian filon.

Mi ĉiam portis ĉiujn librojn en la lernejon, mia amiko nur la necesajn paĝojn en sia poŝo. Mi tre enviis lin pro tio, sed mi ne povis decidi min por sekvi lin en tio.

Dum miaj gimnaziaj jaroj mi nenion sciis pri Esperanto. Verŝajne ankaŭ Kolomano ne. Miaj pensoj krom la literaturo turniĝis pri ekster- kaj enlandaj politikaj cirkonstancoj. Dum elekto de parlamentanoj indigne ni sciiĝis, ke por ŝtatoficistoj kaj servistoj estis devige voĉdoni por kabinetpartia kandidato, ke dum la publika voĉdonado estas kutima afero la korupto, akiro de voĉoj per mono.

Multe ni parolis pri nia estonta profesio. Skrupulo ne troviĝis ĉe ni. Mi prepariĝis de miaj infanjaroj esti juĝisto, imaginte tiun profesion la plej nobla kaj sendependa. Kolomano ege malŝatis la jursciencon, kaj kvankam lia patro estis juĝisto, li mem kiel kuracisto volis helpi al la homaro. Kaj li fariĝis studento de la medicino en Budapest, mi iris en la urbon *Kassa* (Koŝice) en la juran akademion en 1909.

Nia disiĝo daŭris nur unu jaron. La ideoj, deziroj supre menciitaj pliprofundiĝis en la menso de mia malfacile malhavita amiko, kiel mi povis konvinkiĝi pri tio en 1910, kiam ankaŭ mi fariĝis universitatano en la ĉefurbo. La militmalamo kaŭzita pro la Balkanaj militoj formis en ni mondpacdeziron kaj ni fariĝis entuziasmaj legantoj de la libro de Bertha Suttner: FOR LA BATALILOJN! (aperinta ankaŭ en Esperanto). Ankaŭ tiu ĉi sento proksimigis nin al Esperanto! Kiam? En kiu jaro? En du gravaj eldonaĵoj ARĜENTA DUOPO (1937) kaj ORA DUOPO (1966) estas falsa dato: 1911. Kiam mi foje demandis Kolomanon, kial li ne reĝustigas tiun eraron, li konfesis ke li jam forgesis la ĝustan daton: 1912. Mi bone rememoras pri tiu dato, ĉar la somero de 1912 estis lasta okazo kaj ebleco, kiam mi povis pasigi kelkajn semajnojn en mia naskiĝloko kun mia karmemora avino, kiu baldaŭ forpasis. Kaj tiam mi trovis en la mansardo de la ava domo Esperanto-lernolibron de Á. Barabás. Tiu estis propraĵo de mia onklo, tiutempe loĝanta jam en Pécs kaj poste, en la dudekaj jaroj li estis kunaranĝanto de la *Landa Esperanto-Kongreso* en Pécs. El tiu ĉi libro, kiu estas eĉ nun en mia posedo, mi eklernis Esperanton. En aŭgusto aŭ septembro de 1912, kiam en la montra fenestro de la librejo Ferenczi, en la Miskolca strato Széchenyi, mi ekvidis lernolibron de Esperanto. Laŭ mia plej bona memoro mi atentigis Kolomanon pri ĝi kaj li tuj aĉetis ĝin, kies titolon - bedaŭrinde - mi forgesis. Ĉu ni parolis antaŭe pri Esperanto aŭ ne, mi ne scias. Sed kiam ni komencis lerni, tute kaptis nin ankaŭ la bela idealo (ĉu erara aŭ ne) de Zamenhof, ke la komuna internacia lingvo, la interkompreno de la nacioj povus malhelpi la militon.

Aparte ni lernis kaj el aparta libro. Mi ja konis la akran, rapidan percepton, lernokapablon de mia amiko. Ni priparolis nur la problemojn, kiuj apenaŭ troviĝis, kaj la belecon, esprimkapablon de la lingvo. Kaj tuj ni komencis ŝanĝi leterojn kaj ilustritajn kartojn kun multaj eksterlandanoj.

La lernometodo de Kolomano estis pli ĝusta kaj pli konsekvenca ol la mia. En lia poŝo ĉiam troviĝis Ĉefeĉ-vortaro aŭ alia esperantaĵo kaj ĉiujn siajn liberajn minutojn li uzis por ellerni la lingvon. Ni aĉetis Esperanto-librojn el la librovendejo Kókai, abonis gazetojn kaj ni aliĝis al UEA.

Dum tiu tempo okazis la malkaŝo, ke mia amiko verkas ne nur esperantajn poemojn, sed ankaŭ hungarajn.

Por fortigi niajn tiamajn sciojn en Esperanto, ni volis gvidi kursojn dum la somero de 1913 en Miskolc. Por certigi la sukceson, ni volis inviti al malfermo de la kurso la prezidanton de *Hungarlanda Esperanto-Societo,* la progreseman politikiston, papan prelaton, d-ron Aleksandro Giesswein. Ni ambaŭ vizitis lin en la palaco de "Sankta Stefano-Asocio" en la strato Szentkirályi. Giesswein konsentis, sed menciis, ke li volas paroli en konvena ejo kaj antaŭ multnombra publiko. Mia aŭdaca respondo estis, ke li ricevos por sia prelegado la grandan salonon de la urbodomo, lin akceptos la urbestro ĉe la stacidomo kaj la urba ĉevaljungaĵo portos lin al lia loĝejo ktp. Kolomano paliĝadis dum miaj promesoj kaj kiam ni ŝanceliĝante atingis la koridoron, nur tion li diris al mi:
"Kion vi faris, vi malfeliĉulo?!" Tamen plenumiĝis ĉio, nur anstataŭ la urbestro, la vicurbestro atendis D-ron Giesswein ĉe la stacidomo.

La parolado de la prezidanto de HES okazis inter solenaj cirkonstancoj. Poste komenciĝis du senpagaj kursoj nur unumonataj, gviditaj de Kalocsay kaj de mi por pli ol 40 personoj.
Okaze de mia 21-a nomtago (25.08.1913) mi ricevis de mia amiko la sekvan salutpoemon, el kiu oni jam povas konstati la poetajn kapablojn de Kalocsay. Jen:

(P1) *Kara Ludoviko!*
Je l' nomtago via kion mi deziru?:
Vian vivon ĉiam en sunbril' vi iru,
Vin evitu, timu la sort' malfeliĉa!
Poŝ' je mono, kor' je ĝojo estu riĉa!"
Deziritan skuu el la jakmanikoj!
Amu vin, kaj helpu aro da amikoj!
Kaj mildiĝu vent' se blovis sovaĝe,
Ĝi karesu milde, mole vin vizaĝe,
Alportinte famon pri knabinoj floraj
Pleniginte vian koron per odoroj.
Kion diri? Estu por vi donata
Kion vi deziras al la plej amata.
Al la plej amata de vi en la mondo.
Kaj nun... kio estus fino de la kanto?
Vivu, kresku, floru nia Esperanto,
Fluu tra la tero kiel vasta ondo.
Amike K.

Mi asertas, ke la unua - ankaŭ en Miskolc la unua - Esperanto-kurso plifortigis la scion, la literaturan certecon de Kalocsay. Jam en 1914 mi aŭdis de li, ke estonte li okupiĝos pri verkado de Esperanto-poemoj. Lia genio tiam ekirigis lin sur la vojo de la mondfama Esperanto-poeto.

D-ro Ludoviko GYÖRY-NAGY
(Miskolc, 1976)

2.2. STUDENTO ĈE LA JARCENTŜANĜO

Pri la etoso de la gimnazio en Miskolc kaj pri la gimnaziano Kálmán Kalocsay rakontas ankaŭ alia samklasano Ferenc Gombos, kiu sub verkista nomo Pál Simándy en sia libro: DIÁK A SZÁZADFORDULÓN (Studento ĉe la jarcentŝanĝo) rememoras jene:

"Nova jarcento aŭroras. 1891. Ni, kiuj naskiĝis en ĉi tiu jaro, estas infanoj kaj edukitoj de tiu epoko, kiu signas gravajn ĉapitrojn en la historio de la eŭropa kulturo... Tamen por la infanoj de tiu epoko - almenaŭ en nia gimnazio - la alproprigo de tiu ĉi kulturo ne okazis glate. Nia instruado donis al la profesoroj gravajn zorgojn. La nekontentigan rezulton - krom la individua kulpo de la lernantoj - kaŭzis la malĝusta pedagogia sistemo de kelkaj profesoroj. Inter ili troviĝis ekzemple pedagogo, kiu kutimis mokofendi la knabojn. Ĉi tiu sinteno kompreneble akcelis la infanan obstinon...

Inter la profesoroj la plej ŝatata estis József Budai pro la humana sinteno. Li estis progresema homo, kiu ne nur instruis, sed ankaŭ edukis nin, multe vastiginte nian mondkonceptan horizonton. Konstante li instigis la studentojn al logika pensado. Dum la studhoroj li estis ĉiam serena, li anekdotis, rakontis pri propraj aferoj: pri rezultoj kaj fiaskoj, kiuj trafis lin kiel pomologon..."

Vere, kelkfoje ankaŭ Kalocsay menciis favore la nomon de József Budai, kiu glorigis kaj ofte citis revoluciajn versojn de S. Petöfi, versojn de tiu poeto, kies famon kaj poemojn poste Kalocsay disvastigis pere de Esperanto.

"...Mi havas kelkajn samklasanojn - rakontis plu Pál Simándy - kun kiuj mi havas bonajn rilatojn. Ekzemple hejmenirante el la lernejo mi kutimis aliĝi al Kálmán Kalocsay (kiu poste fariĝis mondfama esperantisto). Vere nin kunligas nur la komuna vojo sur kiu ni ĉiutage iris hejmen. (1) Intima amikeco ne plektiĝis inter ni. Kalocsay estas saĝa, erudicia knabo, kiu havas ankaŭ poetan talenton. Li jam verkis - kaj montris al mi - kelkajn lertajn poemetojn. Helpe de Kálmán mi ekkonis multajn verkojn de la mondliteraturo, ekzemple la aforismojn de O. Wilde. Kálmán ne nur pruntedonas al mi librojn, sed li tre klare ankaŭ klarigas la esencon de tiuj verkoj. Ĉio ĉi estus sufiĉa bazo por amikiĝo, sed mia retiriĝema karaktero kaj manko de memfido malhelpas min sincere malkovri antaŭ li mian taŭzitan internan vivon. Li estas "menshomo", min forte ligas la sentoj. Krome: Kálmán estas intelektulo, li kunportis la kulturitecon el la gepatra hejmo. Mi ĉiam pli kaj pli perceptas, ke mia instruiteco estas tre mankhava, apenaŭ iom pli ol kion la lernejo donas. Kálmán estas nobelido, kiu bone konas la regulojn kaj kutimojn de konduto en elita societo. Tiu ĉi fakto pli malpliigas mian memfidon..."

---

(1) Kalocsay loĝis en la strato József Kun, n-ro 72, post nomŝanĝiĝo strato Lajos Szabó, nuntempe strato Kis-Hunyad.

2.2.1. *Dokumentoj pri la gimnaziano*

La arkivo de la gimnazio en Miskolc gardas jarlibron de la lernojaro 1907/08, informante nin pri la rezultoj de la studjaro. El la libro oni sciiĝas, ke en la gimnazio, sub la gvidado de profesoro pri literaturo kaj hungara lingvo, d-ro Zoltán Kosztolányi funkciis *Literatura Rondo Kazinczy(2),* kies membro estis ankaŭ Kalocsay. La *Rondo* aranĝis deklamkonkurson, en kiu partoprenis Kalocsay. Li deklamis gajan poemon kaj gajnis "Laŭdon".

--

(2) Ferenc Kazinczy estis fama hungara lingvonovigulo komence de la 19-a jarcento.

--

Inter la familiaj dokumentoj troviĝas abiturienta diplomo de Kálmán kies notojn estas interese observi.


GIMNÁZIUMI
ÉRETTSÉGI BIZONYITVÁNY.

Konduto	2
Hungara lingvo	3
Latina lingvo kaj literaturo	2
Historio	3
Matematiko	3
Fiziko	3
Religio	2
Greka lingvo kaj literaturo	2
Germana lingvo kaj literaturo	2
Filozofio	1
Geografio	2
Biontologio	3
Geometrio	3

Oni devas rimarkigi, ke la tiutempaj notoj estis aliaj ol la nunaj. La cifero 1 reprezentis eminentecon, la 4 signis nekontentigan scion kaj la lernanto devis fari postekzamenon aŭ ripeti la jaron. Foje ankaŭ Kalocsay postekzameniĝis pri la greka lingvo.

Miskolc: Kalvina gimnazio, kie studis Kálmán Kalocsay
Foto 1977

Abiturientoj en 1909
x Kálmán Kalocsay
xx Ferenc Gombos/Pál Simándy
xxx Lajos Györi-Nagy

La abiturienta diplomo estas jam en la poŝo.

ĈAPITRO 3

LA MEDICINISTO

3.1. MEDICINA STUDENTO EN SOLDATA UNIFORMO

Kalocsay en 1909 komencis medicinajn studojn en la *Budapeŝta Universitato Péter Pázmány.* Li transloĝiĝis en la ĉefurbon kaj ricevis hejmon ĉe la parenca familio Panda. Onklo Vince kaj la onklinoj Irma kaj Gizella amis lin kiel filon. De tiu tempo Kálmán pasigis nur mallongajn tempojn en la patra domo en Miskolc.

Pri la universitata studento Kalocsay apenaŭ estas dokumentoj. Laŭ la "curriculum vitae" li fariĝis ano de *Galilei Kör (Rondo Galilei)* en 1913. En tiu ĉi rondo grupiĝis universitatanoj - ĉefe medicinaj kaj pedagogiaj studentoj - por disvastigi progresemajn ideojn. Ili propagandis kontraŭ la militismo.

El tiuj jaroj datumiĝas hungarlingvaj poemoj de Kalocsay, sed tiuj ampoemoj malkaŝas nenion interesan pri la junulo.

En 1914 eksplodis la mondmilito. Ankaŭ la medicina studento Kalocsay devis soldatiĝi, sed li ne rezignis pri sia celo: akiri diplomon pri medicino. Post mallonga ekzercado li estis komandita al la batalejo. Li servis kiel suboficiro poste subleŭtenanto en sanitara tereno, dume li daŭrigis la medicinajn studojn.

Jam en tiu tempo montriĝis lia neĉiutaga laborkapablo kaj multflankeco. Kvankam en la gimnazio li ne estis eminentulo, tamen lia talento ebligis plenumi la soldatan servon kaj samtempe prepariĝi al ekzamenoj. Li havis energion okupiĝi pri Esperanto, studi Idon, germanan vortaron kaj verki poemojn.

La kanonara bruo apenaŭ ĝenis Kolomanon en lernado. Laŭ lia rakonto por alkutimiĝi al kanonpafado, antaŭ soldatiĝo li ekzercis siajn orelojn. Anstataŭ silentaj bibliotekoj li vizitadis amuzejojn kun laŭta muziko kaj devigis sin lerni en bruaĉo. Tio sukcesis eĉ iom tro. Liaj oreloj ankaŭ poste - dum legado aŭ verkado - pretendis muzikon, kiun liveris per pleja voĉforto la radio kaj televizio. La familion ne ĝojigis ĉi tiu kutimo de Kálmán.

Sed ni revenu al la batalkampo, kie li pasigis 20 monatojn. Dum la *Konsilantara Respubliko* (1919) li servis kiel kuracisto en bataliono apud la rivero *Tibisko.* Entute li plenumis soldatan servon dum tri jaroj.

Lia medicina diplomo datumiĝas la 26-an de majo 1916.

En soldata uniformo

Kun la ŝatata Rigó (Merlo)

Leŭtenanto kun soldatkamaradoj

La soldatkuracisto

3.2. LA PANAKIRA PROFESIO

Lia kariero en medicino

"Post la falo de la *Konsilantara Respubliko* en 1919 - skribas Kalocsay en sia "curriculum vitae" - mi estis sen posteno, ĉar la nova reĝimo konsideris la "ruĝajn soldatojn" kiel kulpulojn, eĉ se tiuj agadis kiel kuracistoj. Fine en majo de 1920 mi trovis laborlokon en la *Hospitalo Szent László.* Mi komencis praktiki mian profesion kiel helpkuracisto tagsalajra..."

Kvankam la medicina studento Kalocsay revis pri kirurgio, tamen la cirkonstancoj devigis lin en alian sferon de la medicino. La *Hospitalo Szent László* servis por infektaj malsanuloj, ne tro alloga laborloko de ambiciuloj. Tamen la juna kuracisto laboris konscience kaj diligente.

Laŭ la hospitalaj atestiloj en oktobro 1921 Kalocsay rangaltiĝis. Oni nomumis lin hospitala subkuracisto. Li komencis studi la infektajn malsanojn. La superuloj estis kontentaj pri lia agado kaj promociis lin adjunkto. La dokumento pri la honoriga posteno datiĝas la 1-an de marto 1926. De tiu tempo Kalocsay havis eblon intense okupiĝi pri sciencaj laboroj. Li studis ĉefe la difterion kaj skarlatinon. Por fabrikado de medikamentoj li faris eksperimentojn pri seroterapio de skarlatino, li aplikis la homan kaj ĉevalan serumojn.

Baldaŭ li akiris vastan renomon kiel fakverkisto kaj specialisto pri infektaj malsanoj. Lia estro, d-ro Zsigmond Gerlóczy, direktoro de la hospitalo (kaj ankaŭ parlamentano) volonte apogis la talentan mediciniston.

La jaro 1929 portis novan sukceson al Kalocsay. Oni promociis lin ĉefkuracisto en la sekcio por internaj malsanoj de la hospitalo. En la sama jaro li akiris diplomon: privata docento en la medicina fakultato de *Scienca Universitato Péter Pázmány.* Li disertis pri *Diagnostiko de la infektaj malsanoj.*

Kalocsay jam kiel adjunkto partoprenis en la instruado de helpkuracistoj kaj studentoj pri medicino. Liaj prelegoj estis tiel interesaj, ke la kolegoj volonte vizitis la studhorojn. En la *Universitato* en 1943-1946 li lekciis studobjekton (libervole elekteblan) pri la epidemiaj malsanoj. Kalocsay edukis centojn da medicinistoj, infektologoj.

Pri lia medicinista kariero oni legas en la menciita membiografio:

"Post la fino de la dua mondmilito en 1945 - dum la rekonstruo de la militdetruita hospitalo - kiel komisiita direktoro mi gvidis la malsanulejon. Poste mi laboris kiel ĉefkuracisto. En tiu tempo mi okupiĝis ĉefe pri brucelozo, disenterio kaj abdomena tifo, kiuj post la milito epidemie disvastiĝis. Ekde la fondo de la *Rondo de Infektologoj* mi estis ties prezidanto, poste honora prezidanto. Dum kvar jaroj mi estis sekretario, dum du jaroj vicprezidanto de la *Hospitala Medicinista Societo* . En 1952 mi iĝis kandidato kaj en 1968 "Doktoro de la medicina Scienco". La 1-an de septembro 1963 mi ricevis la nominacion: "Titolita universitata profesoro". En la jaro 1961 - ĝis mia pensiiĝo - mi agadis kiel ano de la *Landa Ekzamena Komisiono de Fakmedicinista Instruado.* Mi estis kunfondinto de la *Societo Korányi (3).* Mi laboris entute 46 jarojn en la sama laborloko. Mi pensiiĝis la 10-an de novembro 1966."

---

(3) La societo estis fondita en 1961 por honori la faman mediciniston Sándor Korányi (1866-1944)

--

Kalocsay ricevis altgradajn ŝtatajn distingojn pro siaj meritoj en la medicina laboro:

Eminenta kuracisto (1952)
Ordeno de la laboro (1961)
Ora grado de la Ordeno de la Laboro (1966)

Kalocsay ne praktikis private kaj li ne akceptis por sia laboro "dankpagon" (similan al trinkmono). Li ne volis riĉiĝi el homaj suferoj.

La gravaj postenoj, kiujn li plenumis, la altaj distingoj, kiujn li ricevis ne ŝanĝis la modestan sintenon de Kalocsay. Li restis ĉiam afabla, helpema kuracisto, kiu savis de la morto multajn homojn. Ankaŭ lia amikaro - J. Baghy, la geedzoj Kökény, L. Tárkony - plurfoje ricevis kuracadon de Kalocsay. Paĉjon (Julio Baghy) dum multaj jaroj turmentis kronika malsano de la spiraj organoj. Kelkfoje li pasigis semajnojn en la *Hospitalo Szent László,* kie liaj doloroj kvietiĝis.

Kalocsay ĉiam helpeme donis konsilon kaj konsolon al ĉiuj, kiuj bezonis tion. jen fragmento el lia letero adresita al T. Pumpr la 19-an de februaro 1968:

"Tre Kara Tomas!

Kun granda kompato mi legis el via letero la sinsekvajn plagojn, kiuj vin trafis. Kun multa espero mi deziras, ke la lasta frakturo estus vere la lasta kaj saniĝu senspure. Se oni ĝin bone vinktis, ne restos deformiĝo; kompreneble, oni bezonos kelktempan kuracgimnastikon por venki la estiĝintan rigidecon kaj reakiri la mobilecon de la koksartiko. Bonvolu tre atenti ĝis tiam, ĉar mallerto kaŭzita de rigideco facile okazigas fal-akcidenton..."

La medicinistoj esperantistaj ĝenerale klopodas ankaŭ sur siaj fakterenoj utiligi la internacian lingvon; ili korespondas pri medicinaj problemoj, interŝanĝas spertojn, aperigas fakartikolojn ktp. Kvankam TEKA dum la 15-a UK en Nürnberg elektis doktoron Kalocsay sekretario, li apenaŭ povis okupiĝi pri aplikado de Esperanto en medicina tereno. Ofte li plendis pri la longdaŭra hospitala deĵorado. La hungarlingva medicina fakverkisto Kalocsay, la Esperanto-poeto, lingvisto kaj redaktoro foruzis ĉiun liberan tempon, sekve la kuracisto Kalocsay ne povis kultivi Esperanton en la medicina tereno.

Foje la cirkonstancoj malhelpis lin roli antaŭ medicinistoj esperantistoj. Laŭ la informo de MIR (Vol. 2, n-ro 2) dum la 51-a UK en Budapeŝto, la *Sekcio de Kuracistoj de UMEA* la 3-an de aŭgusto organizis programojn. La raportisto skribas:

"Posttagmeze en la kulturdomo de la *Centra Domo de Sindikato de Kuracistoj kaj Sanitaraj Laboristoj* estis kunveno en kies kadro prof. d-ro Kolomano Kalocsay projektis fari prelegon pri la plano de aperigo de nova medicina revuo. Prof. Kalocsay ne alvenis pro malsano kaj la partoprenintojn salutis la anstataŭanto kaj li priparolis la projekton eldoni medicinan revuon en Eŭropo krom MIR."

Malgraŭ tio, ke Kalocsay ne aplikis Esperanton en medicina medio, sporadaj indikoj pruvas, ke ankaŭ medicinistoj estis fieraj pri lia nomo.

Je la iniciato de ĉefkuracisto d-ro I. Ferenczy (prezidanto de UMEA) en 1968 estis fondita la *Medicina Fakgrupo de HEA.* Post unu jaro en la *Hospitalo Szent László* fondiĝis la *Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo,* kies historion d-ro L. Molnár (sekretario de la fakgrupo) publikigis en la periodaĵo *Sciencaj Komunikaĵoj 1976*. Laŭ la informo la fondkunveno elektis d-ron Kalocsay honora prezidanto de la fakgrupo.

Kadre de la *Hungara Medicinhistoria Societo* en 1975 estis aranĝita la *Landa Konferenco de Hungaraj Medicinistoj-Verkistoj.* D-ro I. Ferenczy prelegis pri la Esperanto-literaturo kaj parolis detale pri la medicina agado de Kalocsay. Je la propono de la *Fakgrupo,* la konferenco elektis d-ron Kalocsay honora membro de la *Rondo de Hungaraj Medicinistoj-Verkistoj.*



Jen la medicina diplomo de Colomannus Vincentius Kalocsay, Budapest 1916. Majo 26.



La adjunkto Kalocsay 1928

La ĉefkuracisto

La infektologo



La titolita universitata profesoro

3.3. MOZAIKOJ (Rememoroj pri la kuracisto)

3.3.1. *El la arkivo de Hospitalo Szent László*

En 1928 la hospitala direktoro skribis atestilon pri la medicina agado de Kalocsay. Jen:

"D-ro Kálmán Kalocsay estas konscienca, multflanka kaj tre diligenta kunlaboranto. Oni ĉiam povas kalkuli je lia laborkapablo kaj eltrovemo. Krom tio, ke li plenumas ĉiam perfekte la kuracistan laboron, li ankaŭ esploras la akutajn infektajn malsanojn, riĉigas la fakliteraturon per valoraj studoj. Li bone utiligas sian grandan fakscion, partoprenas en la instruado de helpkuracistoj kaj medicinstudentoj.

Per la efiko de lia kleriga laboro kaj persona ekzemplodona sinteno, tia etoso estiĝis en la laborloko, kiu honorigas nian hospitalon, samtempe konvinke atestas la homajn valorojn de d-ro Kálmán Kalocsay."

D-ro Zsigmond Gerlóczy

x

3.3.2. *Mia kuracisto*

Mi ne parolas pri la poeto, genio de nia poezio, mi ne parolas pri la lingvisto, Kolumba malkovranto de la leĝoj de nia lingvo, mi ne parolas pri la redaktoro, akravida, feliĉmana malkovranto de literaturaj valoroj de junaj talentoj, mi ne parolas pri la amiko en literaturo kaj en la ideomondo, mi nur povas ripeti ĉi tie la dediĉajn versojn de mia versvolumo: (4)

Vi, Kalocsay, puŝis mian plumon,
al vi mi dankdediĉas ĉi volumon,
kiel la Tero siajn fruktojn donas
dankante maturigan Sunolumon.

Mi ne parolas pri la homo, pri lia multflanka, esenckomprena intelekto, pri lia sprita, neelĉerpebla interesveka konversacio, pri la tenerkora familiano, pri la malavara gastiganto, mi ne parolas pri la universitata profesoro, akademiano, pri la hospitala ĉefkuracisto: sed permesu, ke nun mi diru kelkajn dankvortojn al mia kuracisto.

Jes, dum kvar jardekoj vi, Kalocsay ne ĉesis priatenti mian ofte nestabilan sanstaton, vi ĉiam pretis per ĝusta diagnozo, per bona konsilo, per efika medikamento. Kaj kiam ofte, se mia sano serioze endanĝeriĝis, mi trovis min en via hospitalo kaj trovis en ĝi, dank' al via amika prizorgo kaj kuracista scio, la sanon, la vivon! Plurfoje vi savis al mi la vivon, dankon por ĝi!

Lajos TÁRKONY (1976)

(4) Soifo, 1964

3.3.3. *Dankletero de patrino*

Altestimata Sinjoro Profesoro!
Mi sciiĝis el la gazeto pri via alta distingo. (5) Kiam mi sincere gratulas vin, mi kaptas la okazon eldiri: dum dudek tri jaroj ĉiutage mi pensas pri vi kun dankoplena koro.

En 1948 mi devis veturigi mian filon - tiam sepjaran - en la *Hospitalo Szent László.* Li estis grave malsana. En la hospitalo oni ne akceptis lin volonte pro la diagnozo: morbilo kaj pulmoembolio. La deĵoranta kuracisto diris la verdikton: "Nesavebla!"

Mi ne volas nun denove revoki la patrinan animdoloron, kiun mi travivis... La sekvan tagon, vi sinjoro profesoro, esploris la infanon kaj diris la unuajn konsolajn vortojn: "Ne perdu la esperon!" Tiuj vortoj donis al mi forton dum du semajnoj, kiam vi luktis por la vivo de mia filo.

Sinjoro profesoro! Mia danksento dum la pasintaj jardekoj ĉiam pliiĝis, ĉar mi nun konscias vere, kiom mi estus perdinta. Milfoje mi dankas al vi, ke mia filo vivas!

Estimata profesoro! Mi tutkore deziras, ke via plua vivo kaj laborado estu benata de Dio!

La 13-an de oktobro 1971.

D-ro Jánosné ZÉTÉNYI

(5) Ordeno de Laboro, ora grado

x

3.3.4. *Miaj memoroj pri la kuracisto Kalocsay*

Kalocsay mortis... Hodiaŭ min korbatis la ĵurnala komunikaĵo: Kalocsay mortis. La funebra sciigo revokas miajn rememorojn...

Antaŭ kvindek jaroj mi estis oficisto en la *Hospitalo Szent László,* kie en tiu tempo Kalocsay laboris kiel helpkuracisto. Mia ĉambro estis apud la lia. La personaro de la hospitalo - kune kun mi - tre amis lin. Foje okazis, ke iu ĉefo de la sanitaraj organizoj vizitis nian laborlokon kaj pretere diris: "El inter la kvin helpkuracistoj oni elektas adjunkton. Kiun vi opinias por tiu ĉi posteno la plej konvena?" - Ni ĥore respondis: "La orkoran homon", - ĉar ni nomis tiel d-ron Kalocsay inter ni. Kaj vere Kalocsay fariĝis adjunkto, ĉar ankaŭ la hospitala direktoro opiniis same pri Kálmán, kvankam en la propono por nomumo li notis: "En la sinteno de d-ro Kalocsay estas iom riproĉebla, nome ke li vizitas klubojn, kie oni instruas Esperanton al la laboristoj."

Ĝuste en tiu tempo aperis la brile tradukita LA TRAGEDIO DE L' HOMO de I. Madách. Ankaŭ mi lernis Esperanton je la instigo de Kalocsay. Ĉiam mi rememoras kun amo kaj dankemo pri la "orkora homo", kiu konigis al mi la ideon de internacia lingvo. Esperanto donis al mi multan ĝojon en mia vivo. Nuntempe mi atingis 83 jarojn kaj mi estas loĝanto de azilo por maljunuloj. Kiel mi konsoliĝu?
1976.02.28.

Béla GARAMVÖLGYI

x

3.3.5. *Kalocsay, mia iama kolego*

Kun la eminenta scienculo kaj medicina profesoro mi konatiĝis en la *Hospitalo Szent László,* en 1928. Kalocsay estis tiam adjunkto apud la ĉefkuracisto-direktoro Zsigmond Gerlóczy. Mi laboris kiel helpkuracisto kaj dum du jaroj mi estis kunlaboranto de Kálmán. Ĉiutage ni vidis unu la alian.

Oni ne povis ne rimarki lian inteligentecon, multflankan personecon elstaran inter la tiama kuracistaro. Kalocsay estis ĉiam la eksperimentulo, inventemulo, spirite gvidanta karaktero en la hospitalo. Li vivis kune kun ni en la medicinista komunumo, sed - kiel virta homo - neniam li partoprenis en la kutimaj intrigoj de la kolegoj.

Kelkfoje li parolis pri Esperanto, rekomendis al la kolegoj lerni la internacian lingvon. Pro tio unuaj priridetis, aliaj taksis lin utopiisto. Do tre malofte li diris kelkajn Esperantajn frazojn. Ĉu li citis proprajn poemojn, ĉu versojn de aliaj? Tion ni ne sciis, tamen oni ĝenerale respektis lian literaturan erudicion. Ofte li citis versojn de hungaraj poetoj: Ady, Babits, Kosztolányi ktp., kies poemojn - pri kio mi post multaj jaroj sciiĝis - tiom brile li tradukis al Esperanto.

Kalocsay en tiu tempo estis 37-jara. Lia alta staturo, longforma kapo, aktoraspekta vizaĝo forte vivas en mia memoro, eĉ en la malproksimo de preskaŭ duonjarcento.

D-ro András KIKINDAI (1977)

3.3.6. *Flava Rozo*

"Flava Rozo" estas titolo de unu el la romanoj de M. Jókai. La heroino de la romano nomiĝas Klára. Mia 83-jara onklino portas same tiun ĉarman baptonomon.

Ĉi-somere mi vizitis onjon Klára kaj ŝi - kiel ĝenerale la maljunulinoj - revokis memorojn de jam longe forpasintaj jaroj. Kun brilantaj okuloj ŝi rakontis pri la jaro 1963, kiam ŝi estis flegata en la *Hospitalo Szent László.*

- Kiel ĉi tiu entuziasmo rememorante pri via grava malsano infekta? - mi demandis.

- Ho, tiu kara profesoro, la idolo de la malsanuloj, la profesoro Kalocsay baptis min "Flava Rozo", ĉar pro iktero mia haŭto estis flavkolora - kaj la nomon Rozo li donacis al mi pro afableco. "Kara Rozinjo Flava - li diris al mi - via malsano estas kvazaŭ krucenigmo, sed mi solvos ĝin." (Cetere mia onklino en la hospitalo ofte amuzis sin per solvo de krucenigmoj).

- Fine - rakontis plu onjo Klara - laŭ la diagnozo de Kalocsay oni min operaciis. Li elektis la plej lertan kirurgon, sian amikon, Károly Mészáros (6). Ĉu "nomen est omen"? Dum la operacio Kalocsay staris apud la operacia tablo. La operacio bone sukcesis. Mi ĉiam estis iom dika kaj ankaŭ post la operacio mi ne malgrasiĝis. Iu doktoro ŝerce diris al mi: "Luktu hom' kaj firme fidu, sed pro Dio, ne grasiĝu!" (7)

- Vidu Klara - respondis anstataŭ mi la kara Kalocsay - tiuj kuracistoj mokas eĉ pri la "Tragedio de l' homo".

Dank' al la zorgema flegado, kiun mi ricevis en la hospitalo kaj precipe de profesoro Kalocsay, mi resaniĝis. Poste mi jam ne renkontis lin. Al mia dankletero li respondis per novjara saluto. Li sendis al mi ĉarman bildkarton ilustritan per flavaj rozoj.

Rakonto de Éva BENICKÁ (Koŝice, 1981)

(6) La nomo Mészáros signifas: buĉisto.
(7) Ŝerca mistordo de la finaj vortoj de la drama poemo de Madách: LA TRAGEDIO DE L' HOMO: "Penu hom' , kaj firme fidu!"

x

3.3.7. *Vekiĝis miaj rememoroj...*

Legante artikolon pri Kálmán Kalocsay aperintan en la 5-a numero de la revuo *Világ és nyelv* (Mondo kaj Lingvo) iom post iom reviviĝas la tempoj, kiam mi laboris kun d-ro Kalocsay. Mi estis asistantino en la *Hospitalo Szent László.*

La foto farita en la PEN-Klubo, kiam Kalocsay transprenas la *Oran Medalon,* jam nekonatan vizaĝon montras al mi. Jes ja intertempe forflugis jardekoj.

Kia homo estis Kalocsay, mia iama superulo? Li ne malestimis la simplajn homojn, la ordinarulojn. Lia personeco postulanta aŭtoritaton neniun fortimigis, volonte li respondis al la demandoj al li metitaj.

En la hospitalo, se neniu estis en lia proksimo, ofte li laŭte pensadis, kio vidiĝis, ĉar liaj lipoj moviĝetis. La salutojn li ne ĉiam reciprokis. Neniu sciis de kiuj pensoj li estis okupita. Oni ofte vidis lin iri ne sur la trotuaro, sed sur la ŝoseo en la silentaj, tiutempe malpli trafikviglaj stratoj. Kelkaj asertis, ke Kalocsay laŭte recitis poemojn, ankaŭ esperantajn kaj li tial evitis la preterpasantojn.

Post la bombado en 1944, kiam parto de la hospitalo detruiĝis, mi laboris en alia hospitalo, sed miaj memoroj pri Kalocsay eĉ hodiaŭ tre vigle vivas en mi.

Lajosné KOVÁCS (1981)

3.3.8. *D-ro Kálmán Kalocsay, la homo*

Mi deziras revoki el la paseo tiun trajton de lia homa sinteno, kiun mi ekkonis kiel juna medicina studento.

Dum la somero de 1939, kiam miaj universitataj kolegoj post sukcesaj ekzamenoj senzorge libertempis, mi ordigis publikan bibliotekon por perlabori la lernokotizon al la dua jaro en la medicina fakultato. Post unumonata laboro, pro alta febro, turmenta kapdoloro, en senkonscia stato oni enportis min en la *Hospitalo Szent László.* La diagnozo estis: meningito.

En teretaĝa aparta ĉambro de la nova barak-hospitalo mi rekonsciiĝis. Ĉe mia lito staris la ĉefkuracisto Kálmán Kalocsay ridetante kun kuraĝiga rigardo. Kune kun li estis la ĉefflegistino Elvira. Tiel okazis la ĉiutagaj vizitoj escepte dimanĉon, dum estis mi en la hospitalo.

Stariĝis la demando: kio estis la nekutima en la sinteno de la ĉefkuracisto? Antaŭ ĉio, ke mi, la nekonata, la nepaganta malsanulo ricevis apartan ĉambron, kio tiam, sed ankaŭ hodiaŭ estas la rajto de la "privilegiuloj" (aŭ malofte tiu de la agoniantoj). La amikeca rigardo, la kuraĝigaj vortoj ne nur tiam, sed eĉ nun estas direktataj al pacientoj, kiuj pagas altan honorarion aŭ okupas altan ŝtupon en la socio. La nekutima sinteno de Kálmán Kalocsay ĝojigis min, sed restis por mi enigmo: kial penadis helpi la bonfama ĉefkuracisto kun speciala atento kaj zorgo al la juna, sensignifa medicina studento?

La enigmo solviĝis nuntempe, kiam mi konatiĝis kun lia biografio. Mi eksciis, ke li estis la plej renoma esperantisto en nia patrio, eĉ tutmonde, samtempe li estis konata kiel eminenta scienculo, medicinisto, redoninto de la sano al multaj homoj.

Homo devenanta el meza klaso de la socio fariĝis protektanto de simplaj homoj, tia homo el nura idealismo certe estas ankaŭ humanisto. Hodiaŭ mi ne dubas, ke la humanismo instigis lin helpi min, kiam li kun kuraĝiga rideto staris apud mia lito.

Estus bone, se ankaŭ nuntempe laborus multe da tiaj kuracistoj en la hospitaloj. Ĉi tiu humanismo devenanta el idealismo eĉ tiam sanigas en certaj okazoj, se la antibiotikoj kaj multaj modernaj medikamentoj malefikas.

D-ro Ádám SZENDEI
adjunkto, kandidato de medicinaj sciencoj (1983)

3.3.9. *La morto estis pli forta...*

En 1962 mia filino Marika estis 22-jara. Ŝi malsaniĝis. La distrikta kuracisto metis diagnozon: salmonelozo kaj oni devas tuj enhospitaligi ŝin.

En la *Hospitalo Szent László* post kelkaj tagoj la kuracisto de la sekcio konstatis, ke mia filino havas leŭkemion. "Ĉi tiu malsano - li diris - en la nuna stato de medicino estas nevenkebla kaj mortiga."

Malespere mi turnis min al la ĉefkuracisto, al d-ro Kálmán Kalocsay. Li tuj promesis al mi ĉiun helpon. Li kontrolis la diagnozon kaj klopodis min trankviligi. Eĉ post la laborfino li okupiĝis pri mia filino. Por savi ŝin Kalocsay faris ĉion, kion kuracisto povas fari. Plurfoje li priparolis kun mi en sia privata konsultejo la eventualajn farotaĵojn.

Bedaŭrinde ĉiu lia penado estis senrezulta. Mia kara Marika mortis en 1963.

Rememorante pri la tempo pasigita en la *Hospitalo Szent László,* la homeco, prizorgado, helpopreteco de Kalocsay ankoraŭ hodiaŭ revokas en mi dankon, sed la Morto estis pli forta...

Kálmán BAKOS (elhungarigis: Bérci DARÁZS)

x

3.3.10. *La "nekonata konato"*

La filon de "Paĉjo" (Julio Baghy) foje oni kuracis kontraŭ difterio en la *Hospitalo Szent László.* Iun tagon la ĉefkuracisto Kalocsay vizitis la malsanulojn. En la ĉambro de infanoj li ĉirkaŭrigardis kaj hezite ekparolis:

- *Mi serĉas iun, sed: kiun mi serĉas?*
- *Vi serĉas min, oĉjo kuracisto* - anoncis sin la knabeto Baghy.
- *Ho, jes, jes* - respondis Kalocsay kun ekbrilantaj okuloj - *vere mi serĉas vin. Sed diru: kiu vi estas?*

- *Kiu mi estas???* - respondis mire kaj indigne la eta paciento - *mi estas la filo de "Paĉjo", krome via baptofilo kara onklo Kálmán!*

(Laŭ rakonto de la filo de Paĉjo)

3.3.11. Medicinista preskribo

Kiam inter la pacientoj de Kalocsay ne troviĝis grava malsanulo, lian menson tuj absorbis Esperanto.

Foje okazis, ke ĝuste apud la lito de iu flegato koncipiĝis en lia kapo la ĝis tiam vane serĉita solvo al iu tradukaĵo, sed mankis ĉemane notpapero. Kion fari? Li uzis tiucele la diagnozan tabulon.

Poste la dumnoktaj deĵorantoj rompis al si la kapon: kiajn instrukciojn donis la ĉefkuracisto? Medicinistoj, flegistinoj klopodis deĉifri la "hieroglifon". Ĉiu provado fiaskis.

Post la tritaga semajnofino la ĉefkuracisto aperis en la hospitalo. La teamo tremete konfesis sian "analfabetecon".

Mil diabloj! - kriis surprizite Kalocsay - *de tri tagoj ĉie mi serĉas vane tiujn notojn!*

Ĝi estis du versoj el la traduko de la INFERO de Dante.

3.4. MEDICINA FAKLITERATURA BIBLIOGRAFIO DE D-RO KÁLMÁN KALOCSAY

Terapio per Omnadin ĉe gravaj formoj de akutaj malsanoj
OH 1925

Pri la valoro de serumo kontraŭ disenterio
OH 1926

Kelkaj eksperimentoj per morbilo-vakcino pretigita laŭ metodo de Caronia
OH 1926

Spertoj per la Dick-testo
OH 1927

La terapio de skarlatino per homa serumo
OH 1927

La nuntempa stato de skarlatino
BOU 1927

Terapiaj rezultoj per serumo en gravaj kaj malignaj kazoj de difterio
OH 1928

38 referaĵoj el la temoj de la infektaj malsanoj, imunologio kaj epidemiologio
BOU 1927-1929

Epidemiologiaj esploroj en la lastaj jaroj
OH 1932

La terapio de la virusdevena pneŭmonio per sublimatsalvarsano
BOU 1932

La profilaktiko kaj terapio de la tetano
OH 1934

Megalerytema infectiosum
BU 1934

Specifa terapio de skarlatino
BOU 1936

Ĉapitro pri la "Infektaj Malsanoj" en la duvoluma faklibro: BELGYÓGYÁSZAT TANKÖNYVE (Lernolibro pri interna medicino), 1935

Malattie infettive. Ĉapitro en la libro: MENUALE DI MEDICINA INTERNA
Milano, 1938

Specifa seruma terapio en akutaj infektaj malsanoj
KOÉ 1940

La simptomaro de la infektaj malsanoj. En la libro:
ISKOLAORVOSOK KÉZIKÖNYVE (Manlibro de la lernejaj kuracistoj),
1941

Seromalsano kaj ĝia terapio
OH 1941

Diagnostiko de la infektaj malsanoj. Ĉapitro en la duvoluma faklibro KLINIKAI DIAGNOSTIKA
1942

Manifestiĝo de la gripo
OH 1951

AKUTAJ INFEKTAJ MALSANOJ. Universitata Lernolibro
Budapest, 1952

Manifestiĝo de la morbo Bang
OH 1954

Emil Behring - savinto de junaj vivoj
Népszava (Popolvoĉo) 1954.03.16.

Batalo de la homo kontraŭ la infekto. En la popularscienca libroserio
Budapest 1954

Prognozo de tetano kaj la valoro de la terapio. Kun István Telegdi
OH 1955

Manifestiĝo de disenterio ĉe plenkreskuloj. En la monografio de DYSENTERIA. Red. Károly Rauss.
Budapest, 1955

Mekanika terapio de la paraliziĝo de spirorganoj, niaj medicinaj instrumentoj
Budapest, 1955

Akutaj infektaj malsanoj. En la libro de Béla Issekutz: GYÓGYITÁS (Kuracado), p. 24-103.
Budapest, 1956

La malsana kaj la sana infano. Redaktado kaj verko de la ĉapitro: "Infektaj malsanoj en la familio"
Budapest, 1957

Terapio de la morbo Bang. Kun Ernö Szanyi, en la volumo: INFORMADO PRI LA AGADO DE HOSPITALO LÁSZLÓ (8), 1959-1960
Budapest, 1961

Moderna terapio de la tetano. Kun László Tóth (en la antaŭa volumo)
Budapest, 1961

---

(8) En la tiama reĝimo la vorto Szent (Sankta) estis forviŝita el la nomo de institutoj, lernejoj, vilaĝoj.

Akutaj infektaj malsanoj. En la serio: BIBLIOTEKO DE PRAKTIKANTA MEDICINISTO
Budapest, 1962

Abdomena tifo en la antibiotika erao. Kun György Bodor kaj Ernö Szanyi. En la volumo: INFORMADO PRI LA AGADO DE LA HOSPITALO LÁSZLÓ 1961-1962.
Budapest, 1963

HISTORIO DE LA HOSPITALO LÁSZLÓ 1894-1946. En tri partoj (En la supre menciitaj volumoj: INFORMADO 1961, 1963, 1965.

Variiĝo de la infektaj malsanoj. En la volumo: INFORMADO PRI LA AGADO DE HOSPITALO LÁSZLÓ 1963-1964.
Budapest, 1965

Artikoloj pri infektaj malsanoj en hungarlingvaj enciklopedioj.

La bibliografiajn notojn esperantigis D-ro Imre FERENCZY

x

Mallongigoj:

OH *Orvosi Hetilap* (Medicina Semajna Gazeto).

BOU *Budapesti Orvosi Újsag* (Budapeŝta Medicina Gazeto)

KOÉ *Közkórházi Orvostársulat Évkönyve* (Jarlibro de Hospitala Medicina Asocio).

ĈAPITRO 4

EN LA FAMILIA VIVO

4.1. LA EDZIĜO

En la vivo de Kalocsay la jaro 1929 estis grava dato. Li edziĝis. Jen kelkaj biografiaj indikoj pri la edzino:

Margit Berta Vangel naskiĝis la 27-an de oktobro 1897 en Budapeŝto. La patro Károly Vangel estis 40-jara, la patrino Paulina Elekes 38-jara, kiam naskiĝis Margit. Post du filoj kaj du filinoj ŝi estis la kvina infano kaj kiel la plej juna inter la gefratoj tre dorlotata en la familio. La gepatroj devenis el nobelaj, bonhavaj familioj. Károly Vangel estis altranga oficisto ĉe ŝtata monopolo pri fabrikado kaj vendado de tabakaĵo, krome kiel financa konsilisto li havis eblon investi utile ankaŭ la propran monon. La familio havis bieneton kaj vilaon en Máriabesnyö. La geknaboj Vangel ricevis bonan edukadon en diversaj en- kaj eksterlandaj edukejoj. Margit akiris pedagogian diplomon kaj dum kelkaj jaroj ŝi laboris kiel sociologo-pedagogo.

Kiam Margit kaj Kálmán interkonatiĝis, Margit estis eksedzino de majoro Ferenc Szelvényi. El tiu edzeco naskiĝis filino Mária. Cetere la familio Vangel estis en parenca rilato kun Zsigmond Gerlóczy, ĉefo de Kalocsay en la *Hospitalo Szent László*. Kalocsay en 1929 estis jam adjunkto kaj bela kariero promesiĝis al li.

Margit kaj Kálmán enamiĝis kaj baldaŭ interfianĉiĝis. Je la instigo de Kálmán, Margit en tiu tempo komencis lerni Esperanton kaj pli funde konatiĝi kun la perloj de la mondliteraturo.

Inter la postlasitaj paperoj de Kálmán grandformata koverto - kun surskribo: "Fianĉaĵoj" - gardas amajn leterojn de Margit. Estas enigmo kial ne troviĝas tiuj de Kálmán! La leteroj de Margit malkaŝas, ke la korespondado ne estis unuflanka. Jen fragmento el la letero de la fianĉino:

"Mia kara! Neeldireble kiel feliĉigis min viaj belegaj leteroj. Hodiaŭ mi faris nenion alian de mateno ĝis vespero, nur mi banis min en viaj varmaj, freŝaj vortoj surpaperigitaj. Mi trinkis viajn vortojn kaj mi ebriiĝis de ili..."

Kie troviĝas tiuj ebriigaj leteroj? Ĉu eble Kálmán neniigis ilin pro prudemo kalkulante pri tio, ke ili iam venos al la manoj fremdaj? Ĉu eble pro tio, ĉar post multaj jaroj, kiam paliĝis la amoro, ne plu validas la vortoj, kiuj tiutempe flugis al la fianĉino? Ĉu eble ili estis neniigitaj, ĉar post jaroj Kálmán tralegis la leterojn kaj li trovis en ili - kiel ofte ankaŭ en literaturaj verkoj - mallertaĵojn eĉ hontindajn "verdaĵojn"? Sed ho, amleterojn - skribitajn kaj senditajn al la amata virino antaŭ multaj jaroj aŭ jardekoj - ne eblas poluri. El tiu tempo restis kelkaj hungarlingvaj ampoemoj, kiujn Kálmán dediĉis al Margit.

La geedziĝa ceremonio okazis la 1-an de junio 1929. Kalocsay kompreneble akceptis la filinon Mária kaj prizorgis ŝiajn bezonojn krom edukado. Jes ja li ne estis laŭsanga patro kaj ĉe li mankis - kiel ofte ĉe orfoj - la familiaj sentoj. Kalocsay ne adoptis la knabinon. Kvankam li ĉiam zorgis pri la familio kaj plenumis "siajn

devojn", tamen li vivis sian propran vivon. Li ofte kaj volonte pasigis ankaŭ sian libertempon en la laborloko, kie li havis komforte aranĝitan ĉambron kaj li povis trankvile labori super Esperantaj verkoj.

Ch. M. Wieland skribis al sia amiko: "Mi petas kaj petegas vin, neniam edziĝu. Scienculo, kiu estas amiko de la Muzoj, ĉiam devas esti libera. Certe ankaŭ mi estus restinta libera, se mi estus povinta regi la cirkonstancojn."

Observinda konsilo. Kalocsay dediĉis sin al Esperanta Muzo. Ĉio alia - krom la medicina profesio - estis por li duaranga afero. Kompreneble, la "amoro al tiu Muzo" ne dikigis la monujon kaj pro tio ofte estis malkonkordo en la familio. Probable ankaŭ la situacio de la edzino ne estis envienda. Kvankam ŝi estis tre religiema, tamen ŝi deziris ankaŭ la surterajn ĝojojn. Ŝi pretendis, eĉ postulis senzorgan, luksan vivon, sed tiun Kalocsay ne povis certigi.

La domo de la familio Vangel en Máriabesnyő, strato Fenyvesi Nagy 76.
Dum multaj jaroj Kalocsay pasigis la somerojn en ĉi tiu komforta vilao.
Foto 1913

Margit Berta Vangel
(1897 - 1982)

La edzino kun la filino

En familia rondo kun la edzino kaj edukfilino, 1936

Mária naskis filinon
en 1945.
Kalocsay kun la nepino
Anna Mária Livia TÜR
Foto 1947.

Jen nova generacio.
Inter la prageavoj:
Enikö Ildikó Julia ÖREG
naskiĝis en 1967

4.2. NENIU ESTAS PROFETO EN SIA FAMILIO

Jen la modifita zamenhofa proverbo koncernas ankaŭ Kolomanon Kalocsay. Kvankam lia edzino dum la fianĉina tempo komencis okupiĝi pri Esperanto, tamen baldaŭ ŝi ĉesigis la lernadon, eĉ nutris ĵaluzon kontraŭ la Esperanto-Muzo, kiu forrabas de ŝi la junan edzon.

En 1964 - kiam evidentiĝis, ke la 51-a UK estos aranĝota en Budapeŝto - ŝajnis bezonata, ke la familianoj de Kalocsay alproprigu Esperanton. Ekde 26-a de septembro 1964 ĝis fino de majo 1965 ĉiusemajne estis Esperanto-leciono en la Nyúl-strata hejmo. En la kurso - kiun mi gvidis - krom la edzino kaj la filino partoprenis du oficistoj de la *Partihistoria Instituto* kaj mia edzino. La instruado okazis en duhoraj kunvenoj. Kálmán foje-foje (tamen malofte) malfermis la pordon de sia ĉambro, staris kelkajn minutojn ĉe la sojlo kaj mi konstatis, ke unu el la plej eminentaj figuroj de Esperanto ĝojas pro tio, ke lia edzino finfine ellernos Esperanton. Foje mi rimarkis ankaŭ larmogutojn en liaj okuloj.

Bedaŭrinde ĉe la edzino kaj ankaŭ ĉe filino mankis persisto (cetere sufiĉe instruitaj virinoj) por alproprigi Esperanton. Jes, ankaŭ la filino - kvankam ŝi partoprenis kelkajn kongresojn - tute izolis sin de la Esperanto-lernado. Tio rilatas ankaŭ al la nepino.

Jen, oni povas veni al la konkludo, ke la supre citita proverbo pravas.

Ĉu eble kulpas la instruanto?

Ludoviko KÖKÉNY

4.3. LOĜANTO DE BUDAPEŜTO

Ankoraŭ staras la domo en la strato József n-ro 4, kie en la dua etaĝo troviĝas la iama loĝejo de la familio Panda. Dum kelkaj jaroj tie loĝis la medicina studento Kalocsay.

Kiam Kalocsay en 1929 edziĝis, la juna paro luis loĝejon en la strato Szentkirály n-ro 3.

En 1930 ili trovis konvenan hejmon en la strato Mária n-ro 34. Pri tiu loĝejo rakontas Ferenc Szilágyi (NLR 1961, n-ro 36, p. 212). Jen:

"... Kiam *Literatura Mondo* refondiĝis estis tute nature, ke la scenejo de niaj diskutoj kaj okazoplenaj redakciaj kunvenoj iĝis la bela kaj plenkultura hejmo de Kalocsay... Ni preskaŭ ĉiuj vivis en griza parto de la urbo. *Literatura Mondo* havis sian administracion en proleta distrikto, la loĝejo de V. Bleier estis samloke... Ankaŭ la redaktoroj estis disŝutitaj en modestajn aŭ rekte proletajn urbopartojn kaj loĝejojn, sed kompreneble Kalocsay havis vastan kaj kulturatmosferan hejmon kun amaso da libroj, bonaj foteloj, parnasa etoso kun meze la plej senpera parnasa ĉefo, kiun oni povas imagi. Mem la kvartalo estis aristokrate silenta, en urboparto, kie universitataj institucioj, granda muzeo kaj kelkaj palacoj, preĝejoj forgesigis la proksimon de la ĉiutagaj zorgoj..."

Tiu ĉi hejmo dum la revolucio (1956) grave difektiĝis kaj la familio devis forlasi ĝin.

La nova hejmo - en la strato Nyúl (kuniklo) numero 4 troviĝis en la plej eleganta urboparto: Buda. la haltejo de la aŭtobuso kaj tramo estis tuj ĉe la angulo de la strato. Do la vizitantoj komforte atingis la domon, kie vivis Kalocsay ĝis sia morto.

En la dua etaĝo numero 7 la kvarĉambra loĝejo estis sufiĉe vasta kaj ŝajne impona, tamen ĝi estis tre malkomforta. En la domo ne estis lifto, kio malhelpis, ke Kalocsay en sia alta aĝo pli ofte foriru el la loĝejo.

La tuta domo portis sur si vundojn kaŭzitajn de la dua mondmilito kaj revolucio. La plafonoj estis ege kadukaj kaj kontraŭ vivdanĝero estis apogitaj per dikaj traboj. La loĝejo ne havis centran hejtadon kaj kontinuan varman akvon.

Malgraŭ tiuj malagrablaĵoj en la hejmo regis ia eleganta etoso. La plej digna ejo estis la laborĉambro de Kalocsay, aranĝita por li plej oportune. Enirante en tiun ĉambron dekstre de la pordo staris divano, kiu servis ne nur por kuŝejo, sed ofte ankaŭ por sidejo de gastoj. Apud la divano en la angulo staris alta kahela forno, pli poste per gashejtado. La tutan dekstran muron okupis la libroŝranko etendiĝanta de la planko ĝis la plafono. Antaŭ ĝi estis lokitaj du elegantaj sed ege malkomfortaj brakseĝoj, inter ili staris tableto. Ĉe la fina parto de la libroŝranko ricevis lokon la radioaparato. La orientan muron okupis la fenestroj, tuj sub ili librobretoj.

Paralele kun la fenestroj staris brakseĝo kaj larĝa impona barokstila skribotablo (9), pri kio diris iu: "Ĝi similas altaron." Antaŭ la skribotablo staris tableto, sur ĝi treege kaduka skribmaŝino (Olympia) kaj seĝo sen apogilo. En la ĉambro de Kalocsay eĉ unu komforta fotelo ne troviĝis, kaj oni nur miras, ke li - dum multaj jaroj grava malsanulo - povis dum longaj horoj sidadi tiel malkomforte. En alia angulo estis vitrita medicina ŝranko, kiu gardis diversajn ilojn medicinajn, medikamentojn ktp. En tiu ĉambroparto staris librobreto sur kiu amasiĝis gazetoj, revuoj. La pordo apud la librobreto kondukis en la ĉambron de la edzino. Ĉe la pordo

---

(9) Nun lokitaj en la Kalocsay-memorĉambro en Abaújszántó.

---

estis seĝo, ĉefe por la novaj, ankoraŭ ne legitaj libroj kaj revuoj. La murojn, kiujn ne kovris libroj, dekoraciis du pentraĵoj: tiuj de la edzino kaj la patrino de Kalocsay.

En tiu ĉi ĉambro Kalocsay estis absolute izolita, kion li bezonis dum la verkado.

Strato József n-ro 4

La pordo de la domo en la strato Mária n-ro 34
Foto 1980

Venu al Kalocsay.
La "sabataj gastoj".
A. Csiszár kun la geedzoj Kökény

Post kelkaj paŝoj oni atingas la n-ron 4.
Burĝa, malnova domo en Buda
x Fenestro de la labor-ĉambro de Kalocsay



En la laborĉambro.
Oleopentraĵo pri la patrino
Jolán Panda.
Foto 1971

Tiun domon vidis Kalocsay
tra la fenestro.

En la proksima bela parko
Városmajor promenadis
Kalocsay, kiam li bonfartis.

4.4. VALORA BIBLIOTEKO

En la laborĉambro de Kalocsay la libroŝranko okupis la tutan dekstran muron kaj etendiĝis ĝis la plafono.

Kalocsay metis la fundamenton de ampleksa biblioteko jam en sia infanaĝo. La kolektaĵo reprezentis ĉiujn specojn de la klasikaj kaj modernaj mondliteraturoj. La diverslingvaj vortaroj, enciklopedioj kaj medicina fakliteraturo okupis vastan lokon sur la bretoj. Lia libroŝranko en 1976 entenis kvin mil librojn.

La Esperanto-parto de la biblioteko ampleksis sescent librojn. Bedaŭrinde dum la revolucio (1956) la loĝejo en la strato Mária grave difektiĝis kaj multaj Esperanto-libroj kaj valoraĵoj neniiĝis.

Kalocsay ne estis librokolektanto en vera senco de la vorto, tamen la plej signifaj verkoj venis al liaj manoj kiel honorekzempleroj. Por librokolektanto 600 libroj ne estas impona nombro, sed ĉi tiu kolektaĵo entenas ne nur la plej gravajn verkojn de la Esperanto-literaturo, sed ankaŭ rarajn librojn, gazetojn el la plej fruaj jaroj kun ruĝkrajonaj marĝenaj notoj de Kalocsay.

Kalocsay ne estis pedanta homo. Ĉi tiun konstaton pravigas ankaŭ lia biblioteko. L. Halka skribis en AD p. 30:

"...Mi konfesu, ke mi, la bibliofilo kun bedaŭro povis nur rigardi tiujn libroŝrankojn. Libroj belegaj, valoraj staras tie grandamase, sed ve, ne en estetika sinsekvo. Ili estas disĵetitaj kvazaŭ oni altuŝus ilin ĉiutage kaj kelkfoje parto el ili kuŝis sur la skribotablo tiel, ke mi devis forŝovi monteton da libroj por vidi Kalocsay-n..."

Vere valoraj libroj kuŝis sur la planko, apud la kahelo, sub la divano, sur la seĝoj. Raraj gazetoj (ekz. *Oficiala Gazeto (1910),* jarkolektoj de *The Esperantist* (1903 - 1905), *Verda Standardo* (1913 - 1914), *Lingvo Internacia* (1907 - 1914) ktp. kunligitaj per ŝnuro ĉifoniĝis amase en la angulo. Tiu malordo ofendis ne nur la okulojn de bibliofilo, sed ankaŭ tiujn de ordema virino, kia mi estas.

Je mia insista peto en 1973 Kalocsay konsentis ordigi la Esperanto-parton de la libraro. En tiu tempo pro sia aĝo kaj malbona sanstato li jam ne povis iri suprenmalsupren sur la ŝtupareto. Do mi entreprenis parton de la laboro. La edzino senpolvigis la librojn. La grupigo de la volumoj - laŭ literatura genro estis tasko de Kálmán, kiu febre sin ĵetis al la laboro. Dum kelkaj horoj en la ĉambro iĝis terura kaoso kaj ni sufokiĝadis en la polvonubo.

Kiu ordigis iam bibliotekon, scias, ke tiu laboro ofte konsumas horojn sen ia rezulto. Jen la kialo: el la profundo de la ŝranko aperas libroj jam de longe forgesitaj. Jen LA TAJDO de N. Hohlov, jen ĈU LI? de Vallienne, jen libro pri la *5-a Esperanto Kongreso* en Barcelono, manuskripto de Lidja Zamenhof ktp. Kaj Kalocsay profundiĝis en la legado. Kiu kuraĝus ĝeni lin? Min plezurigis malnovaj gazetoj, kiujn mi vidis tiam la unuan fojon: *Lingvo Internacia, Bibliografia Gazeto, Lingvo-Libro,* la unuaj numeroj de *Literatura Mondo...* Kaj ni ambaŭ legis ĝis vesperkrepusko. Apenaŭ ni rimarkis, ke forpasis dek tagoj kaj estis ordigitaj la libroj nur sur la du plej supraj bretoj. Finiĝis mia libertempo. La edzino multe riproĉis nin pro la malordo. Kion fari?

Mi konsentis kun Kalocsay por remeti la librojn sen ordigo. Ankaŭ tiu laboro sukcesis nur parte. Por multaj volumoj jam ne restis loko en la ŝranko, ĉar mi ne kapablis tiel kunpremi ilin kiel faris Kalocsay antaŭe. La edzino lamentis. Fine Kolomano solvis la problemon:

- Feliĉe nun estas somero - li diris kun petola rideto kaj metis la restintajn librojn sur la supron de kahelforno.

La Esperanto-parton de la biblioteko Kalocsay heredigis al Ada Csiszár. La ĉifonitaj libroj trabindite (kun ekslibriso) kaj la kunbinditaj jarkolektoj jam komforte etendiĝas sur la librobretoj.

Antaŭ la libroŝranko
Foto el la tridekaj jaroj

Ĉe la nova posedanto
Foto Roma Thorsen 1986



4.4.1. "Amike kaj ame, kore, memore"

"Vorto dirita - al la mondo apartenas kaj neniam revenos". Libro eldonita komencas sian propran vojon. Ĝi naskiĝas por la mondo kaj malaperas poreterne por la aŭtoro. *Habent sua fata libelli.* La libroj havas sian sorton. En bibliotekoj, kolektaĵoj oni malofte scias ion pri la individua sorto de la verkoj.

En bibliotekoj la libroj - eĉ la plej gravaj - fariĝas grizaj soldatoj de la komunumo. Enviciĝas kaj trankvile dormadas foje-foje dum tre longaj tempoj. La sentoj, pensoj troviĝantaj en la verkoj estas komuna trezoro de la homaro sed kiun interesus la individua sorto de unu certa libro.

Eĉ la kolektanto mem nur pri la plej interesaj, kuriozaj, valoraj eroj de sia kolektaĵo povas rememori. Se temas pri privata kolektaĵo. La grandaj publikaj bibliotekoj herediĝas de generacio al generacio. La pasinto, vojo, sorto de unuopaj libroj nerevokeble malaperas. La enskribita nomo, engluita ekslibriso, en pli simplaj kazoj la stampitaj signoj de la posedinto montras, signas parton de la irita vojo.

Inter la lastaj - en nia esperantista medio - estas la plej oftaj la signoj de iamaj kluboj, rondoj, societoj. La dispelitaj orfaj libroj de la ĉesiĝintoj, ĉesigitaj klubaj kaj similaj bibliotekoj plejparte malaperas, perdiĝas. Nur malofte trovas ili denove la vojon al ia kolektaĵo.

Intertempe - laŭ mallaŭdinda kutimo - la posedantoj provas malaperigi la signojn de la posedintoj, per tio oni makuligas aŭ difektas la librojn, neniigante la plej gravajn montrilojn de la historio de la libro.

Certe la plej eleganta kategorio estas inter ĉiuj libroj tiu, kiun la verkisto mem dediĉis al iu. En ilia kazo almenaŭ la subskribinto estas konata. Ne malofte ankaŭ la donacitoj estas konataj eĉ famaj personoj. Do tiamaniere per la dediĉoj oni trovas ekrigardon en rilatojn, kiuj por la publiko kutime estas nevideblaj.

La temo meritus pliprofundigon. La senlimajn kaj por ĉiuj tre interesajn homajn interrilatojn mirinde spegulas la dediĉoj.

La dediĉojn de Kalocsay la donacitoj aŭ ties familianoj ankoraŭ ame kaj estime gardas kiel trezorojn. En mia kolektaĵo inter pli ol cent dediĉoj troviĝas nur kelkaj el la plumo de Kalocsay.

La plej malnova en la JOHANO LA BRAVA dediĉita al P. Balkányi:



Amike-kore
al la kara amiko kaj
vera Nurhom'
Januaro 1923
K. de Kalocsay

JOHANO LA BRAVA dediĉita al d-ro S. Giesswein, tiutempe prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo.



Al sia amata Prezidanto
respektplene sendas ĉi tiun
libron lia ĉiam fidela
Bp. 1.VI.1923.
Dr. Kálmán Kalocsay

Mihály Sárossy, la unua Esperanto-kanzonisto, havis gravan rolon en la Hungarlanda movado. Kiel kantisto kaj gitarludisto li multe helpis la reĝisoran kaj aktoran laboron de Baghy. Sárossy ofte vizitis E-kunvenojn (ankaŭ eksterlande) kaj prezentis neforgeseblajn vesperojn al la publiko. La muzikemo kaj muzikamo de Kalocsay esprimis sian dankon per librodonaco: JOHANO LA BRAVA.



Nia kara
Mihaelo Sárossy
akceptu de mi bonvole
pro la multa plezuro
kiun per siaj kantoj li donis al mia koro
kiel modestan rekompencon
ĉi tiun libreton
al li dediĉitan.

Budapeŝto, la 6-an de julio 1923.
Dr. K. de Kalocsay

LA TRAGEDIO DE L' HOMO estas rajte fiero ne nur por hungaroj, sed por la tuta esperantistaro. Oni eldonis el ĝi 25 lukse binditajn kaj numeritajn ekzemplerojn. Unu el ili - numerita 24 - troviĝas en mia kolektaĵo.



RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN

Al P. Balkányi
Ame kaj amike.
K. Kalocsay

Dediĉo al P. Balkányi en la RENDSZERES ESZPERANTO NYELVTAN (Sistema gramatiko de Esperanto)

ORA DUOPO

Jubilea Libro
pri
JULIO BACHY
kaj
KOLOMANO KALOCSAY

Eldonita en la 75-a naskiĝjaro
de niaj eminentaj verkistoj
okaze de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto

Amike kaj ame
Kore, memore
K. Kalocsay

BUDAPEST, 1966

Nenia indiko pri tio kiu kaj kiam ricevis la libron.

IMRE MADÁCH

LA TRAGEDIO DE L'HOMO

DRAMA POEMO

Al M. Gergely
Kore kaj amike
15/II/966. K. Kalocsay

CORVINA BUDAPEST

Donaco al Mihály Gergely, redaktoro de Hungara Vivo 1969-77

Al amike P. Balkányi
naskiĝdonace (72 jaroj)
Kaj tre kore:
1966-II/16 K. Kalocsay

Dediĉo en LA REĜO LEAR
Naskiĝdonaco al la 72-jara P. Balkányi.



La tradukon de SOMERMEZNOKTA SONĜO de Shakespeare ricevis Vera Nurhom' t.e. P. Balkányi.



Ludoviko Györi-Nagy estis lerneja kamarado de Kalocsay en la gimnazio.

Balkányi jam de sia junaĝo - kiel "verdskolta general'" - fariĝis ĉies "Oĉjo Paŭlo". Tiu ĉi karesa nomo tiel ensorbiĝis en la esperantistaron kaj iĝis tiom konata, ke Kalocsay tiel dediĉis al li sian tradukon.





Dediĉo al A. Csiszár en la "mini-libro" aperinta en 1974 por miniaturaj libro-kolektantoj.

Certe en la Esperanto-movado troviĝas multaj dediĉoj de Kalocsay. Atestantoj, kaj iam en la fora estonto malkaŝontoj de ĝis nun nekonataj amoj, amikecoj kaj homaj rilatoj.

Meritus la laboron kolekti kaj publikigi ilin.

Károly FAJSZI

ĈAPITRO 5
LA PERSONECO DE KÁLMÁN KALOCSAY

5.1. LIA ASPEKTO

Kiam mi ekkonis Kolomanon Kalocsay (en 1968), lia eksteraĵo jam gardis malmulton el la juneco. Tamen revokante lian figuron, en la bildoserio aperas lia vizaĝo kun trajtoj mildaj, ridetaj, rigoraj, tristaj aŭ malicaj, sed neniam mi vidis vizaĝon de iu oldulo.

Oni prave nomis lin "sentempa", ĉar la maljuneco vere ne estas nur paso de jaroj. Ĝi dependas de multaj aliaj faktoj: sinteno, pensmaniero ktp.

La intima amikaro de Kalocsay ankoraŭ ne bezonas fotografaĵon por revoki lian figuron. Kaj en la memoro gardas tiun bildon pri li ankaŭ tiu, kiu eĉ nur unufoje renkontis lin. Por la sekvaj generacioj la abunde restintaj fotoj sufiĉe fidele montras la eksteran aspekton de Kalocsay ekde la okmonata infano ĝis la 84-jara oldulo.

Laŭ la fotoj lia hararo jam en la fruaj jaroj maldensiĝis kaj ankaŭ la trajtoj de la juna Kalocsay ne estis tiaj altiraj, kiujn tuj rimarkas la virinoj. Kiel la iama lerneja kamarado L. Györy-Nagy rakontis, Kálmán multe suferis pro tio, ke la knabinoj ne nur neglektis, sed ofte ankaŭ priridis lin. Laŭ rakonto de familiano, Kalocsay rekompence tute "sovaĝiĝis", kondutis agreseme kaj ne unufoje li estis ĉefrolanto de diversaj skandaloj aranĝitaj de la knaboj en la urbo Miskolc. Kálmán eĉ en la lernejo ne klopodis akiri bonan noton pri konduto.

Poste okazis feliĉa metamorfozo de Kalocsay. El la miskonduta junulo fariĝis aminda ĝentlemano.

Por kiom eble plej fidele prezenti Kolomanon Kalocsay - krom la fotografaĵoj, kiuj ŝtonigas unununrajn momentojn - parolu ankaŭ la subaj mozaikoj, rakontu kiel aspektis Kalocsay en la okuloj de samtempuloj, kiuj havis eblon persone koni lin.

x

B. Szerémi (prezidantino de HEA inter 1965-1968) rememorante al la dudekaj jaroj skribas:

"... De malproksimo mi observis lin: longa, ridetmiena, juna viro, en la okuloj brilis petolemaj fajreroj. Lin ĉirkaŭis liaj estimantoj, verkistoj-kolegoj. Laŭ ilia sinteno estis rimarkeble, ke Kalocsay "pli ol je kapo" elleviĝis inter ili..."

(HV 1966/3, p.5)

x

L.I. Lappi skribas:

"Laŭ la biografia karakterizo en la *Enciklopedio* sur liaj lipoj ludadas ironia, diabla ridstreĉo. Nu, eble - tiel ja estas laŭ portretoj. Sed en mia memoro restas de l' aŭgusto 1922 bildo de serioza iom enuanta, svelta viro, al kiu proksimiĝi ŝajnis sufiĉe aŭdaca faro. Plurajn fojojn mi do preterpasis lin antaŭ ol mi kuraĝis balbute prezenti al li lian poemkajeron "Mondo kaj Koro" kun peto, ke li bonvolu propramane skribi sian nomon sur la kovrilo. Senvorte li kaptis la kajeron kaj skribis sian nomon. Longe ĝenis min la penso, ke doktoro Kalocsay certe sentis sin ofendita - nu, verŝajne nur tedigo pro la dio-scias-kioma aŭtograpeto..."

(AD p. 106)

x

L. Halka desegnas Kalocsay-bildon jene:

"... Lia longforma sarkasma vizaĝo kun la vigle kaj saĝe brilantaj okuloj, alta frunto, aspektas kvazaŭ pentriste scenigita vivbildo en la kadroj de niaj libroŝrankoj..."

(AD p.30)

x

S. K(amarŷt) skribas:

"Lia menso estas nepre ekster serio. Precipe elstaras memorkapablo, penetrema juĝkapablo, intuicio kaj fantazio kontrolataj de nekutime akra intelekto. Alta, bela viro, svelta figuro ankoraŭ en sia sesdeka jaro..."

(Esperantista (Praha) 1961/10, p.110)

x

G. Waringhien pentras lin jene:

"Alta, facilgesta viro, kun moviĝemaj manoj kaj tre karakteriza kapo: longa, ĝuama nazo, profundaj brunaj okuloj, alta, nuda frunto kaj ĉio substrekita de la ironia, iom diabla ridstreĉo de la lipoj..."

(EdE p. 276-278)

En la priskribo de Waringhien estas eraro. Kalocsay havis ne brunajn, sed bluajn, precipe grizbluajn okulojn. Ĉu eble kulpas la preseja koboldo? Tiu ĉi eraro poste represiĝis ne nur unufoje. Ekzemple Gnafalio (J. Havas) skribas en sia taglibro-fragmento (NLR 1961, n-ro 36, p. 223-224):

"Pasis nur kelkaj sekundoj de streĉita atendado, kiam sur la koridoro ekaperis li, la altstatura, oblongvizaĝa, relative magra, tute ne oldaspekta Parnasloĝanto... Mi supozas, ke li pardonis la atencon, kiun mi faris kontraŭ liaj *brunaj inflamaj okuloj*..."

La eraro de Gnafalio estas pardonebla, ĉar la vizito okazis en oftalmologia sekcio de la *Hospitalo Szent István,* kie oni kuracis la okulojn de Kalocsay kontraŭ herpeto kaj liaj okuloj estis kovritaj per nigraj ŝirmiloj.

La eraron de la *Enciklopedio* sen korektado citis F. Szilágyi (NP 1961/4, p. 99-100), kvankam li havis eblon dum kelkaj jaroj rigardi en la okulojn de Kalocsay.

x

M. Boulton:

"La fotografaĵoj pri Kalocsay kutime tre bone portretas lin, homon, kiu multe solecis, multe suferas, sed kies vera artamo subtenis lin kaj kiu ankoraŭ vigle kaj brave apetitas la vivon. Vivoplenaj, penetraj okuloj, kiuj fortimigus, se li ne estus tiel milda kaj ĝentila: nazo iom cezareca; sentema, forte esprimpova buŝo. Hararo? - La rikolto de tiu ege nobla kapo estas interna, ne ekstera..."

(TBE 1962, n-ro 678, p. 238)

x

S.Szathmári:
"Mi renkontis lin en ERA, kiu estis tiutempe la plej altnivela hejmo de niaj verkistoj. Li prelegis pri sia tiatempe pretiĝanta Dante-traduko pri la INFERO. Tiam mi povis observi lian diablecan vizaĝon: svelta, longa nazo, oblikve suprenkurantaj brovoj. Perfekta Mephisto-masko, kiel iu saĝa, eleganta, malicridetanta diablo de la *Infero*! La efiko estis plena..."

(Paco 1966, n-ro 151, p.10-11)

x

1921

1936
Grafitdesegnaĵo de
St. Barta

1966

Tri vizaĝoj: la juna, mezaĝa kaj olda "diablo".

x

Cetere kalocsay ne multe zorgis pri sia eksteraĵo. vere li ne estis pedanta homo. La manuskriptoj, leteroj, libroj, kiuj venis al liaj manoj ofte ĉifoniĝis aŭ ricevis rondfiguran makulon de la kafotaso. Lia edzino opiniis, ke la laborĉambro de Kálmán similas al "stalo de Aŭgio".

Kvankam ĉi tiu komparo troigas, tamen ankaŭ mi ĉiam miris: kiel kapablas Kalocsay krei en tiu malordo? Nur poste mi komprenis, ke ekzistas du diversaj laborĉambroj: la unua, kie estas ordo, kaj la alia, kie estas malordo, kie oni laboras kaj ne perdas la tempon por ceremonia kafotrinkado.

Cetere en tiu ĥaoso Kalocsay bonege orientis sin. Probable li havis ian ordsistemon en la malordo, ĉar li en kelkaj minutoj trovis bezonatan libron aŭ manuskripton serĉatan. Li konfuziĝis nur, kiam la edzino "faris ordon" sur la skribotablo.

La manuskriptoj ĉe li - pro la multaj korektadoj kaj pro la kaduka skribmaŝino - estis malfacile komposteblaj. Al la presistoj ili kaŭzis sufiĉan zorgon. Al malneto li ĝenerale ne uzis manuskriptan paperon. Liaj admirindaj versoj, pensoj multfoje troviĝas sur medicina receptopapero aŭ paperpecetoj. Li ne hezitis uzi tiucele eĉ la dorsflankon de ricevitaj leteroj kaj kovertoj.

5.2. LIA SUGESTIVECO

La fotoj apenaŭ povas montri la altiran forton, kiun elradiis Kalocsay. Lia personeco ravis, pli ĝuste katenis ĉiujn tute egale, ĉu la koncernulo proksimiĝis al li kun admiro aŭ orgojlo.

Lia personeco estis ĝenerale simpatia, sed ne ĉiam ĉe la unua renkonto.

F. Szilágyi rakontis la iamajn miksajn sentojn, kiujn vekis en li Kalocsay.

"Mi renkontis Kalocsay dum iu kunveno, sed li ankoraŭ ne renkontis min. Tiutempe multaj aferoj premis min kaj grizigis mian ekziston. Malantaŭ mi estis grava malsano, kun mi angoro kaj zorgoj, mia civila kariero detruiĝis, mi ŝoviĝis al la periferio de la socio, kvankam la komenco de mia vivo predestinis min al la bonburĝa vivo de la jarcentkomenco. Sed Kalocsay estis pli aĝa, pli aplomba, i.a. ankaŭ kuracisto aŭtoritatulo. Mi havis dum la antaŭaj jaroj trudrilatojn al kuracistoj kaj jam tio, ke li estis kuracisto kaj eleganta mondulo, moderigis mian kuraĝon veni en tujan proksimon al li. Li estis afabla kaj sprita, simpatia sed samtempe rezervema. Lin ĉirkaŭis mondfamo kaj aliaj avantaĝoj, formintaj ian sorĉan ringon, ne transpaŝeblan. sed lia klasika aspekto (mi pensis pri Patronius Arbiter), lia rapida piroteknika maniero, la "diabla ĉarmo kaj viva viglo", lia sindono al la artaj belaĵoj, sorĉis min, kiu restis en deca distanco. Li estis senharulo kun densaj brovoj, kiu akcentis iel la koncentran forton kaj la gravon de la alta frunto: ĝi povus esti vera plezuro de frenologo. Kalocsay ravis kaj konkeris de distance... Malgraŭ la rava maniero de la majstro mi ne tuj venis en lian proksimon. Tion mi povas trankvile konfesi nun, kiam ankaŭ al li ligas min amika rilato, kiu estas pli intima ol familiaj rilatoj kutimas esti. Sed tiam en mi, kaj eble ne nur en mi, spitis la sento de kontraŭstaremo kaj preskaŭ protesto. Oni povus klarigi tion diversmaniere, mi ja estis intelektulo, diplomito, kiun sortplagoj premis en la polvon; li sidis en la certo de jam sekura sukceso. Povas esti, ke la brilo de lia talento senigis min de kuraĝo, eble mi sentis min "paciento", kiu ankaŭ en la privata vivo hororis de la kuracisto. Verŝajne tiaj motivoj kunefikis. Sed mi kaj la simile pensantaj estis tro egocentraj kaj tute ne donis atenton al la sentoj de Kalocsay. Nun mi scias, ke Kalocsay devis reagi al tiaj sintenoj. Li estis senkulpa pri ili, sentema kaj rezervema, kvankam facilagorda, senpera. Meze de la plej granda admiro kaj prestiĝo li estis sola kaj tion li akceptis verŝajne kun facila melankolia filozofio..."

(NLR 1961, n-ro 36, p. 211-213)

x

R. Rossetti rakontas sian alproksimiĝon al Kalocsay jene:

"Mi vizitis la unuan postmilitan kongreson en Bern dum 1947. Mi konjektis, ke nia poezia giganto venos. Kiam ni paŝis tra la bierkelo dum la *Interkonatiĝo*, mi subite haltis ekvidinte lian altan figuron ne miskoneblan pro viditaj fotoj. Al mia edzino mi raŭkis: "Vidu - jen Kalocsay!". "Do iru al li!, ŝi diris. "Ne", mi diris, "mi ne volas". "Do mi iros", ŝi diris, kaj ŝi alpaŝis. "Pardonu, ĉu vi estas doktoro Kalocsay?" La vive afablaj okuloj ŝin rigardis. "Jes". "Do mia edzo volas renkonti vin, sed li timas." "Kiu estas via edzo?" "Reto Rossetti". "Kie li estas?!" Li malfermis vaste al mi la brakojn, mi rapidis al lia invito kaj li min ĉirkaŭvolvis..."

x

Kiom ajn alloge estus priskribi, ke la okuloj de Kalocsay estis "varme karesaj", tio ne estas vera. Lia okulparo - kiel ofte la bluaj - brilis akrece kaj lia esplora rigardo ne unufoje embarasis (kelkfoje ĝis mutiĝo timigis) personojn, kiuj ne konis lin pli proksime. Kelkfoje nur lia nomo kaj famo sufiĉis fortimigi eĉ elstarajn esperentistojn. Foje okazis, ke amikoj de Kalocsay devis kvazaŭ persvadi iun samideanon por venigi lin al Kalocsay.

Feliĉe por Kalocsay ne troviĝis temo bagatela. Ĉio interesis lin. Kaj li kapablis konversacii tiel vigle, ke la timema vizitanto baldaŭ reakiris sian psikan ekvilibron. Dum la konversacio Kalocsay ofte leviĝis de sur la seĝo, elprenis ian libron el la libroŝranko aŭ elminis ian manuskripton el la tirkesto, kio ĝuste koncernis la priparolatan temon.

En la societo de Kalocsay neniam okazis tia ĝena situacio, ke la ĉeestantoj samtempe ĉesas paroli kaj subite fariĝas embarasa silento. Ĉi-okaze diras la zamenhofa proverbo: *Traflugis anĝelo preter la orelo.*

Kalocsay estis sprita rakontisto kaj li volonte amuzis la striktan amikaron: deklamis, kantis, kelkfoje prezentis la plej novajn budapeŝtajn ĵargonojn, per aktora lerteco imitis iun ĝenerale ironie. Kompreneble li "arlekenis" nur antaŭ la plej intimaj amikoj, antaŭ la t.n. "sabataj gastoj".(10)

Kiel gastiganto li estis nelaciĝema. La etoso ĉe Kalocsay estis ĉiam agrabla kaj la vizitantoj ne rimarkis, ke flugis la horoj.

La personaj renkontiĝoj kun Kalocsay registriĝis en la memoroj kiel travivaĵoj.

D-ro K. Beckmann kaj E. Vokal en la *Viena Radio* (1971.11.24) dissendis prelegon pri Kalocsay okaze de lia 80-jara naskotago. Ili konstatis: "Kiu ajn ĝuis la bonŝancon de persona interparolo, rakontas - kun lumantaj okuloj - pri la stimula sperto, eĉ se li ne senkondiĉe aŭ ne ĉiurilate samopinias kun tiu ĉarma personeco..."

La altira forto de Kalocsay kompreneble efikis ankaŭ ĉe virinoj, kvankam ĉe ili li rikoltis malpli da laŭroj ol Paĉjo. "Baghy estas papilio" opiniis Kalocsay. Estas interese, ke la adorantoj de Baghy rekrutiĝis el inter samideaninoj kaj tiuj de Kalocsay ĝenerale el koleginoj medicinistaj. La samideaninoj verŝajne rigardis Kolomanon Kalocsay kvazaŭ foran stelon, netaŭgan kaj neatingeblan por surteraj virinoj. Jes ja, lin kisadis Esp-ERATO. Letero konfesas pri tia *Platona amo*:

"Tre kara - Senlime Admirata
Vere mi ne scias, kion pli admiri ĉe vi, la unikan genion aŭ la personan noblecon. Rigardante vian bildon mi pensas: jen la ideala viro! Intelektulo, vireca, varma, tenera..."
La leteron kompletigas poemeto:

Nekontestebla vero

Altiris min al vi
Mistera dolĉa fort'
Obeis mi al ĝi
Sen riproĉema vort' .
Vi alrigardis min:
Premiĝis mia gorĝ' ,
Ekbatis la destin'
Per neŝanĝebla forĝ'.
Elektis mia kor'
Sen penso pri l' estont'
Mi scias nur Sinjor'
Vin sur la horizont' !

(10) En la lastaj kvin jaroj de lia vivo tiuj vizitantoj estis Ada Csiszár, la geedzoj Kökény kaj Lajos Tárkony.

5.3. LA VOĈO DE KALOCSAY – LIA PAROLMANIERO

Kiam oni vokis Kolomanon Kalocsay pertelefone, iuj eĉ dufoje demandis: „Ĉu tie parolas d-ro Kalocsay? „La dubemon kaŭzis, ke la telefonaparato tute ŝanĝis lian voĉon similan je voĉo de knabino.
Lia voĉo en persona proksimo ne estis „orelkaresa" (almenaŭ en lia maljuna aĝo), tamen lia dinamika, pasia parolmaniero akompanataj per abundaj mimikoj kaj mangestoj katenis la aŭskultantojn. Pri lia oratoreco skribis F. Szilágyi (NLR 1961, n-ro 36, p. 211):

„Kiam li legis siajn poemojn kaj tradukojn, laŭ la kutima proporcio de la Esperanta publiko la pli granda parto ne povis atingi la alton de poemkompreno. Sed ĉiu sidis fiksita al la seĝo kaj ĝuis la deklamon de la senteme rapida, tamen tute ne nervoza viro, kiu mem dum la legado tute perdis la mondon kaj havis en si kaj kun si nur poezion. Eĉ tiun parton de la publiko, kiu eterne restadis en la neŭtrala zono 'Bonan tagon – ĝis revido', kaptis la vortmuziko kaj la trajtkoreografio de Kalocsay.."

Se paroli sincere, la prononco de Kalocsay en Esperanto ne estis sekvinda modelo. Li akcentis la unuan silabon laŭ la prononcregulo de la hungara lingvo. La vortfinan „o" li elparolis longe kaj akute, la Esperanto „e" ofte aŭdiĝis (kiel ĝenerale el la buŝo de hungaroj) „i". Krome li parolis kaj deklamis tiom galope, ke la vortoj ofte iĝis nekompreneblaj eĉ por la lingvon bone parolantaj esperantistoj.

R. Eichholz recenzante la diskon de *Amo-Akademio* (Esperanto 1973/149), pri la deklamo de Kalocsay prave rimarkis: „La poemoj estis rapide deklamitaj. Kelkaj enhavas maloftajn vortojn – precipe, 'Doña Klara' de Heine – tial estus dezirinda ankoraŭ aldoni la tekston por faciligi la komprenon." (11)

Pri la parolamniero de Kalocsay B. Szerémi (prezidantino de HEA en 1965-1967) skribas:

„Kalocsay prelegis ion – kaj tio kaŭzis ĉe mi egan elreviĝon – mi ne komprenis Lin! – Lia voĉo sonis iom raŭke, bareltone kaj la elparolo – por miaj oreloj rapida, estis ofte ne komprenebla. Mi evitis la personan konatiĝon, timante, ke mi dirus al li mian opinion: 'Kiel literatura regnestro de la Esperanto-mondo, vi ravis min, sed kiel oratoro, Vi ne povus ravi la diojn sur la Olimpo'..."

(HV 1966/3, p.5)

Pri la voĉo de Kalocsay malsamopinias G. Waringhien, kiu en ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO (p. 276) diras: „Li parolas per velura voĉo".

Jen la opinio de M. Boulton:

La voĉo de poeto ofte seniluziigas. Mi memoras plurajn kazojn tiajn. Oni ofte menciis al mi la malbelecon de mia propra voĉo. Sed la voĉo de Kalocsay taŭgas por eĉ lia verkaro. Ĝi estas tre bela, bela nek kiel siropo, nek kiel zefiro, nek kiel fandita oro. Eble pli kiel... fluo de fandita ŝtalo. Ĝi retas la spiriton en perfekta iluzio de plenkompreno: dum momento tiu legado egaligas la aŭskultanton kun la kreinto. Se oni nur aŭdus tiun voĉon, oni scius, ke tie ĉi estas vera artamanto..."

(TBE 1962, n-ro 678, p. 238)

(11) Sub titolo ĈI TIE PAROLAS KALOCSAY... estas aldonaj tekstoj en la KAL-ĈI Dokumentaro.

5.3.1. Verba volant... (12)

Jes. Tamen la vortoj flugilhavaj – dank' al la tekniko – estas kateneblaj kaj la sonoj revokeblaj ankaŭ post jaroj eĉ jardekoj.

En la KAL-ĈI Dokumentaro zorge gardataj sonbendigitaj voĉoj de Kalocsay estas valoraj relikvoj, malgraŭ ke tiuj „voĉkonservoj" nur pale povas redoni la vivoplenajn dolĉajn vortojn kaj neniam la tiaman etoson.

La bonŝanculoj, kiuj posedas „eternigitajn" voĉojn de tiu ĉi klasikulo de la Esperanto-kulturo certe koncias sian moralan respondecon: plukonservi (eble multobligi) kaj heredigi tiujn valorojn al la sekvaj generacioj.

Sonbendigitaj kaj diskigitaj voĉoj de K. Kalocsay

Tibisko
Okaze de la 67a naskotago de J. Baghy, en la festa kunveno (januaro 1958) Kalocsay – honore al la poetofrato – laŭtlegis en sia traduko la poemon de S. Petőfi.

La cerbo
La poemon el EZOPA SAĜO voĉlegis Kalocsay en la kunveno de veteran-esperantistoj aranĝita la 22an de januaro 1961, en Budapeŝto. La deklamon li enkondukis per spritaj vortoj.

Germanio – Vintra fabelo I; La poeto Firduzi
Okaze de la 70a naskotago de Kalocsay en festa kunveno okazigita en la Grupo Konkordo (Budapest) la 7an de oktobro 1961, por rekompenci la salutvortojn, li voĉlegis tiujn du Heine-poemojn en la traduko de G. Waringhien.
L. Halka deklamis poemon de M. Boulton: *Kolomano Kalocsay*, L. Tárkony voĉlegis Kalocsay-poemon *Protesto*.

Esperanto kaj literaturo
Prelego de Kalocsay la 26-an de oktobro 1961, en Miskolc. La programon sonbendigis István Pál. La hungarlingvan prelegon de Kalocsay esperantigis d-ro István Nagy. La teksto aperis en DEK PRELEGOJ (1985) p. 117-121 .

Gilgameŝ
En la *Belarta Konkurso* de la 51a UK en Budapeŝto 1966, Kalocsay deklamis el la ŝumera-babilona epopeo la VII-an Tabulon:
La morto de Enkidu.
Enkonduke li skize rakontis la enhavon de la epopeo *Gilgameŝ*.

La 77a naskiĝtago de Kalocsay
Mesaĝo al la *Grupo Konkordo*. La 3-an de oktobro 1968 vizitis ĉe Kalocsay anoj de la Grupo por sonbendigi lian voĉon, kion oni laŭtlegis en festa kunveno la 7an de oktobro 1968.
Sonbendigo de Helene Kárász.

Saluto de Kalocsay
Konkordo festis sian prezidanton, la 75-jaran Paŭlon Balkányi. La naskiĝtagan saluton de Kalocsay sonbendigis Helena Kárász la 5-an de marto 1969.

(12) Latinaĵo: *La vorto forflugas...*

La voĉoj de Prof. D-ro K. Kalocsay
„La Voĉalbumo de Esperanto „11-12. Temmori: *Amo-Akademio*, 1973. Disko duflanka, monofona, fleksebla 33 rpm. 18 cm. Kun interligaj vortoj Kalocsay deklamas el siaj originalaj kaj tradukitaj poemoj:
Te Hanh: *Sciigo el Suda Vjetnamio*
Heine: *Dona Klara*
Perspektivoj (Fragmento el la poemo)
Ludo (Soneto)
La fundamento kaj la palaco
Kalocsay skizas la iaman *Rezolucion de la Japana Instituto* kontraŭ neologismoj. Laŭ la sonbenda registraĵo de T. Hugimoto en 1969.

Mesaĝo de Kalocsay
Konsiloj al la studentoj de la *Esperanto-lingvofako* en la *ELTE Universitato*. Intervjuo kaj sonbendigo de János Ingusz en oktobro 1971.

Lasta kafo kun Kolomano
Intervjuo de G. Silfer la 1-an de junio 1975. Aperigita en LF 1976, n-ro 36, p. 10-12.

Kalocsay rememoras...
La 4an de oktobro 1975 Mihály Gergely, tiama redaktoro de *Hungara Vivo* konversaciis kun Kalocsay pri la fama *Literatura Mondo*. La hungarlingvan interparolon – laŭ la sonbendigita teksto de Lajos Kapitány – esperantigis Ferenc Bartók.

La lasta intervjuo kun Kalocsay
La 15an de oktobro 1975 Lajos Kapitány sonbendigis sian konversacion kun Kalocsay.
Kalocsay voĉlegis en sia traduko la poemon de A. Policiano:
Knabinoj, mi promenis...
La teksto aperis en *Monda Karuselo* 1980, n-ro 16, p. 3-6.

En la KAL-ĈI Dokumentaro mankas sonbendigitaj voĉoj de Kalocsay. Nome:

H. Tonkin vizitis ĉe Kalocsay en 1963. Pri la vizito li rememoras en Esperanto 1976/43.

Parolas Kalocsay
Intervjuo de G. Silfer en 1971. Aperigita en LF 1971, apr., p. 9-11; repr. en derE 1971, n-ro 11-12, p. 15-16.

„Esperanto estis mia nobla hobio"
R. Haupenthal interparolis kun K. Kalocsay la 20an de julio 1972. La teksto aperis en NP 1972, n-ro 3, p. 131-140; repr. en DU INTERVJUOJ... A. E. Iltis. Saarbrücken, 1979.

Ses voĉoj kremaj
Deklamas K. Kalocsay, T. Sekelj. T. Jung, V. Sadler k.a. Oosaka: KLEG, 1980. Kalocsay deklamas en sia traduko la poemon de Heine: *Dona Klara* Kun tekstolibreto.

LA VOCALBUMO DE ESPERANTO

La VOCOJ

de

Prof. d-ro K. Kalocsay

(Hungarujo)

AMO-AKADEMIO

Kovrilo de
„La Voĉalbumo de Esperanto"

5.4. KALOCSAY KAJ LA POLITIKO

5.4.1. *Enkonduko*

La ideon de la humanismo ekkonis Kalocsay en la *Galilei Kör* (Rondo Galilei). En tiu ĉi rondo li ekkonis la marksismon, kiun li trovis simpatia. Estis memkompreneble, ke post la dua mondmilito li aniĝis al la komunisma partio kaj iom da tempo li estis ties sekretario en la *Hospitalo Szent László.*

Kiam ni ekzamenas la politikan sintenon de Kalocsay, oni devas konsideri ankaŭ la cirkonstancojn, nome la historion de la lando kaj epoko, en kiu li vivis kaj agadis.

Jes ja. La homoj vivas en la okazintaĵoj. Ili estas partoprenantoj (pasivaj aŭ aktivaj) de la historio, kies eventoj donas al ili spertojn influante kaj formante la individuajn opiniojn. Povas esti, ke iu akceptas, eĉ entuziasmas por tiu sociordo en kiu li/ŝi naskiĝis kaj vivas, sed lia/ŝia politika opinio eble estus tute kontraŭa al tiu de la nuna, se li estus naskiĝinta antaŭ kvindek aŭ cent jaroj.

Postulus longan studon eĉ por skizi la politikajn cirkonstancojn, kiuj regis dum la vivo de Kalocsay, ĉar en tiuj jardekoj abundis okazintaĵoj kaj ŝanĝoj en Hungario: reĝa potenco, feŭdal-kapitalismo, revolucio, proletardiktaturo, du mondmilitoj, "popola demokratio", jaroj de la malvarma milito, subpremita revolucio en 1956 - ĉiuj kun siaj ideologioj kaj potencoj.

En la verkaro de Kalocsay troviĝas kelkaj pecoj, per kiuj li hodiaŭ certe ne fanfaronus. Jen la kondamnitaj verkoj:

Traduko de LA VIVO DE ARNALDO de B. Mussolini, aperinta ĉe Literatura Mondo en 1934.

Originalaj poemoj: *Marx, Engels, Lenin, Stalin, Oktobra odo al la tridekjara Sovetunio.*

Koncerne tiujn kondamnitajn poemojn oni bezonas rememori pri la tiama politika situacio.

1945. Apenaŭ ĉesis la milita ŝtormo super Hungario, fervoraj esperantistoj komencis reorganizi la movadon. *Hungara Esperantista Societo Laborista* (HESL), poste ankaŭ la *Hungarlanda Esperanto-Societo* (HES) funkciis.

1946. En januaro aperis la unua postmilita E-gazeto, la *Sudhungarlanda Stelo.* En aŭgusto jam estis aranĝita la XVIa *Hungarlanda Esperanto-Kongreso.*

1947. Reviviĝis *Literatura Mondo.* La *Hungara Radio* regule dissendis esperantlingvajn informojn. El Hungario povis veturi kongreskaravano al la 32-a UK en Bern.

Tiuj rezultoj povus kredigi, ke en Hungario estis favoraj cirkonstancoj por Esperanto. Ne estis tiel. La movado - kiel ĉiuj aliaj societoj - devis submetiĝi al la postuloj de la reĝimo kaj ĝi devis konstante pruvi sian lojalecon al la popoldemokratio.

En tiuj kondiĉoj estis memkompreneble, ke la lojalecon de esperantistoj deklaru la plej eminenta (en ambaŭ tendaroj rekonata) persono, t.e. Kálmán Kalocsay. "Bonintenca" magistratano rememorigis lin pri liaj antaŭaj "pekoj": deveno de intelektulara tavolo kaj ne estis ankoraŭ forgesita la traduko de LA VIVO DE ARNALDO, poemo *Al la Eŭkaristia Kongreso,* kiun li - laŭ la tiutempaj gazetoj - tre entuziasme deklamis dum la kongreso. Ne estis forgesita lia kunprezidanteco en la *Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo.* (En tiu tempo la religio estis persekutata, religiemuloj estis taksataj kiel reakciuloj, kiuj klopodas bremsi la demokratian antaŭeniron. Eĉ el la nomoj de institucioj vorto Szent (Sankta) estis oficiale forviŝita. Ankaŭ la nomo de la laborloko de Kalocsay estis amputita: *Hospitalo László).*

Revenante al la menciitaj poemoj Kalocsay per elokventa plumo plenumis sian taskon aperiginte la poemojn en la *Internacia Kulturo* 1947, n-roj 6/7 kaj 12. Tiuj kreaĵoj bonvenis al ĉiuj "satelitaj landoj", oni aperigis ilin plurloke kaj plurfoje kaj tradukis ilin al naciaj lingvoj. Do la "socialismaj landoj" dankis, okcidentanoj riproĉis la poeton.

La klare vidantaj homoj - ankaŭ Kalocsay - baldaŭ seniluziiĝis, ĉar oni spertis, ke la stalina komunismo estas malhumana. En 1948 jam ne naskiĝis "entuziasmaj" Kalocsay-poemoj.

Kiel poste evidentiĝis, nek la glorigaj poemoj, nek aliaj manovroj efikis kontraŭ subpremo. Pli kaj pli influis la personkulto, akriĝis la malvarma milito, fortiĝis la diktaturo. Depost aŭgusto 1949 jam neniu E-gazeto plu aperis. Ĉesis la *Esperantlingva Radio-dissendo*, ĉesis ankaŭ *Literatura Mondo* (kaj ne nur pro financaj malfacilaĵoj). De la ŝtataj instancoj venis "buŝa atentigo", kies sekvo estis, ke en aprilo 1950 la *Komitatkunsido de HES* voĉdonis pri provizora interrompo de sia agado.

Post longa silento, en 1955 fondiĝis *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro* (HEK), kvankam ĝi ne estis jure registrita. En 1960 estis eblo de jura registrigo, sed kiel nova organizaĵo sub la nomo: *Hungara Esperanto-Asocio.*

En tempesta jarcento vivis Kalocsay. Li estis nek heroo nek martiro. Li estis humanisto.

Bibliografio

G. Berveling: *Kompletigo* al la artikolo de A. Csiszár: *El Abaújszántó...* (en Fonto 1991, n-ro 130, p. 3-9) Fonto 1992, n-ro 133, p. 27-28.

A. Csiszár: *Kompletigo al la Kompletigo de G. Berveling.* Fonto 1992, n-ro 141, p. 25-27; repr. en Eventoj 1993, n-ro 21, p.8.

A. Csiszár: *Kondamnitaj poemoj de Kálmán Kalocsay*, Fonto 1993, n-ro 151, p. 13-20.

G. Berveling: *Kalocsay kaj la politiko* (Komentario), Fonto 1993, n-ro 151, p. 21-22

Aldo de' Giorgi: *Pri la kondamnitaj poemoj...* (Alparolo), Fonto 1994, n-ro 157, p.8-10.

Shi Chengtai: *Kalocsay en la politiko*, Fonto 1994, n-ro 158, p. 22-24

5.4.2. *Ekster HESL-rondo, tamen kun ni...*

Kalocsay ne vizitis la aranĝaĵojn de laboristaj esperantistoj, ne venis ekskursi kun ni, kiel Baghy - kaj min interesis pli la politika flanko de la Esperanto-movado ol la literaturo, do ni povis renkontiĝi nek en grupo, nek sur idea tereno.

Pasis jardekoj, tamen eĉ vorton mi ne sukcesis paroli kun Kalocsay, nur en 1948 okazis la persona konatiĝo kaj pli oftaj renkontiĝoj.

Iom post iom mi konstatis, ke mi formis malĝustan opinion pri li pensante, ke li estas individua genio, ĉar kvankam li ne apartenis al nia rondo, persone li ne ĉeestis, tamen li estis kun ni, kun la amaso da laboristaj esperantistoj, ĉar li estis tiu, kiu konstante blovis la flameton de la klaskonscio, de patruj- kaj popolamo en la koro de revoluciemaj gejunuloj esperantistoj per traduko de laboristaj kaj popolaj kantoj (13), kiujn ni entuziasme kantadis dum ekskursoj kaj deklamis liajn poemojn ankaŭ dum kulturvesperoj.

Jes, ne povas esti individuisma persono tiu homo, kiu donas la tutan trezoron de sia koro kaj kapablo al tiu komunumo, kiu estas flagoportanto de la progreso kaj konstruas la pli belan estonton de la homaro.

Borbála SZERÉMI

5.4.3. *Kiel batali?*

Kalocsay verŝajne neniam estus elektinta la "membruligon" kiel armilon (pensu ekz. pri Ĉunosin Jui) (14), ĉar li sobre konsideris ankaŭ la atendeblan rezulton, la realaĵon.

Inter la postlasitaj paperoj de Kalocsay flaviĝas leterkopio. Kalocsay respondante al la riproĉeto de K.R.C. Sturmer (en la tridekaj jaroj) skribis:

"... Ke vi laboras por la detruo de la nuna civilizo, tion mi ne tute komprenas. Laŭ mia opinio la civilizo estas kulpa pri nenio, nur la ekonomia sistemo. La t.n. burĝan kulturon mi rigardas nepre kaj nedisigeble algluita al la burĝa ekonomia sistemo. Ĝi estas simple individua kulturo, kiu povas plu ekzisti, eĉ flori kaj pompi ankaŭ en kolektiva ekonomio. Laŭ mia opinio, la homo neniam evoluas al plena kolektiveco kaj individuo-neniiĝo de l' formikoj aŭ abeloj. La kulminon de l' homevoluo, la veran Paradizon sur la Tero alportos ĝuste la sintezo de la individuismo kaj kolektivismo. Kaj ĉi tiun sintezon donos: individuismo en kulturo kaj kolektivismo en ekonomio. Mi kredas,ke la devizoj de la franca revolucio: 'Egaleco, frateco, libereco' - estas devizoj eternaj, nur oni devas ilin ĝuste interpreti. Tio estas: materiala egaleco, pensa kaj kultura libereco. El la sintezo de ĉi tiuj du principoj la frateco doniĝas per si mem.

Ke mi ne volas detrui la nunan sociordon? Jes ja, mi volas. Sed ne en LM. *Literatura Mondo* estas nome la sola literatura revuo en Eperanto, post ĝia ĉeso oni tute ne havus plu tian. Se ni publikigus en ĝi ion revolucian, oni ĝin tuj ĉesigus. Nun pensu. Ĉu la mondsava efiko de tia sola, eĉ plej genie skribita artikolo valorus la morton de la revuo? Mi mem deziras, ke la revuo aperu en la lando, kie oni pli libere spiras. Sed tiaj landoj pli kaj pli maloftiĝas..."

x

F. Szilágyi rememorante al la unua kaj dua (antaŭmilita) periodo de *Literatura Mondo* skribas:

"Kalocsay 'ex officio' devis ĉiam sekvi formale la regantajn sistemojn, sed li estis ĉiam opozicie progresema; plej ofte li devis kaŝi tion. Esperanto ravis lin kaj ligis lin al sindono, sed ne al ekstazo. Sed li estis kuraĝa: mi memoras okazojn, kiam la gazeto havis du variantojn, unu preskaŭan al la hungaraj magistratoj kaj la alian, kiun oni sendis eksterlanden kaj en kiu estis kelkaj artikoloj ne konvenaj al la vido de la pli kaj pli fortiĝanta hungara reakcio..." (15)

(NLR, n-ro 36, p. 213-214)

Revenante al la dudekaj-tridekaj jaroj.

Post la falo de Hungara Konsilantara Respubliko (1919.07.31) sekvis la jaroj de reordigo, revenĝo. La nova reĝimo volis ekstermi eĉ la ĝermon de marksismo. Ĝuste tial pikis ĝiajn okulojn la klasbatalaj laboristoj, kiuj postulis pli favorajn vivcirkonstancojn. Do ili devis agadi kaj propagandi neleĝe, sub egido de diversaj societoj. Ankaŭ la Esperanto-movado servis kiel "kaŝloko" kaj en ties kadro oni aranĝis ekskursojn kaj kulturajn programojn. HESL havis koruson, sed dum la ekskursoj kaj kunvenoj mankis konvenaj Eperantaj kantoj. Tial V. Bleier eldonisto de *Literatura Mondo* insistis kaj aperigis libreton sub titolo NI KANTU!, kies kantojn tradukis Kalocsay.

La polico konfiskis la libron opiniante, ke la kantoj en Esperanta versio estas "revoluciaj", ili ekscitas kontraŭ la socia ordo, konvenas por instigi al ribelo".

De tiu tempo en la okuloj de la polico la Esperanto-movado fariĝis pli suspektinda, ties eldonaĵoj pli severe cenzuritaj.

Inter lupoj kriu lupe

Ano de la tiutempa magistrato karakterizis la Esperanto-movadon jene: *La esperantistoj estas kiel la ĉerizoj; unue verdaj, post la maturiĝo ili ruĝiĝas,* t.e. ili fariĝos komunistoj. La movado ofte suferis pro policaj malpermesoj kaj persekutoj. Tiam V. Bleier por defendi pluajn atakojn en 1934 eldonis la libron de la Mussolini verko: LA VIVO DE ARNALDO en traduko de Kalocsay. En la libro la Duce volis eternigi la memoron de sia mortinta frato. La eldonon finance apogis Gino Catarzi kaj la *Esperanto-Centro Itala.* Tiu ĉi libro-eldono fare de Bleier-Kalocsay estis taktiko por intereso de esperanto. Ili volis kvietigi la furiozon de la polico kontraŭ la movado. Krome ili revis pri tio, ke la esperantigita verko de Mussolini helpos la disvastigon de la *Internacia Lingvo* en Italio kaj oni povos varbi abonantojn por *Literatura Mondo.* Kvankam tiu naiva espero ne plenumiĝis, tamen per diversaj manovroj ili sukcesis vivteni la revuon kaj daŭrigi la libro-eldonadon.

Poste dum la komunisma regado malpli orientitaj aŭ miopaj samideanoj (kelkaj eĉ ne legis la libron) ne unufoje riproĉis la tradukiston kaj eldoniston. Sed pripensu: ĉu oni povas supozi, ke V. Bleier, kiu apartenis al la subpremita tavolo de la tiama sociordo (li estis judo) volis akceli la triumfon de la faŝismo? (Cetere V. Bleier fariĝis viktimo de la faŝismo).

En tiuj jaroj Kalocsay senpere korespondadis kun siaj sovetaj amikoj, kunlaborantoj de *Literatura Mondo.* En lia laborloko la reakciuloj opiniis, ke li estas "suspektinda" persono, verŝajne "bolŝevisto". Do la polico traserĉis lian hejmon, sed feliĉe ili trovis nenian "corpus delicti". Post tio Kalocsay daŭrigis la korespondadon pere de francaj samideanoj.

En 1944 - kiam ankaŭ en Hungario jam furiozis regado de la sagkrucanoj (16), Kalocsay savis ne unu persekutaton (inter ili ankaŭ esperantistojn) el la manoj de faŝistoj, kiuj ne multe hezitis por uzi pafilon kontraŭ rifuĝanto kaj kontraŭ defendanto. Poste ankaŭ Kalocsay devis fuĝi, ĉar malhonestaj kolegoj denuncis lin. Bonŝance Kalocsay sciiĝis, ke la polico ordonis lian arestigon, do li fuĝis al Máriabesnyö en la somerumdomon de la familio. Tiu ĉi vilaĝo por la faŝistoj estis danĝera zono, ĉar je kvinkilometra distanco estis la batalkampo kaj marŝis antaŭen la sovetaj armeoj. Tie Kalocsay restadis en sekureco.

5.4.4. Homo en la malhomeco

La 18-a de oktobro 1944. Kien nun?

Jam de tri tagoj mi estas ĉe mia amiko, havanta similajn al la miaj falsajn dokumentojn. Resti plu ĉe li estas pli ol danĝere por ni ambaŭ. Sed kien? De tri tagoj senbride furiozas la "sagokrucistoj", la hungaraj faŝistoj.

Kien?... kien?... Trovi homon en la malhomeco!

Kalocsay... mi vidas liajn varmajn okulojn, lian neforgeseblan rideton. Mi memoras, kiel li kuraĝigis min, komencantan tradukiston, kiel li zorgis pri mia evoluo, donacante al mi multajn librojn.

La *Hospitalo Szent László.* Mi trovis lin en la manĝejo. Sen klarigo li tuj komprenas ĉion. Li kondukas min eksteren al la parko de la hospitalo.

- *Provizore ĉi tien!* - kaj li montras al la subirejo de neuzata ŝirmejo. Li ĉirkaŭrigardas.

- *Nun!*

Dek tagojn mi restis tie. Ĉiutage li alportis manĝaĵon.

Estus sufiĉe, se unufoje oni ekvidus lin. La sagkrucistoj ne ceremoniis. Por savi la vivon de persekutato, li ne hezitis riski la sian.

Imre BOTOS
(HV 1966/3, p.5)

(13) Temas pri KANTATA KAMPARO kaj pri NI KANTU!

(14) J.C. fervora pacifisto la 11-an de novembro 1967 per benzinflamo bruligis sin antaŭ la domo de ĉefministro Sato. Li protestis – interalie — kontraŭ la helpa agado de registaro al Usono por bombardado de Nord-Vjetnamio.

(15) Cetere ankaŭ en la postmilita, tria periodo de LM ŝajnis konvenaj diversaj artifikoj. Ekzemple en la revuo Kalocsay aperigis eĉ ne unufoje sovetajn aŭtorojn fikciajn.

(16) Hungaraj faŝistoj.

5.4.5 LA MESAĜO DE NAZIM HIKMET (17)

K. Kalocsay

Poeto Nazim Hikmet sidas
Por tridek jaroj en karcer'...
La muroj ĉirkaŭ li mucidas,
La sunon li neniam vidas
Inter fenestra krad' el fer'.

Jen sian plej dolĉkantan filon
Turkujo tenas en obskur',
Domaĝas al li la sunbrilon,
Domaĝas al li eĉ skribilon.
Li skrapas versojn sur la mur'.

La skrapo muron ja ne fendas...
Tamen, skrapeton post skrapet'
Li ungas: per la ungoj plendas.
Mesaĝon per la ungoj sendas
El sia tombo la poet':

„Alaŭdoj, kiuj en libero
Vin svingas kante al ĉiel',
Memoru en la blua sfero
De via ĝojo pri l'sufero
De mi: alaŭdo en la kel'!

Unu la mond'! kaj ĉies fato
Estas eĉ unu sklavo-sort'!
La mondon trafas ĉiu bato,
Kiun eĉ unu kantistfrato
Suferas pro la justa vort'!

Malsanas ĉiu ĝoj' de l' tero,
Dum ie turk', hispan', aŭ grek',
Aŭ ajna birdo de l' libero,
Bardo luktanta por la vero
Baraktas kun ŝtopita bek'!

Naĝantoj de la firmamento,
Do miksu triston al la tril',
Kaj per kadencoj de lamento
Funebru, ke mi en turmento
Devas vegeti sen sunbril'!"

Ho Nazim Hikmet, skrapu, skrapu,
Obstine skrapu sur la mur',
Kaj la obtuza bruet' eskapu,
Kaj kiel tondro ĝi disfrapu,
La mond' ĝin ekhu per murmur'.

Ĝin portu alaŭdoj al la alto.
Ĝin tintu infana voĉ-arĝent',
Zumzumu bas', rukulu aldo.
Jaztamburistoj en ekzalto
Tamburu al la Okcident':

„Unu la mond'! Kaj ĉies fato
Estas eĉ unu sklav-sufer'!
Malsanas ĝoj', dum turmentato,
Liber-aspira kantistfrato
La muron skrapas sub la ter'!"

(17) El Esperanto-poetoj Kalocsay estis la unua, kiu protestis kontraŭ la enkarcerigo de turka poeto, pacbatalanto Nazim Hikmet.
La poemo poste aperis en la angla, ĉeĥa, hungara kaj vjetnama lingvoj.

5.5. LI NE ESTIS MONAVIDA

La kuracista salajro de Kalocsay ne estis alta, ĉar la tiama ekonomia sistemo kalkulis je tio, ke la kuracistoj akiras kromajn enspezojn de privataj pacientoj. Sed tiujn Kalocsay ne havis, ĉar sian liberan tempon li dediĉis al Esperanto. Pro tio lia edzino ofte grumblis, riproĉante, ke Kálmán oferas multe da tempo por la senutila hobio anstataŭ prizorgo de medicina kariero.

Kvankam Kalocsay havis konsiderindan atingojn ankaŭ en sia medicina agado, tamen oni devas rekoni, ke la edzino iom pravis. La kaŭzo de magra familia budĝeto ofte estis temo en la „hejma tagordo.", ĉar la honorario ankaŭ tiutempe estis sporada fenomeno en Esperantujo. Feliĉe Kalocsay malatentis la lamentadon de la edzino, li ne forlasis la Esperanto-Muzon.

Lian sintenon koncerne Esperanto-honorarion bone montras letero adresita al d-ro W.Verloren van Themaat (1970.01.24.). Li konsentis publikigi siajn poemojn en nederlanda traduko:

„...Rilate honorarion: mi ne estas trodorlotita kaj mi ne faros proceson de kopirajto. Sed se okaze vi fariĝus milionulo dank' al miaj poemoj, partoprenigu min iom el tiu nababa riĉo."

Tamen sporadaj honorarioj – eĉ se modestaj sumoj – de tempo al tempo ebligis por Kalocsay „liuti" en iom pli trankvilaj cirkonstancoj.

En 1978 K. Fajszi faris surbendigitan intervjuon kun la eksedzino de V. Bleier, kiu rememorante pri *Literatura Mondo* diris interalie:

„...Dum la redaktado de LM Kalocsay faris kontrakton kun la eldonisto. Se li ricevis honorarion por tiu laboro, ĝi estis tre malmulta. Tamen Kalocsay eĉ ne konjektis la multajn fortostreĉojn de Vilmos por aperigo de la revuo. Li ne unufoje pruntepreniis monon kaj pagis grandegan interezon, ke li povu ordigi la presadan elspezon kaj alian „bruligan" ŝuldon kaŭzitan de la libroeldonado. Kalocsay nur tion vidis, ke la revuo aperas regule. Cetere li estis tre modesta homo, neniam postulema en honorariaj aferoj. Tamen, kiam Kalocsay petis monon, Vilmos akiris eĉ se li devis elfosi ĝin per la dek fingroj el sub la tero. Vilmos sciis, ke la peto flanke de Kalocsay ne estas senkaŭza. Li povis nur per mono certigi la hejman pacon..."

Vere Kalocsay estis senegoisma persono, neniam interesis lin la financa flanko de sia verkista agado, ĉar li ne estis monavida.

5.6. MULTFLANKECO KAJ LABORKAPABLO

Oni prave nomis Kolomanon Kalocsay "multflanka geniulo", ĉar estis vasta kampo, sur kiu li samtempe laboris kaj ĉie bonrezulte. Lia agado en la medicino estis signifa kaj multflanka: hospitala ĉefkuracisto, doktoro de medicinaj sciencoj, titolita universitata profesoro, esploranto de infektaj malsanoj, verkisto por medicina fakliteraturo.

Hodiaŭ jam oni ne povas akiri konojn sur ia ajn tereno de Esperanto sen renkontiĝo kun la verkoj de Kalocsay. Li estis eminenta poeto, tradukisto, lingvisto, literatoro, recenzisto, redaktoro kaj movadano.

Vere, la pli ol ses jardekoj, kiom Kalocsay agadis en esperanto, estas longa tempo, tamen oni povas nur miri pri la frapanta amplekso de lia verkaro.

Foje intervjuanto demandis Kolomanon Kalocsay, kiel li kapablas tiel multe kaj vastterene labori?

"Tio estas tute simpla afero" - respondis Kalocsay.

"Por la verkado necesas nur hardita sidkarno. Mi ne ripozas ĝis mi finas la parton de la laboro antaŭe preskribitan por mi mem."

Kalocsay diris tiujn vortojn duonŝerce por ne eldiri la ĉefan postulon de la kreado: TALENTO. La neĉiutaga talento de Kalocsay pariĝis kun persista diligento. Li multfoje pasigis noktojn ĉe la skribotablo anstataŭ en la lito. Kiel pensiulo li legis kaj laboris ĝis malfrua nokto kaj la sekvan tagon ellitiĝis je tagmezo. Nur malofte li plendis, ke Esperanto postulas de li kvazaŭ "monaĥan disciplinon".

Multaj supozis, ke Kalocsay verkis kun fulma rapideco. Estas fakto, ke kiam li sidiĝis ĉe la skribmaŝino, en la menso jam estis prilaboritaj la pensoj, la rimoj kaj ritmoj prete saltis el la kapo sur la paperon, ĉar li verkis - kiel ĝenerale la verkistoj - ne nur ĉe la skribotablo. La bele cizelitaj versoj, la logike puraj pensoj en liaj eseoj ne konfesas pri sendormaj noktoj.

Kalocsay havis grandan avantaĝon, ke li kapablis koncentri sian atenton dum la verkado kaj tiam li estis "for de la mondo". Kaj ne nur lia talento estis multflanka, sed ankaŭ lia interesiĝo. Lia memorkapablo estis neordinara. Bone li konis la Esperanto-movadon, historion, la hungaran kaj mondliteraturon, se ne paroli pri la Esperanto-literaturo. Li konis bone la politikajn okazintaĵojn kaj ĝenerale ne troviĝis temo, pri kiu Kalocsay ne sciis paroli.

Kalocsay estis persista en la laboro. Li estis jam 83-jara, kiam foje li diris: *"Oni devas labori eĉ kiam la ĉielo estas nuba super nia kapo. Okazu io ajn, eĉ se ni sentas, ke tuj forflugos el ni la animo - ni devas labori."*

Kaj li laboris senĉese ankaŭ en nubaj tempoj, kiam pluraj el liaj verkoj kuŝis dum jardekoj en tirkestoj.

Kvankam en literaturo oni ne kutimas taksi laŭnombre, tamen lia verkaro - ĉi-libre registrita - meritas atenton ankaŭ el tiu vidpunkto. Tiu ĉe ĉia vorto pli elokvente parolas pri la multflankeco kaj laborkapablo de tiu eminentulo de la Esperanto-kulturo.

5.7 NE POLIGLOTO, SED LINGVO-TALENTULO

Kiam en 1931 aperis la poezia antologio ETERNA BUKEDO – tradukita el 22 lingvoj – multaj supozis, ke Kalocsay estas poligloto.

Foje intervjuanto demandis lin kiel li povas traduki el 22 lingvoj?

Nu, mi ne parolas 22 lingvojn kompreneble. Sed ĉiujn latinidajn kaj germanaj lingvojn mi komprenas – respondis Kalocsay.

Vere, helpe de laŭvorta proza traduko kun la preciza indiko de la formo, li kapablis transplanti poemojn ne el 22 lingvoj sed el 30.

Leteroj atestas, ke Kalocsay ofte petis kaj ricevis ĉi-rilate helpon de amikoj, literaturistoj. Ĉe la tradukado Kalocsay konsultis diversajn vortarojn kaj la proprajn tradukojn kontrolis per alilingvaj tradukoj.

Jen lingvoj el kiuj li tradukis al Esperanto: angla, araba kaj persa, aisiriaj-babiloniaj, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, praegipta, ejro-kelta, estona, finna, flandra, franca, germana, malnovgreka, nederlanda, hebrea, hinda, hispana, hungara, itala, japana, latina, okcitana, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda, vjetnama. Ĉi lastan helpe de rusaj tradukoj.

Kiel gimnaziano Kalocsay lernis la francan, germanan, grekan kaj latinan lingvojn. Krom esperanto li parolkapable sciis la germanan kaj la francan. Li havis pasivan lingvoscion en la angla kaj rusa lingvoj.

„En 1912 mi funde trastudis la gramatikon kaj vortaron de Ido. Tiam mi sciis Idon same bone kiel Esperanton. Sed mi neniam partoprenis en la Ido-movado, nek verkis ion en Ido: mia interesiĝo estis pure lingva kaj ĉesis post la ellerno de mia Ido-libro" – respondis Kalocsay al la demando de intervjuanto. (AD p.32)

Dum tradukado Kalocsay alproprigis sennombrajn vortojn kaj ekkonis la strukturon de kelkaj lingvoj, almenaŭ tiom, ke helpe de italaj kolegoj li kapablis traduki eĉ la INFERO-n de Dante.

Koncerne la italan lingvon estas interesa mencii, ke foje Kalocsay vizitis Italion kaj en iu kunveno li diris salutparolon itale. Baldaŭ li rimarkis, ke la publiko ridetas kaj ne komprenas lin. Poste evidentiĝis, ke Kalocsay parolis en la lingvo de Dante.

Kvankam Kalocsay en strikta senco de la vorto ne estis poligloto, tamen estas nediskutebla fakto, ke li posedis neĉiutagan lingvotalenton. Escepte Grabowski neniu ambiciis traduki al Esperanto la diversnaciajn kaj diverstempajn poemojn tiom grandskale kiel Kalocsay. Kiel poemtradukanto ne nur kvante, sed – pro la intertempa evoluo de Esperanto – ankaŭ kvalite Kalocsay staras en la unua loko.

5.7.1 Nekonata lingvo-kreado de Kalocsay

Enkonduko

Kolomano Kalocsay, jam konata E-poeto, mem kreis provon de pra-Esperanto en 1931 kaj laŭ sia aserto lernis Idon, kiun li forlasis, eksciinte ke ĝi tro ofte transformiĝas (kp *Hungara Heroldo*, 1930).
S-ino Ada Csiszár, kiu okupiĝas publikigo- kaj dokumentigocele pri la postlasaĵo de K.K., trovis en ĝi nedatitan folion kun provo en stranga lingvo — verkita sur oficiala papero de la hospitalo, kie K.K. laboris de 1920 ĝis 1966. Temas pri poemo, evidente pri traduko de la E-himno "La Espero".

Analizo de la teksto

Artikolo: *la*.
Adjektivoj: *novi, forti, facili, eterni, sankti, obstini, newtrali, grandi, diligenti, laci, efektivi, beli, rapidi*.
Substantivoj: *monde, sente, voke, vente, loke, glave, sange, familie, harmonie, mure, jare, popole, bare, lingve, fundamente, frate, ronde, kolege, labore, pace, songhe, home, signe, espere, afere*.
Verboj: *venat, flugat, soifat, tirat, militat, promesat, starat, dividitat, saltat, amat, batat, komprenat, konsentat, benat, kolektat, batalat, kreskat, esperat*.
Konjunkcioj: *ey* (kaj), *sed*.
Adverboj: *nun, ne*.
Numeraloj: *un* (unu), *mil*.

Kőzkórházi Orvostársulat
Budapest VIII, Gyulai-Pál-utca 2.

En la mondem venit novi Sente,
Tra la monde irat forti voke,
Per flugiles de facili vente
Nun ab loke fluguy ol al loke.
Ne al glave sangem soifanti
Li la homim tira familiem.
Al la mond' eterno militanti
Li promesat sankti harmoniem.

Forto starat mures de miljares
Inter la popoles dividitis.
Sed dissaltor la obstini bares
Per la sankti ame disbatitis.
Sur newtrali lingvi fundamente,
Unqui alquim fratum komprenantis.
La popoles iskor en konsente
Un familik grandi rond' omquantis.

Ci noy diligenti kolegare
En labore paci ne laciskor.
Til la beli songhe del homare
Por eterni ben' efektiviskor.
Sub la sankti signi dèl espere
Kolektiska paci batalantes
Ey rapidum kreskor la afere
Per labore de la esperantes.

Aliaj indik-vortoj: *unqui* (iu), *alquim* (alia), *omquantis* (ĉiuj) *ci* (tiuj ĉi).
Personaj pronomoj kaj posedaj adjektivoj: *li, ol* (ĝi), *noy* (= nia).
Gramatikaj finaĵoj: *-e* (-o), *-m* (-n: nur en singularo uzebla), *-i* (-a), *-um, -o* (-e), *-s* (-j), *-a(t)* (-as), *-it* (-is), *-uy* (-u) *-or* (-os).
Prepozicioj: *en, tra, per, ab* (elde), *al, de* (*de + la = del*),

inter, sur, til (ĝis), *sub.*
Afiksoj: *-ile* (-ilo), *-are* (= -aro), *-iskat* (-iĝas, uzebla ankaŭ memstare), *-ik* (-eca), *-anti* (-anta), *-iti* (-ita), *dis-* (dis-)

Specialaj reguloj: la adjektivo ne estas ĉiam akordigata kun la koncerna substantivo (ĝenerale ĝi akordas nur kiam la adjektivo iom foras el la substantivo) nek plurale nek akuzative.
Ne ekzistas plurala akuzativo — la nominativo oficas tiufunkcie.

Hipotezoj

Tute certe ne temas pri lingvo derivita de Ido. La vortaro estas esence Esperanta, sen iu ajn trajto de Ido-vortaro. Ankaŭ la afiksoj kaj ties memstara uzo parolas pri Esperanto.
Iom influis de Saussure, ĉefe ĉe *ey* (kaj), *til* (ĝis, cetere ankaŭ Ido-formo), *w* (ŭ) kaj *-uy* (-u).
Tamen la ĝeneralan aspekton influis ĉefe Novial (temas pri la finaĵoj -e por la substantivo, *-i* por la adjektivo, kaj la verba finaĵo *-a(t)*). Fine, ankaŭ la pluralo (*-s*) estas Jespersena, same kiel la akuzativo. La finaĵo adverba *-um* povus esti Noviala (*-im*).
La finaĵo *-o* samfunkcia povus esti volapuka restaĵo.

Ni rimarkas tamen, ke K.K. en tiu ĉi traduko ofte aplikas (aŭ ne aplikas) siajn formojn. Li mem hezitas inter *-a* kaj *-at* (-as), *-um* kaj *-o* (-e), *li* kaj *ol* (ĝi), ktp. Ankaŭ la finaĵon *-i* (-a) kelkfoje anstataŭas *-ik*.

Konkludoj

Verŝajne temas pri provo ellabori praesperanton (kiun li aperigos pli malfrue, en 1931, en cetere tute alia formo). Ni havas el tiu ĉi teksto bonan enrigardon en la manieron, laŭ kiu artisto ne nur forĝas proprajn vortkunmetojn, sed eĉ proprajn vortojn mem.

Dankoj

Estu kore dankata s-ino Ada Csiszár, kiu permesis la publikigon de la poemo de K.K., kiun ŝi mem malkovris en la K.K.-arkivo.

Tazio CARLEVARO

(Repr. el Planlingvistiko 1982, n-ro 2, p.1-5)

Traduko de la zamenhofa poemo: Preĝo sub la verda standardo

Al Du, ho potenci, senkorpi mistere,
Ho Forte, la mondem reganti,
Al Du, grandi fonte del ame ey vere,
Ey fonte de vive konstanti,
Al Du, quim ya omquis alqualo prezentat,
Sed omquis egalo en koro Dum sentat
Sinjore qui kreat, Sinjore, qui reghat,
Hodio ni preghat.

Al Du ni ne venat kun krede naciki
Kun dogmas de blindi fervore:
Silentat nun omqui disqut' religiki,
Kaj regat nur krede de kore.
Kun ci, qui es semprum che omquis egali,
Kun ci, la pley veri, sen trude batali,
Ni staras nun, files de l'toti homare
Yen che Doy altare.

Homarem Du kreit perfekto ey belo,
Sed li dividiskit batalo,
Popole popolem atakat kruelo,
Frat fratem atakat shakalo.
Ho irgi qui es Du, Du forte misteri,
Auskultoy la vochem del preghe sinceri,
Redonoy la pacem al la infanare,
Al toti homare!

Ni jurit laborey, ni jurit bataley,
Ey por reunigi l'homarem,
Subteny nin, Forte, ne lasus ni faley,
Sed lasus nin venkey la barem.
Donacoy Du benem al ci noy labore,
Donacoy Du fortem al ci noy fervore,
Ke semprum ni konter atakas sovaghis
Nin tenu kuraghis.

La verdi standardem tre alti ni tenor,
Li signa la bonem ey belem.
La Forte misteri del mondo nin benor,
Kaj noyim atingor ni selem.
Ni inter popoles la mureyh detruor,
Ey ili ekkrakor kaj ili ekbruor
Kaj falor por sempre ey ame ey vere
Ekregor sur tere.

*

(La lasta strofo de la poemo mankas en la manuskripto de Kalocsay.)

5.8. MUZIKEMO KAJ MUZIKAMO

En la Esperanta mondo malmultaj scias pri la muzikemo de Kalocsay, kiun li heredis de la patra familio. La patro bonege ludis violonon kaj junaĝe li faris kelkajn kantojn.

Kalocsay dum la studentaj jaroj studis la harmoniosciencon, krome li lerte ludis ankaŭ fluton. Kiel la iama amiko L. Györi-Nagy rakontis, Kolomano antaŭ muzikteatra vizito helpe de tiu eta blovinstrumento klopodis interamikiĝi kun la aŭskultotaj melodioj, ĉefe se temis pri Wagner-komponaĵoj.

Kvankam Kalocsay en la muziko ne estis erudiciulo, tamen li kapablis komponi kaj muzikigis kelkajn poemojn. Liaj komponaĵoj estas sonbendigitaj kaj gardataj en la KAL-Ĉi dokumentaro. Interpretas ilin s-ino K. Váradi per fortepiano kaj Gy. Fügedi per violono. Pri lia - eble la unua - kompona agado informas nin komencita letero skribita al Zamenhof. Li volis peti permeson por muzikigi la poemon: *Ho mia kor'*.

La leteron verŝajne ne finis Kalocsay kaj ne turnis sin al Zamenhof, tamen li faris la komponaĵon. La manuskripta muziknoto ne estas datita kaj ne troviĝas indikoj pri ĝia publikigo, almenaŭ la BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO de P. E. Stojan (aperinta en 1929) ne registris ĝin.

Grandan sukceson portis al Kalocsay la *Maja idilio*. Por la ĉarma infankanteto li komponis ankaŭ melodiojn kune kun Mihály Sárossy. Pri la originala teksto skribis N. Hohlov: "En la *Maja idilio* la ondoj de l' triloj kaj tintiloj brilas kokete kaj ĝoje, kvazaŭ saturitaj per la radioj de hele printempa suno por dece akompani la dolĉan majon de la unua amo."

(LM 1924/73)

Kaj el la taksado de L. Tárkony (en DE PAĜO AL PAĜO, p. 68): "Ĉar la homo nur dum ludo povas esti feliĉa kaj la infanoj pli bone konas la vojon al feliĉo... Knabaĝaj rememoroj vekiĝas en la poeto: forgesitaj ritmoj, delonge aŭditaj kantoj. La ritmo kaprice ŝanĝiĝas, la rimoj petole interplektiĝas: ludas ankaŭ la versoj. Esperanto ankoraŭ neniam sonoris kun tia plena formarto; tamen samtempe kun tia facileco kaj fleksemo, kun tia preteco kaj samtempe kun tia senartifikeco. Unua kaj unika trezoro estas la lingvo de l' *Maja idilio*. Unue ekparolas en nia lingvo la naiva, simpla kaj infana ĉarmo..."

Vere, la *Maja idilio* de Kalocsay kvazaŭ sugestis sian scenigon, kiu poste ankaŭ realiĝis.

Dum la *Nederlanda Esperanto-Kongreso* en Hilversum (1934) - je la iniciato de Julietta Baudin - estis prezentita la *Maja idilio*. Kun granda sukceso enscenigis kaj reĝisoris ĝin Julio Baghy, kiu tiutempe restadis en Nederlando. Por tiu prezentado Kalocsay tralaboris la antaŭe komponitajn melodiojn.

En *Literatura Mondo* 1932/50-51 aperis originala poemo de Kalocsay: *Kanto de Vagabondo* kun muziknotoj.[18] Pri ĝi L. Tárkony skribis: „La Kanto de Vagabondo, unika freŝa floro de nia liriko. Kalocsay mem muzikigis ĝin: jen nova surprizo. Lia prothee diversforma genio malkaŝas al ni novan flankon: li estas talenta komponisto. *La Kanto de Vagabondo* meritas la plej vastan disvastigon ĉe nia publiko ne tre kutimigita al bonkvalitaj originalaj Esperanto-muzikaĵoj..."

M. Sárossy la unua Esperanto-kanzonisto, ofte prezentis tiun ĉarman kanton kun gitarakompano. Cetere ankaŭ Sárossy komponis muzikon al la poemo.

Vere, la freŝe pulsanta ritmo en la vortoj kaj en la muziko estus inda por gramofondisko, flugfolio kaj kasedo, por ofta deklamado kaj kantado.

*

La skolta ĵamboreo en 1933 estis aranĝita en Gödöllő (Hungario). Ĉi-okaze P. Balkányi verkis *Esperantistan Skolthimon,* Kalocsay komponis la muzikon. Ĝi aperis flugfolie. En 1966 la tekston sub titolo *Junulara marŝo,* Balkányi tralaboris kaj dum la TEJO-Kongreso (en Pécs, 1966) ĝi estis kantata kun la muziko de Kalocsay. La marŝo atingis grandan sukceson ĉe la junularo.

*

La jubilean libron de Baghy-Kalocsay (ARĜENTA DUOPO, 1937) kompletigas 34-paĝa kajereto kun muziknotoj. Ĝi entenas la esperantigitan muzikigitan poemon de Tennyson: *Maud.* La tradukinto kaj komponisto estas la sama persono: K. Kalocsay.

La muzik-kajero entenas la originalan poemon de Kalocsay: *Kisoj* [19]. Al la poemo li komponis ankaŭ la melodion.

La kajero entenas ankaŭ la muziknotojn de *Maja idilio,* laŭ la rekomponitaj melodioj.

*

Kalocsay havis tre agrablan tenoran voĉon. Kelkfoje li amuzis la intiman amikaron improvizanta ian filmmuzikon ĵus prezentitan en la televida dissendo.

Tiuj komponaĵoj de Kalocsay ne sufiĉas por objektiva taksado: kiom da laŭroj li estus rikoltinta, se li elektus vivocele la muzikarton. Estas certe, ke talentaj Esperanto-poetoj kaj lingvistoj povas multe pli efike utili al Esperanto ol komponistoj eĉ plej geniaj. Feliĉe, ke Kalocsay el la diversaj artoj kultivis la literaturon.

---

[18] La poemo meritis la Unuan Mencion de la X-aj IFL en Vich, 1924.
[19] La poemo gajnis la Unuan Premion de „Naturaj Floroj" en la X-aj IFL en Vich, 1924.

Sceno el la prezentado
en Hilversum

La knabinoj faras rondon
kaj kantas;
Ŝafideto, ŝafidet'...



„Ho, mia kor'..."

Komponaĵo de Kalocsay
al la poemo de Zamenhof



Melodioj al *Kisoj*

5.8.1

Kanto de Vagabondo

Tempo di marcia, allegro.



La polv' sur mia plando :
Jen estas mia lando.
Kaj lito mia : ĉies ter',
Kovrilo mia : la vesper'.
Birdar' al mi dejoras
Per amuzanta ĥor',
La nuboj min priploras,
Se tuŝas min dolor',
Hej, hola ! Kia granda ĝoj' :
Facila vag' sur landa voj' !

Mi vagas preterfluge,
Sencele kaj senjuge,
Kaj al knabino, al amik'
Neniam ligu min radik' !
Radiko ja profunde
Penetras èn la ter'
Kaj ĝi ŝiriĝos vunde.
Ni ŝparu pri l' sufer' !
Hej, hola ! Kia granda ĝoj' :
Ensola vag' sur landa voj' !

En blu' de malproksimo
Sin banas la animo,
Dum inter prema ĉambra lim'
La koron kovras rauca ŝim'.
Filistro-invalido



Do putru en la niĉ' !
Mi saltas el la sido
Kriante pro l' feliĉ,
Se vokas min por granda ĝoj',
Por nova vag' la landa voj'.

Ĉu lumas sort', ĉu nigras,
Mi prifajfante migras.
Kaj kiam kontraŭ la stomak'
Malsato venas por atak' :
Dum la stomak' eksonas
Grumblante, kun riproĉ',
Mi primon fajfe donas
Al ĝia basa voĉ'.
Hej, hola, kia granda ĝoj',
Eĉ la malsat' sur landa voj' !

Kaj se pleniĝis listo,
Kaj venos la Falĉisto :
Post mi edzino kaj infan'
Ne ploros orfe kaj sen pan' :
Mi falos en la neĝo :
Adiaŭ, bela vag' !
Kaj la primorta preĝo
Nur eĥos korva grak'.
Anoncos poste hunda boj'
Kadavron sur la landa voj'.

5.8.2 *„Familia idilio"*

Kiam Kalocsay en la tridekaj jaroj tralaboris la muzikon de la ĉarma infankanteto *Maja idilio*, dum semajnoj li frapadis la pianoklavojn kaj kantzumis: *ŝafideto, ŝafidet'...*



La mulfoje ripetitaj melodioj elĉerpis la toleremon de lia edzino. Kiam ŝi jam ne povis plu toleri la „bruaĉon", ŝi ultimatis:

– *Kálmán, elektu! Aŭ mi, aŭ tiuj naŭzaj ŝafidaĉoj!!!*

Kalocsay elektis la edzinon.

5.9. LIAJ BEST-AMIKOJ

5.9.1. Enkonduko

Kalocsay tre ŝatis, eĉ amis la bestojn. Kiam li havis eblon, li volonte vizitis la zoologian ĝardenon. Pri tia okazo rememoris Waringhien en la volumo NI kaj Ĝi p. 44:

„... Dum unu el miaj restadoj en Budapeŝto mi havis okazon viziti kun amiko Kalocsay la zoologian ĝardenon, kaj mi memoras, kiel la granda poeto kaj mi sidis dum preskaŭ tuta horo antaŭ la vasta kaĝego de la malgrandaj simioj, kontentigante niajn okulojn per admirinda movlerteco de la ceboj, titioj kaj ateloj, iliaj ludoj kaj kuroj, la senerareco de iliaj saltoj kaj la kaprica girlando, kiun iliaj ludoj kaj kuroj, la senerareco de iliaj saltoj kaj la kaprica girlando, kiun iliaj malpezaj membroj plektis en la aero..."

G. Waringhien rakontis, ke dum la 28a UK en Vieno en konfitejo li matenmanĝis kun Kalocsay, kiu dividis sian manĝaĵon kun la almozpetantaj paseroj.

Parolante pri la bestoj – kato, kanario, hundo, papago – kun kiuj Kalocsay ligis amikan rilaton – en la unua loko oni devas prezenti la plej favoratan beston: *Lurkó.*

5.9.2. Lurkó, LÓKÖTŐ-PENTELEI

Pri la nomo de tiu belega dobermano, kiu okupis vastan lokon en la koro de Kalocsay:

PENTELEI estas nomo de la bredisto. LÓKÖTŐ estas kavazaŭ la familia nomo de la hundo, Laŭ originala senco ĝia signifo: ĉevalŝtelisto. Nuntempe (oni ŝtelas jam aŭton) tiu epiteto estas uzata metafore: sagaca, ruza bubaĉo. La aliteracion ŝatanta Kalocsay donis al la hundo la baptonomon Lurkó. Ĝi estas karesnomo de petolema knabeto.

Lurkó plurfoje gajnis medalon en beleckonkursoj. En ĝia kvalifika atesto oni legas:

„Matura, nigra virhundo kun karakteriza kapo. Belaj, malhelaj okuloj, bona dentaro. Forta ostaro, sufiĉe larĝa torako, rektlinia dorso, brila hararo. Elasta muskolaro kaj paŝado, tre nobla aspekto."

El faklibroj kaj propraj spertoj Kalocsay akiris fakan scion pri hundoj precipe pri dobermano. Dum kelkaj jaroj li estis prezidanto de la *Societo de Doberman-posedantoj.*

Kalocsay bone zorgis pri Lurkó. Kiel vera amiko de bestoj li ne suferigis la hundon en la malvasta urba loĝejo. Apud la *Hospitalo Szent László* troviĝis subĉiela staplejo, kie kontraŭ luprezo Lurkó liĥere kuradis, saltadis, pelis katojn kaj ratojn. Fine de la labordaŭro ĝi akompanis hejmen sian Mastron.

Kiam Lurkó grave malsaniĝis, Kalocsay enhospitaligis ĝin kaj kune kun la kolegoj aplikis ĉiujn terapiojn por savi la beston, sed ĉiu klopodo fiaskis. Tiutempe ne estis medikamento kontraŭ sopornico. Lurkó vane rigardis kun petegaj okuloj al la adorata Mastro, li ne povis helpi.

„Estis korŝira sceno – rakontis poste la vidvino de Kalocsay – kiam Kálmán trabrakumis la karan hundon, kaj li ne nur larmis, sed ploregis pro la perdo de bona amiko."

Kalocsay per soneto honoris la memoron de Lurkó.

La morto de Lurkó

Vi mortis, Lurkó, mia hundo kara,
kiel ni dronis en melankolio,
kiam al mi kaj mia familio
vi adiaŭis per rigard' malklara!

Sed nin konsolas en ĉi perd' amara,
ke vi jam kuŝos pace sub tilio,
kiam per sanga skribo notos Klio,
ke Mars galopas tra la land' hungara.

Kiel vi hojlis ĉe la abomena,
sinistra hurlo de l'alarm' sirena!
Vi dormos jam, ĝi vin ne embarasos.

Kiam nin tretos la fatalo sterna,
vi estos for, spirito via ĉasos
senzorge sur la ĉasokamp' eterna.

(1944)

(20) Ĝi aperis en VERSOJN ONI NE AĈETAS (1992)

Mi estas PENTELEI-LÓKÖTŐ Lurkó

Promenado kun la Mastro
kaj ties patro

5.9.3. La hundoj de REĜO LEAR

Inter la postlasitaj manuskriptoj de Kalocsay troviĝas listo de diverspecaj hundoj. Foje li mencilis tiun kompilaĵon jene:

„Min devigis Shakespeare por esperantigi la nomojn de la hundrasoj, ĉar tiom multspecajn posedis Reĝo Lear."

Hundrasoj 2.

VI. DOGO (Canis familiaris molossus) HU: Szelindek
1. Dana (aŭ Germana) dogo
2. Angla dogo aŭ mastifo
3. Boksero
4. Angla buldogo
5. Franca (nana) buldogo (lukshundo)
6. Mopso (lukshundo)

VII. GRIFONOJ (Canis familiaris gryphus) HU: Pincs
A. Grandaj grifonoj
1. German grifono aŭ pinĉero (Pintscher, Schnauzer, Rotweiler)
2. Doberman-pinĉero
B. Malgrandaj grifonoj
1. Glathara grifoneto (ratlero)
2. Splithara grifoneto
C. Luksaj grifonoj
1. Brusela grifoneto
2. Nana brabanthundo
3. Malta grifoneto
4. Simiogrifoneto
5. Germana nana pinĉero
6. Japana pinĉino
7. Ĉina palachundo aŭ pekinezo

VIII. DOM- aŭ KORTHUNDOJ (Canis familiaris domesticus)
A. Ŝafhundoj
1. Germana ŝafhundo aŭ luphundo (Schäferhund, Wolfhund)
2. Skota ŝafhundo (collie)
3. Hungara ŝafgarda hundo aŭ komondoro
4. Hungara ŝafogvida hundo: (a/pulihundo; b/pumihundo)
5. Hungara korthundo aŭ kuvaso
B. ŜPICOJ
1. Ladogalaga torfhundo
2. Germana ŝpico
3. Tonguza ŝpico
4. Eskima hundo aŭ sledhundo
5. Ĉaŭĉaŭo (ĉina ŝpico)
6. Nana aŭ Pomerania ŝpico (lukshundo)

Fragmento el la „Hundvortareto"

5.9.4 Mica

Kalocsay en 1968 skribis kondolencan leteron al Marjorie Boulton:

... Iom malfrue, sed kredu, ke tre sincere mi sendas la esprimon de mia kunsento pro la forpaso de la kara Montevideo, Fatala fakto estas, ke niaj bestamikoj havas multe malpli de vivdaŭro ol iliaj mastroj. Ankaŭ mi havas plurajn funebrantojn: hundojn, papagojn eĉ unu katinon, pri kiu mi verkis ĉirkaŭ 1940 la sekvan soneton:

La katino fidas (21)

Nia katin' kaŝinta zorgopleje
idetojn siajn antaŭ l'murda bapto,
alportis ilin ĵus per buŝa kapto,
kaj metis sur la plankon kuireja.

Ŝi nin rigardis kaj miaŭis vee,
sciigis nin pri l'bedaŭrinda fakto,
ke ial elĉerpiĝis ŝia lakto,
do nun ni devas helpi panacee.

Katino, nin mirigis ĉi sagaco,
sed mi subite hontis kun agaco
pri via fid' je l'homa ĉiopovo:

Ho, ne eksciu, ke l'potenca mago,
la homo, ne kapablas je eltrovo
de panaceo por la propra plago!

(21) En Brita Esperantisto (1976, nr-ro 814, p. 174) oni legas, ke en Barlastono en 1976 dum la kursoj, inter pli gravaj poemoj, Marjorie Boulton voĉlegis ĝis tiam nekonatan soneton de Kalocsay, kiun d-rino K. Hall poste tradukis en la anglan. La originala soneto aperis en la volumo: VERSOJN ONI NE AĈETAS (1992).

Surstrata interkonatiĝo en
Varsovio dum la 29a Uk en 1937

Kun la amata kanario

5.9.5. *La papago kaj la skribmaŝino* (22)
(Dediĉo al Karlo, papago de Kalocsay)

Mi tajpas miajn versojn en ĉambro de amiko.
Scivole sed singarde papago Karĉjo venas,
la tablon ĉirkaŭiras, tre seriozmienas,
eksperto ĝi aspektas, sperta pri mekaniko.

Mi ŝovas mian manon embuske. Tuj paniko
prabirda ĝin ekkaptas, forflugas ĝi, blasfemas
kun kora indigniĝo. Sed longe ĝi ne emas
grumbli kaj jam sidiĝas sur mia jakmaniko.

Soneton jam skribitan laŭtlegas mi deklame,
metalbuton-okuloj min fiksas preskaŭ ame;
kaj dum la ritmo tajdas, sonoras verskadenco,

en ia praparfuma, prahistoria flirto,
en anim-interŝanĝa, babila konfidenco
ŝajnas sin ekkompreni la homo kaj la birdo.

Lajos TÁRKONY

La papago Karlo

(22) La poemo sub titolo *Konfidenco* aperis en la poemvolumo SOIFO (1964).

5.10. LA INSTRUANTO

Multaj riproĉis Kolomanon Kalocsay, ke li ne instruas Esperanton, ne edukas poetojn, lingvistojn por la futuro, eĉ kiel severa kritikisto li ofte fortimigas novulojn, eble talentajn.

Estas fakto, ke Kalocsay ne gvidis tiom da lingvaj kursoj kiel ekz. J. Baghy aŭ P. Balkányi. Li ne gvidis seminariojn, kie ambiciuloj povus alproprigi la metion de versfarado, tradukarto kaj redakta laboro. Ĉion ĉi vere ne faris Kalocsay, sed li faris multe pli ankaŭ ĉi-terene. Li verkis lernolibrojn ne nur por mezgrada alproprigo de la lingvo, sed lia PLENA GRAMATIKO (verkita kun G. Waringhien) kontentigas ankaŭ la plej pretendemajn. La poeto-kandidatoj ricevis de li vojmontrilon en PARNASA GVIDLIBRO (verkita kun G. Waringhien kaj R. Bernard). El lia LINGVO, STILO, FORMO kaj el DOMFABRIKO (ĉi-lasta verkita kun A. Csiszár) la esperantistoj povas ĉerpi valorajn instruojn.

Kalocsay ne nur transdonis perfektigitan lingvon, sed ankaŭ instigis literaturan agadon per tio, ke li certigis eblon por aperigo. Oni vere menciadas *Literaturan Mondon* kiel "publikan debutejon de junaj verkistoj".

La eminentuloj de la Esperanto-poezio neniam hontis konfesi la influon de Kalocsay al sia literatura verkado. W. Auld intervjuita diris: "... La poeziaj verkoj de d-ro Kalocsay, el kiuj la volumo STREĈITA KORDO estas la ĉefa originalaĵo, montris al mi la nivelon, al kiu mi, debutanta poeto, devis strebi; kaj longjara studado de tiuj geniaj verkoj sendube multe kontribuis al la formiĝo de mia propra stilo. Mi estas do ankoraŭ unu gregano de tiu mirinda paŝtisto!..." (LSS 1958/2, p. 27)

El orfo fariĝos la plej bona soldato, diras hungara proverbo, kion oni povas rilatigi ankaŭ al poeto- kaj verkisto-kandidatoj. Vere ne estas la unusola kaj la plej efika instrumento, se la edukanto gvidas la manojn spasme premantajn la plumon. Kalocsay konsciis, ke la plej utila leciono estas: *lerni el propraj eraroj*. Kia unika kaj instrua lernolibro estus kolekto de mallertaj, plumpaj kaj eĉ konfuzaj frazoj, elektitaj el la manuskriptoj venintaj al la redaktoraj manoj de Kalocsay! La tekstoj stile reviziitaj, plibonigitaj de Kalocsay povus servi kiel valora instruilo, ĉefe se ilin kompletigus klarigaj notoj, analizoj kaj kompetentaĵoj.

Henri Vatré skribas (AD p. 112): "Per sia senlaca ekzemplo kaj fervora vartado al ĉiu burĝonanta talento, Kalocsay sin montras ankaŭ la plej eminenta edukisto de l' nova generacio. Li estas la eterna serĉanto de kaŝitaj valoroj. Oni tuj sentas ĉe li la profundan respekton kaj ĝustan takson al la laboro de aliaj. Li ĝojas pri ĉiu sukceso, pri ĉiu nova paŝo, pri ĉiu promeso por la estonto... Ĉu por la propra laboro, ĉu por tiu de alia, li neniam domaĝas la tempon kaj scion en la artzorga polurado de la manuskriptoj. Por lia spirito neniu peno estas tro granda, neniu problemo tro dorna, neniu solvo tro fora, se ĝi levas la nivelon de la verko. Kiom da debutantoj ŝuldas al li sian sukceson, kiom da malcertaj ekiroj li firmigis, kiom da timemaj voĉoj li kuraĝigis! Kaj lia gusto, same kiel lia juĝo, ĉiam trafas senerare..."

Kompreneble la "reviziitaj" poetoj, verkistoj ne ĉiuj akceptis ĝoje la helpon de l' kompetentulo. Foje Kalocsay en poemo analizis la sintenon de la poetofrato Baghy, kiu en la 41-a poemo de LA VAGABONDO KANTAS pikadis lin. Jen respondo de Kalocsay:

(P1) Letero al "La Vagabondo" (23)

...
Kio estas la motivoj
de l' malam' kolera?
Nu, ĉi tio longe estis
al mi tre mistera.
Sed mi nun jam klare vidas:
kiel ajn absurdas,
vi ne povas min pardoni,
ke vi al mi - ŝuldas.

Mi ĉe via skrib' unua
devis tuj rimarki,
ke ĝarden vi estas,
kiun oni devas sarki.
Do mi sarkis diligente
kaj kun multa peno,
kaj konfesu, ke per tio
gajnis la ĝardeno.

Kiom ofte mi korektis
viajn stilajn stumblojn,
vi per tio gajnis laŭrojn,
kaj mi - viajn grumblojn.
Ĉar vin fiereco gvidis,
kaj obstina vanto,
min - ke plej perfektan verkon
havu - Esperanto.

Art' por arto, bel' por belo,
jen kio min gvidis,
dum mi apud viaj verkoj
cerbumante sidis.
Kaj nun diru do en prozo,
diru do en rimoj,
ĉu pro tio viaj verkoj
iĝis do - viktimoj?

Nur mi iĝis la viktimo,
mi malŝparis penon,
vi - profitis, kaj eksentis
al mi abomenon.
...
(1933)

Dum la poemkovo kvietiĝis la kolero de Kalocsay kaj tiun ĉi indignan versaĵon li ne sendis al la adresito. Li ne volis akrigi la tiutempan situacion estiĝintan pro neologismoj.

La rifuzitaj kandidatoj baldaŭ rimarkis, ke Kalocsay ne juĝas la verkojn per la sama mezurilo. Tio estis vera, sed ne kiel tion la ofenditoj opiniis. Kalocsay neniam estis influita de simpatio aŭ antipatio, sed li konsideris la aĝon de la aŭtoro. Li pli toleris mallertecon ĉe junaj debutantoj ol ĉe mezaĝaj aŭ oldaj "bardoj". Li konsideris, ke en la junaj kandidatoj poste eventuale kreskos la ĝermo de la talento.

Kelkaj el la "ofenditaj" poetoj, verkistoj ankaŭ laŭte eldiris, ke la ĉefpoeton gvidas iaspeca "ĵaluzo" aŭ "envio", ĉar li volis regi sola en la regno de poezio. Ankaŭ tiu akuzo estis kruda eraro. Kalocsay havis la intencon, ke la Esperanto-poemoj - eĉ se ili ne povas konkuri kun la nacilingvaj - estu almenaŭ ĝueblaj el arta vidpunkto. Pri senenvio konfesas la vortoj de Kalocsay, respondante al la demandoj de P. Balkányi (REI 1966, sept. p. 261). Li diris interalie:

"Kredu, ke mi ĉiam kun granda amo rigardas viajn fortostreĉojn kaj jubile vidas vin, novajn Parnas-ascendantojn, grimpi pli kaj pli supren..."

Tiun konversacion Kalocsay finis per citaĵo el la poemo de S. Petöfi, kiun li dediĉis al sia poetofrato J. Arany:

"Kion mi komencis, kaj ne sen honoro,
Vi, amiko(j), faru pli en plena gloro!"

(23) Poste aperis en la volumo VERSOJN ONI NE AĈETAS, p. 9-13.

5.10.1. La ekzemplo-donanto

Miaj publikaj stilprovoj estis nuraj prozaĵoj.

Sed kiel "Meistersinger von Nürnberg", mi dorlotis prozodiajn emojn en mia brusto. Laŭ mia tiama konsidero estis tute nature: elekti Kolomanon Kalocsay kiel unuan juĝiston de miaj freŝbakitaj eksperimentoj. Mi sendis miajn "kreaĵojn" al li. Mi uzis la adjektivon "freŝbakitaj", sed estus pli ĝuste skribi: "malbakitaj" aŭ "krudaj".

Der Zauberlehring (24) de Goethe estis objekto de unu el miaj modestaj klopodoj. Tiam ankoraŭ mi ne sciis, ke la poemo antaŭe jam estis tradukita far Kalocsay kaj kiel brile. Al mia traduko la respondo de Kolomano alvenis post kelkaj tagoj. Ĝi estis bela ekzemplo de bonvola konsideremo, tamen kun severa objektiveco, diplomata glateco kaj eleganto. Li solvis majstre sian taskon: ne fortimigi, sed kuraĝigi la naivan kandidaton, tamen priatenti la postulon de poezio. La letero finiĝis per la vortoj: "Sed Zauberlehrling???"

Per miaj animaj okuloj mi vidas lian duone kompatan, duone ludeman mansvingon. Tamen la pravon de liaj konsiloj mi ekkomprenis nur pli poste, kiam mi jam legis la superban Kalocsay-tradukon.

D-ro Georgo KARCZAG
(Stockholm, 1979)

(24) La sorĉlernanto

5.10.2 Kiel fondis Kalocsay la Japanan skolon

Tio okazis eble en 1951, ke mi volis studi la verkon PARNASA GVIDLIBRO, kaj mi klopodis enmanigi ĝin al mi. Jes, por mi necesis posedi arton "Kiel fariĝi poeto". Nur ĝian titolon mi sciis jam en la tridekaj jaroj, sed tiam, kiel multaj japanaj konsciencaj junuloj, mi estis fervora laboranto de kontraŭmilita movado kaj mi ne povis atenti esperantajn aferojn. Nur post la dua mondmilito mi komencis okupiĝi per la Esperanto-movado kaj tio ĉi postulis de mi, ke mi fariĝu poeto. Iom stranga esprimo, mi scias, sed la situacio devigis min, ke mi kovu "eminentulojn" en diversaj kampoj, kiuj povas reprezenti nian movadon, kaj mi kredas, en tiu laboro mi iom sukcesis. Antaŭ ol trudi al aliaj tiun penigan laboron, mi mem estu tia, mi pensis.

La japana poezio ne estis fremda al mi. Nu mi konfesas, ke kiam mi estis juna aŭ tro juna, eble en la aĝo de 16 aŭ 18 jaroj, mi apartenis al malgranda literaturista grupo kaj mi estis iomete konata, ĉar antaŭ du aŭ tri jaroj oni reproduktis diversajn poemarojn serie kun komuna titolo: ANTOLOGIOJ DE SOCIALISMA TENDENCO. En du volumoj troviĝis miaj poemoj. Pri unu antologio mi eksciis post kelkaj jaroj de la apero, sed pri la dua mi sciiĝis laŭ la letero de la eldonisto.

Nu ni reiru al la temo. Ĝis tiam en la japana esperantistaro regis tendenco, iniciatita ĉefe de Osaka Kenzi (Kenĵi Ossaka laŭ lia propra skribo), traduki 31-silabajn utaojn en 4 versoj arbitre dividitaj kaj rimi duope, kaj 17-silabajn hajkojn en tri versoj simile, tute neglektante la aŭtentikan formon kaj silabnombron kaj foje kun tro multaj ŝtopiloj pro la knedita necesa rimedo. Mi havis grandan malkontenton je tia metodo kaj serĉadis konvinkan apogilon por mia opinio, kiu postulis traduki kiel eble fidele al ĝia aŭtentika formo. Verdire, tio estas ne mia inventaĵo, antaŭ mi kelkaj ja provis tion, sed tre sporade kaj malkonsekvence.

Se tiutempe mi pli bone scias pri la Esperanto-beletro, mi devus unue serĉi ETERNA-n BUKEDO-n, sed oni diras: "Aperas prudento, kiam pasis la momento".

La verko PARNASA GVIDLIBRO por mi tiutempe estis "iluzia" aŭ "fenomena" kaj "rarega". Unue, mia lando suferis grandan damaĝon pro la milito kaj precipe ĉefaj urboj, kie loĝis esperantistoj, estis bruligitaj de bombadoj kaj due, kiel oni scias, la reganta tendenco antaŭmilita de la japana Esperantujo estis kontraŭneologisma kaj precipe kontraŭ-Kalocsay-a, kaj lian verkon oni kondamnis kaŝite-malkaŝite hereza kaj nur malmultaj kaj konsciencaj literaturamantoj studis ĝin.

La verkon PARNASA GVIDLIBRO pruntedonis al mi amiko Nozima Yasutarô (tradukinto de KAPAO KAJ ALIAJ RAKONTOJ), tiam loĝanta en Nara, unu el la nebombitaj urboj. Tio okazis en la jaro 1952 aŭ 1953.

Tage-nokte mi komencis studi ĝin, notis ĉefajn partojn, per ĝi mi ŝtopis mian malsatan poezian stomakon tiel, ke fine la bindfadenoj ŝiriĝis, la dorso difektiĝis kaj la tuto disfalis. (Poste mi aŭdis, ke alia amiko Ueyama Masao siatempe trakopiis la tuton per krajono). Tiutempe en Japanio kaj eble ankaŭ alilande la tekniko estis malmatura kaj la nuna furora kopiarto ne ekzistis. Alia amiko aŭdis mian lukton, bonvolis foti la tutan volumon per sia kosto (povas esti ne el lia poŝo sed je kosto de lia kompanio) kaj donis ĝin al mi. Do la pruntita volumo reiris al Nozima post rebindo.

Mi devas konfesi: la enhavo de PARNASA GVIDLIBRO estis tro malfacila por mi, eĉ eble por aliaj azianoj mezedukitaj (rilate la poetikon). Mian cerbon nur konfuzis fremdaj terminoj: greka io, latina io, franca io, pola io... Nur sekaj terminoj svarmis en mia kapo kaj la tuto restis ekster mia kompreno krom kelkaj parkeritaj terminoj, tamen el ĝi mi akiris almenaŭ ian koncepton pri la principa prozodio: ĉe traduko oni devas estimi ne nur la enhavon sed ankaŭ la formon!

La japana parto ne tute kontentigis min per la elekto de la pecoj kaj aŭtoroj. La entenataj pecoj kaj poemoj foje estis tro vulgaraj, foje bagatelaj, se mi diras ŝvelige. Ekzemple la peco de Hitomara estas dubinda. Literaturistoj ne konsentas pri ĝia hitomara-eco kaj opinias ĝin verko de pliposteulo. Ankaŭ en la ĉina parto la aldonitaj pecoj estis ne de poetoj, sed de filozofoj aŭ maksimverkantoj: Kon-Fu-Ceo (Kong Qiu aŭ Konfuceo, laŭ PIV), Meng-Ce (Mengzi aŭ Meng Ke), Mo Ti (Mozi aŭ Mo Di) estas rigardataj ne kiel poetoj, sed prefere filozofoj. La ĉina poezio havas multege da eminentaj poetoj, kiel la japana. Oni povas kompari ilin kun la elekto de Saint Jules Zee en EL ĈINA POEZIO. Kompreneble mi scias, ke nia Kalocsay mortis survoje de sia laboro kaj la verko mem estas nekompleta, sed la unua vojo - difinas la celon.

Tamen la tradukoj el la japana parto kontentigas min per sia metodo kaj por mi estis sufiĉe, por ke mi sekvu lian metodon krom tio, ke rimado ĉe la dua kaj kvina versoj estas aplikeblaj nur al antikvaj uiaoj, sed laŭ mia opinio, pli taŭgas rimado ĉe la tria kaj kvina versoj ĉe pli modernaj verkoj. Sed mi portempe blinde sekvis lian metodon kaj ŝajne iomete sukcesis "fariĝi poeto". Kune kun Ueyama kaj kun aliaj mi fondis *Hajkistan Klubon.* La rezulton oni vidu, mi infane fanfaronas, en la nova eldono de ESPERANTO-ANTOLOGIO.

ETERNA BUKEDO kaj PARNASA GVIDLIBRO ja kovis la *Japanan Skolon* en ĝia plej malvasta senco aŭ *Miyamoto-skolon* laŭ ŝercnomo de U. Lins aŭ de W. Auld. Dank' al ambaŭ verkoj ni japanoj povis iel tiel proksimiĝi, se ne al Parnaso, almenaŭ al ia monteto kaj dank' al tio ni ĝuas "honoradon" aŭ riproĉon fare de konservativuloj kiel neologismuloj aŭ blindaj adeptoj de la *Budapeŝta Skolo.* Mi kredas tion honoro.

Lastatempe aperis nova propono en Japanio, ke oni devas traduki japaneskojn ne laŭsilabe sed laŭmorae. Ekz. Matuba Kikunobu verkis specialan artikolon por tio en LI KAJ NI. Sed - verdas nur la praktiko, grizas la babilado! Kiam niaj moraistoj montros al mi siajn verkojn, ne kiel specimenon, sed kvante kaj kvalite, mi povos demeti mian ĉapon antaŭ ili. Ĝis tiam mi estos blinda aŭ duonblinda "epigono" de nia granda majstro Kalocsay.

MIYAMOTO MASAO (1986)

5.11. MOZAIKOJ AL LA PORTRETO DE KALOCSAY

5.11.1 Malinklino al vojaĝo

Kalocsay - ĉefe en la lastaj jaroj de sia vivo - fartis plej bone en la laborĉambro. Se temis pri vojaĝo, li emfazis ke la medicina profesio ne ebligas liberan tempon por eksterlandaj ekskursoj. Ĉi tiu aserto nur parte estis vera. La vera motivo de lia malinklino estis, ke vojaĝoj tre lacigis kaj enuigis lin. Lia edzino rakontis, ke dum vojaĝo al UK (1932) Kolomano multe suferis pro elĉerpiĝo. Kiam li jam ne povis elteni la dormemon en la malkomforta (triaklasa) kupeo li kuŝiĝis sur la plankon por iom ripozi.

Ankaŭ la somerumado estis por li kvazaŭ puno, tamen la edzino persvadis Kolomanon. Dum la "somera ripozo" li fartis kiel ekzilito kaj atendis la tagon de hejmenveturo. Por li ĉio estis malkomforta: la lampoŝaltilo ĉe la lito ne troviĝis en la kutima loko, ege mankis la biblioteko, la skribmaŝino, entute la etoso de la hejmo. Malgraŭ ĉiu malinklino laŭ "ordono" de la familio li devis en ĉiu jaro pasigi kelkajn semajnojn en *Pünkösdfürdö* (antaŭurbo de Budapest), kie la suferon pliigis ankaŭ la kuloinvado.

Kalocsay neniam sportis kaj ne faris ekskursojn. Li ne estis turisto, respektive li estis "Parnasa litera-turisto", kies karikaturon tiel frape desegnis D. Wranka:

D-ro K. Kalocsay kiel kongresano en Bern: ĉi tiu kongreso grava por ni litera-turistoj. Nun ni almenaŭ povas grimpi sur montpintojn por serĉi novajn horizontojn kaj novajn perspektivojn.

(D. Wranka)

5.11.2 Kalocsay kaj la kapro

De mia kolego D-ro György Liszkai mi aŭdis la sekvan epizodon:

Kiel kuracisto ĉe la fervojo mi estis devigita dum certa tempo labori en hospitalo por akiri spertojn pri infektaj malsanoj.

En la *Hospitalo Szent László* mi renkontiĝis kun doktoro Kolomano Kalocsay, kiu tiam estis la ĉefo kaj bone konata laŭ lia universitata lernolibro por studentoj ankaŭ tiutempe uzata.

Laŭkutime la severa sed tre populara profesoro kun la ĉefflegistino matene vizitis la ĉambrojn de malsanuloj. La junaj kolegoj, inter ili ankaŭ mi akompanis la profesoron gajni la necesajn konojn. Disciplinite ni sekvis lin kaj poste regule ni pritraktis la spertojn.

Eĉ nun mi ne povas forgesi nian surprizon, kiam dum la vizito antaŭ iu ĉambropordo Kalocsay abrupte haltis kaj turniĝinte al ni demandis:

- *Ĉu hazarde el inter vi iu povus diri al mi: kiel oni nomas la kapron en rumana lingvo?*

Neimageble ni surpriziĝis. (Poste ni konfesis unu al la alia, ke Kalocsay pormomente freneziĝis!). Kiam ni ĉiuj neis al li, la profesoro mallaŭte rimarkis:"Faras ja nenion", kaj ni daŭrigis la viziton.

Poste mi eksciis, ke Kalocsay krom sia severa faklaboro kaj grava posteno multe okupiĝas pri Esperanto kaj li estas ankaŭ poeto, lingvisto, eseisto mondkonata. Nur surbaze de la informoj ankaŭ pri lia vasta traduklaboro mi komprenis, ke lia cerbo iom daŭrigante la tradukarton, dum kelkaj minutoj pro iu kaŭzo (aŭ pro taŭga rimo, ritmo ktp.) serĉis la menciitan rumanan vorton.

Post minutoj denove li estiĝis serioza ĉefkuracisto kaj neniu povis rimarki, ke en siaj kvazaŭ subkonsciaj pensoj lia cerbo povas vagadi dum sekundoj ankaŭ sur tiuj foraj terenoj.

D-ro István BÁCSKAI (1992)

5.11. 3. Odoroj

Ferenc Szilágyi skribis ie, ke en la redaktoraj kunvenoj de *Literatura Mondo*, Kalocsay kiel gastiganto regalis la ĉeestantojn ĉiam per ruĝa vino kaj fromaĝo. La vino bongustis al ĉiuj, sed la fromaĝon ĝuis nur gastronomoj, ĉar ĝi estis la plej pikanta kaj la plej malbonodora speco.

Poste Kalocsay rakontis al la "sabataj gastoj", kiel li regalis la redaktoraron per la stinka fromaĝo:

- Mian nazon ege iritis la naŭzige dolĉa parfumo de Baghy. Li estis ĉiam abunde aspergita per "rusa otkolonjo". Nu - li diris kun malica rideto - tiun odoron mi volis subpremi kaj mi tiel zorgis pri "aerekvilibro".

5.11.4 La distriĝema Kalocsay.

Kiel ofte la scienculoj ankaŭKalocsay estis tre distriĝema kaj ankoraŭ pri la vivanta Kalocsay cirkuladis ĉi-rilataj anekdotoj. Jen bukedeto el ili:

Medaloj

Pro la ŝatata hundo de Kalocsay preskaŭ trafis malagrablaĵo la familion. Je la 1-a de majo oni kutime invitis eminentulojn sur la festan podion de la parado. Foje ankaŭ Kalocsay ricevis invitilon kun la rimarko: "Bonvolu surmeti viajn medalojn." Do Kalocsay ornamis sian jakon per tiuj. Ĉe la antaŭĉambra adiaŭo la edzino kontrolis la vestaĵon de Kálmán kaj ŝi konsterniĝis vidante, ke li surpinglis ankaŭ medalojn de Lurkó, kiujn la belega dobermano gajnis en konkursoj.

Kalocsay ne estis pedanta homo. Li gardis diversajn insignojn, malnovajn monerojn, medalojn en la sama skatolo. Dank' al la zorgema edzino la distriĝemo ne kaŭzis skandalon.

La malpara ŝuo

Foje la kolegoj atentigis la ĉefkuraciston Kalocsay, ke liaj ŝuoj kolore estas samaj, sed la fasonoj estas malsamaj.

Kion fari? Por eviti pluajn atentigojn kaj malicajn ridetojn, la edzino portis la konvenan piedveston en la hospitalon.

Miskompreno

Foje la kuraciston Kalocsay oni venigis al malsana knabeto. Li esploris la infanon kaj faris diagnozon: simpla tonsilito. Li preskribis medikamenton kaj demandis la maltrankvilan patrinon:

- *Kion vi donas al li manĝi?*
- *Griokaĉon* - respondis la patrino.
- *Kompatindulo* - rimarkis Kalocsay -, *donu al li oston!*

La miskomprenon kaŭzis, ke la atenton de la kuracisto altiris belega virhundo kuŝanta apud la lito de la paciento.

x

Ĉu alveno, ĉu foriro?

(Laŭ rakonto de la hospitala pordisto)

Ofte okazis, ke la profesoro Kalocsay - ĉefe se li laboris super iu verko - bedaŭris perdi la tempon por hejmenveturado kaj li dormis en sia hospitala ĉambro. Do li multe restadis en la laborloko ankaŭ ekster la deĵora tempo. Ĉi tiu senregula irado-venado foje konfuzis d-ron Kalocsay. Nome okazis, ke ĉe la fenestropordo mi transdonis al li dikan pakaĵon alvenintan el presejo. D-ro Kalocsay tuj elvolvis ĝin kaj dronis en legadon.

Fine post longa tempo li elmergiĝis kaj hezite demandis min:

- *Diru, ĉu mi estas nun alveninta aŭ foriranta?*

Mi petas krajonon!

En la tridekaj jaroj en presejo en la urbo Vác, kie mi laboris kiel juna presisto, oni presis ankaŭ esperantaĵojn. Mi kompostis la revuon *Literatura Mondo.*

Por la enpaĝigo de la revuo Kalocsay en ĉiu monato vizitis nin. Okulfrapa estis lia distriteco. Alveninte en la presejon li tuj deprenis sian surtuton, jakon kaj surprenis medicinan mantelon, kiun li neniam butonumis bonorde. Kaj kiam li forlasis la presejon, ne unufoje ni devis lin atentigi, ĉar li metis la ĉapelon returnite.

Kalocsay tralegis la freŝan presprovaĵon ĉiam kun granda zorgo. Kiam li trovis ian malkorektaĵon, tuj li ekkriis:

- *Mi petas krajonon!*

Ĉiam mi donis al li skribilon, kiun mi neniam rericevis, kvankam mi vidis, ke en lia poŝo troviĝas eĉ ne unu el ĉi tiuj iloj. Unufoje mi kuraĝis repeti mian krajonon. Kalocsay pormomente mire rigardis min, poste li elprenis el la supra poŝo de la mantelo plenmanon da skribiloj kaj etendante ilin al mi iom honteme diris:

- Nu elektu, kiu estas la via...

Julio Bénik (1978)

5.12 LA FESTITA KALOCSAY

La Esperanto-mondo de jaro al jaro rememoris pri la naskiĝtago de Kalocsay. La grupoj aranĝis festajn kunvenojn, la revuoj salutis lin per poemoj, artikoloj, la amikoj perletere aŭ persone gratulis la „vivantan klasikulon" de la Esperanta kulturo.

AL KÁLMAN KALOCSAY

Kial plendas vi, Kolomano,
Pri alveno de la oldec'?
Kun premanta pokalon mano,
Vian sanon mi tuj, laŭ dec',
Tostu kune kun la junuloj,
Vere indaj ja de envi',
Tamen ili sin sentas nuloj
Antaŭ vera genio - vi...

Do ne plendu, mirinda bardo,
Nova jaro vin benas nun,
Ĝi atestas: en versa ardo
Eterniĝis jam via jun'.

Baldaŭ via ĉefurbo suna
Ree tostos pro via san',
Tiam estos vi la plej juna,
Plej ravanta nin kongresan'.

Volus mia poemkareso
Bari vin de ĉagren', kaj jen
Plene jam antaŭ la Kongreso
Lasos vin la minuta splen'.

Via freŝo kaj via verdo
Flustru per la printempa vers,
Primaveru al ni en ver' do
La junecon de Univers'!

K. Gusev

Moskvo, 28.12.64.

Trikvarono de jarcento
Reprezentantoj de Hungara Esperanto-Asocio
De live: J. Baghy, K. Kalocsay, s-rino Kalocsay,
L. Tárkony, B. Szerémi, L. Kökény,
I. Bácskai.

Dum gaja babilado
De live: L. Kökény, J. Baghy,
I. Bácskai, K. Kalocsay
(1966)

Je via sano (1966)

Kun amikoj
K. Kalocsay, L. Tárkony, J. Baghy
(1966)

La „ORA DUOPO"

Sur la titolpaĝo de
Norda Prismo 1966, n-ro 1

Sur la titolpaĝo de
Hungara Vivo 1967, n-ro 1



5.12.1 LA KREMO DE KALOCSAY

Malgranda albumo el liaj verkoj originalaj kaj tradukoj (25) okaze de 80a datreveno de lia naskiĝtago.

Bristola Esperanto-Societo, 1971
22x14 cm, 56 p. broŝ.

La albumo per kio la *Bristola Esperanto-Societo* omaĝis al Kalocsay enhavas 68 poemojn el liaj verkoj. La 29 originalaĵoj estas elektitaj el STREĈITA KORDO, RIMPORTRETOJ, IZOLO kaj *Literatura Mondo*. La 39 tradukojn oni ĉerpis el ETERNA BUKEDO, HUNGARA ANTOLOGIO, KANTOJ KAJ ROMANCOJ de Heine, el la poemaro de LA FLOROJ DE L' MALBONO de Baudelaire kaj el Shakespeare-verkoj: REĜO LEAR, LA TEMPESTO SOMERMEZNOKTA SONĜO.

5.12.1.0 *Bibliografio*

De Smedt, P.: *La kremo kaj la lakto*
HdE 1971/18, (1517), p. 4.
Rossetti, R.: *Rimarkoj* al la rec. de P. De Smedt.
HdE 1972/1, (1518), p. 3.
Balbin, J.: *La poeto de la poetoj*
Esperanto 1972/26.
Auld, W.: *La kremo...*
TBE 1972, jan. (778), p. 162.

(25) Listigitaj en la ĉapitroj: 7. 11; 8.2; 820

Ĉe la festa tablo
Kun la edzino (1971)



Li estas 80-jara

5.12.2 *Paseo, nuntempo, futuro* (Li fariĝis 84-jara)

Okaze de la naskiĝtago de Kalocsay amikoj kaj kelkaj invititoj vizitis ĉe li la la 4an de oktobro 1975. M. Gergely, tiama ĉefredaktoro de *Hungara Vivo* faris intervjuon kun la festito. La hungarlingvan konversacion sonbendigis L. Kapitány.

La ĉefa temo estis la fama *Literatura Mondo*. Kalocsay rememoris pri la naskiĝo de la revuo. Li rakontis sen nostalgio – eĉ iom ironie – pri la tiamaj stumbloj, fiaskoj kaj la tre magraj rezultoj.

Afable li respondis la demandojn de la pli juna generacio, kiujn tute ravis la senpera, familieca parolmaniero de Kalocsay, lia neĉiutaga memorkapablo, lia interesiĝo pri la nuntempo. Li montris freŝajn tradukojn dediĉitajn al TUTMONDA SONORO, parolis pri la baldaŭ aperonta DOMFABRIKO.

Kaj ĉu la futuro?

– *Jes, mi havas planojn* – li diris –, *en la sekva jaro ni devas daŭrigi komencitajn laborojn: redakton de legolibro por ekzamen-kandidatoj (26), daŭrigi kunmeton de mia bibliografio, ktp., ktp.*

En la kapo de Kalocsay estis prilaboritaj planoj, sufiĉaj elmenaŭ por kvin jaroj.

Kalocsay kun aktora lerteco kvazaŭ revivigis kelkajn eminentulojn kaj aliajn, iom strangajn figurojn de la Esperanta movado

L. Tárkony tre ĝuas la prezentadon.

Foto: Z. Fejér (1975)

(26) La komencita legolibro – sub titolo NE TIMU DE EKZAMENO – (komuna laboro kun A. Csiszár) pro la baldaŭa forpaso de Kalocsay ne realiĝis.

András Sugár, redaktoro de la *Hungara Televizio* konversacias kun Kalocsay

Malantaŭ la dorso de Kalocsay
De maldekstre: L. Kapitány, L. Kökény, M. Gergely,
L. Tárkony, A. Csiszár, s-rino Kalocsay,
geedzoj Sugár, s-ino Kökény.

La ĉeestantoj gaje pasigis la tempon. La dinamika forto kiun li elradiis ravis nin ĉiujn. Neniu el ni konjektis lian baldaŭan foriron.

5.12.3. NASKIĜTAGAJ SALUTOJ KAJ DATREVENAJ REMEMOROJ

ROSSETTI, R.:
Kalocsay sesdek-jara
ESk 1951, n-ro 16, p. 1.

STURMER, K.R.C.:
Publika letero al K.Kalocsay
ESk 1951, n-ro 16, p. 4.

FOOTE, A.:
Omaĝe al Kolomano Kalocsay
ESk 1951, n-ro 16, p. 4.

S.K(AMARÝT):
Kolomano Kalocsay sesdek-jara
Esperantista (Praha) 1951.10.15.

DOLINSKY, J.V.:
D-ro Kolomano Kalocsay 60-jara
E-S 1951, n-ro 10, p. 137-138.

Nur kelkaj vortoj de la Redakcio
NLR 1961, n-ro 36, p.201.

PIĈ, K.:
Kolomano Kalocsay
NLR 1961, n-ro 36, p. 221-222.

F.S(ZILÁGYI):
Kalocsay 70-jara (Kun karikaturo de St. Barta)
NP, 1961, n-ro 4, p. 99-100.

BALKÁNYI, P.:
D-ro K. Kalocsay 70-jara
HE 1961, n-ro 10, p. 3-6.

IO IU (MORARIU, T.):
La Prometeo de l' Esperanto-Parnaso
LE 1961, n-ro 10, p. 92-93.

SZILÁGYI, F.:
Zigzage en iamujo II.
NLR 1961, n-ro 36, p. 211-215.

Kolomano Kalocsay
HFM 1961, n-ro 4, p. 52-53.

Ora Duopo
HdE 1961/1, (1315), p. 3.

VATRÉ, H.:
Kolomano Kalocsay kaj ni
NLR 1961, n-ro 36, p. 221-222.

SZATHMÁRI, S.:
Gratula letero al Kalocsay
HV 1962, n-ro 1, p. 16

A 75 éves világnyelv 71 éves költője (La 71-jara poeto de la 75-jara internacia lingvo)
Hétfői Hirek (Lundaj Informoj) 1962.05.28.

KÖKÉNY, L.:
Vivjubileo de nia Kalocsay
HE 1966, n-ro 10, p.1-2.

KÖKÉNY, L.:
La „Ora Duopo"
HE 1966, n-ro 2, p.25.

TÁRKONY, L.:
Kolomano Kalocsay (Kun titolpaĝa bildo pri Baghy kaj Kalocsay)
NP 1966, n-ro 3, p. 135-139.

SZATHMÁRI, S.:
Kalocsay – 75 jara (Kun portreto)
Paco, 1966, junio, (hung. eld.) p.10-11.

HAUPENTHAL, R.:
Senlaca titano de nia Parnaso – D-ro Kolomano Kalocsay 75-jara
GER 1966, n-ro 10, p. 97-98, 106; repr. en Horizonto 1976, n-ro 2, p. 25-28; Dialogo 1976, n-ro 4, p. 19-22; Eŭropa E-revuo 1976, n-ro 2, p. 4-6.

La poeto de la poetoj – 75-jara jubileo de K.Kalocsay
HdE 1966/14, (1423), p. 1.

Prof. D-ro. Kolomano Kalocsay 75-jara
Sonorilo 1966, n-ro 12, p. 62.

SZATHMÁRI, S.:
Trikvaronoj de jarcento
HV 1966, n-ro 3, p. 2-4.

D-RO GYŐRY-NAGY L.; SZERÉMI, B.; BOTOS, L; TÁRKONY, L.; KÖKÉNY, L.; MÁTÉFFY, J.:
Mozaikoj pri K. Kalocsay
HV 1966, n-ro 3, p. 4-6.

D-RO MÁTÉFFY, J.:
Naskiĝtaga primemoro
HE 1971, n-ro 10, p. 1-3.

RUTKOWSKI, R.W.:
Kálmán Kalocsay
„Dziennik Wieczorny" 1971.10.14.

□ *Kalocsay jubileas!*
HdE 1971/14 (1513)

□ *Plej korajn gratulojn*
Internacia Fervojisto 1971, n-ro 6, p. 91.

T.M(ORARIU):
Kolosa Kolono Kolomano Kalocsay okdek-jara en Oktobro
LE 1971, n-ro 5, p. 80-81.

LAPENNA, I.:
Al Kálmán Kalocsay (Kun titolpaĝa portreto)
HV 1971, n-ro 3, p. 1.

AULD, W.:
K. Kalocsay
HV 1971, n-ro 3, p. 2.

TÁRKONY, L.:
Intervjuo kun K.Kalocsay – okaza de lia 80-a naskiĝjaro
HV 1971, n-ro 3, p. 4-5.

RÉGULO-PÉREZ, J.:
Saluton al K.Kalocsay 80-jara
HV 1971, n-ro 3, p. 3.

D-RO BECKMANN, K. KAJ VOKAL, E.:
D-ro Kolomano Kalocsay
(Elsendo de la Radio Vieno 1971.11.24.)

D-RO BÁCSKAI, I.:
Alta honorigo al la plej granda vivanta literatoro Esperanta – okaze de lia 80-a neskiĝtag
HFM 1971, n-ro 4, p. 58-59.

CSISZÁR, A.:
Paseo – nuntempo – futuro – Kalocsay fariĝis 84-jara (Kun fotoj)
HV 1976, n-ro 1, p. 13.

BENCZIK, V. KAJ GYŐRI-NAGY, L.:
Kálmán Kalocsay naskiĝis antaŭ 85 jaroj
BI 1976, n-ro 10, p. 1-4.

NUEZ, F.:
Kolomano Kalocsay
Boletin 1977, majo-junio (221), p. 14.

MSS:
Omaĝe al „Ora Duopo"
E-S 1981, n-ro 3, p. 17-18.

Antaŭ 90 jaroj naskiĝis du granduloj (Kun fotoj)
HdE 1981/14, (1689), p. 1.

CSISZÁR, A.:
90 éve született Kalocsay Kálmán (Antaŭ 90 jaroj naskiĝis K.K.)
VNY 1981, n-ro 5, p. 6-7.

CSISZÁR, A.:
El Abaújszántó ĝis la Esperanta Parnaso – okaze de la 90a naskiĝ-datreveno de Kalocsay
BI, 1981, n-ro 10, p. 1-3.

Jubileaj datrevenoj en 1981 – D-ro Kálmán Kalocsay
HFM 1981, n-ro 1, p. 15.

KŶR, K.:
Kolomano Kalocsay – okaze de la 90a naskiĝ-datreveno
„Casopis lékáru ceskych" 1981, n-ro 39.

BENCZIK, V.:
Li estus 90-jara
HV 1981, n-ro 3, p. 173.

CSISZÁR, A.:
Duobla datreveno de D-ro Kálmán Kalocsay
HFM 1986, n-ro 2, p. 17-18.

CSISZÁR, A.:
Triobla datreveno de D-ro Kálmán Kalocsay
HFM 1991, n-ro 509, p. 4-8.

SALGA, A.:
Baghy Gyula és Kalocsay kálmán, költők, írástudók centenáriuma (Centjara jubileo de poetoj kaj verkistoj J.B. kaj K.K.)
Hajdú Bihari Napló (Departementa gazeto) 1991.08.26.; repr. en Hírharsona (Novaĵ-Trumpeto) 1991, n-ro 5, p. 2.

CSISZÁR, A.:
„Centjara estus jam la koro"
Elsendo de Hungara Radio 1991.07.07.

CSISZÁR, A.:
Centjara jubileo de Kalocsay
HI 1991, n-ro 10, p. 115-116.

CSISZÁR, A.:
Mozaikoj pri la personeco de la „centjara" Kalocsay
HFM 1991, n-ro 3, p. 35-37.

CSISZÁR, A.:
„Centjara estus jam la koro" (Laŭ la prelego en la 10a ILF)
LF 1991, n-ro 133, p. 11-16.
VERLOREN van THEMAAT, W.:
Kalocsay kaj Baghy
Fenomeno 1991, septembro

CSISZÁR, A.:
La multflankeco kaj laborkapablo de la „centjara" Kalocsay
Forumo 1991, n-ro 3, p. 66-70.

MOLNÁR L.:
100 éve született dr Kalocsay Kálmán (Antaŭ 100 jaroj naskiĝis d-ro K.K.)
Sárospatak (Loka gazeto) 1991, oktobro, p. 6.

CSISZÁR A.:
Orvos és Írástudó (Medicinisto kaj literatoro)
Magyarország (Hungario) 1991.10.04.

BALOGH, K.:
Emlékezés Kalocsay Kálmánra (Rememoro al Kálmán Klalocsay)
Hírharsona (Novaĵ-Trumpeto) 1991, n-ro 6, p. 4-5.

CSISZÁR, A.:
El Abaújszántó ĝis la Esperanta Parnaso
Fonto 1991, n-ro 130, p. 3-9.; repr. en Kataluna Esperantisto 1993, n-roj 286-287.

MAJOR, J.:
D-ro Kolomano Kalocsay (1891-1976)
NZE 1991, n-ro 511, p. 1-3.

CSISZÁR, A.:
Klasikulo de la Esperanta kulturo – d-ro Kálmán Kalocsay (1891-1976)
Penseo 1992, n-ro 24, p. 1-2.

MOLNÁR, L.:
Emlékezés Kalocsay Kálmán orvos, költő műfordítóra születésének 104. évfordulóján
(Rememoro pri la medicinisto, poeto, tradukartisto K.K., okaze de lia 104-a naskiĝ-datreveno)
Észak-magyarország (Nord-Hungario) 1995.10.10.

BATTA, B.:
Kalocsay Kálmánról, születésének 105. évfordulóján (Pri Kálmán Kalocsay – okaze de lia 105-a naskiĝ-datreveno)
Észak-magyarország (Nord-Hungario) 1996.09.14.

5.12.4. POETOJ OMAĜAS AL KALOCSAY

ADAMSON, H.
Du portretoj en la kurba spegulo
AD p. 179.

ANDRIANOVA, N.
Eterne brilu lia stelo!
BI 1981:10, p. 4.

APPLEBAUM, J.D.
Al la 70-a naskiĝtago de Kalocsay
TBE 1962:678, p. 237.

AULD, W.
Al la granda masonisto
EA/1, P. 425; en: W. Auld: UNUFINGRAJ MELODIOJ. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1960. 126 p. (p. 65)

Soneto (Verketi, jes, eĉ multaj tion faris...)
ESk 1951:16, p. 2; en: KVAROPO. Poemaro. W. Auld, J. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti. La Laguna: J. Régulo, 1952, 267 p. (p. 249)

La mondo kaj la koro de K. Kalocsay
NLR 1961:36, p. 210; en: W. Auld: HUMOROJ. Poemaro. La Laguna: J. Régulo. 1969. 113 p. (p.90-91)

La torĉportinto
Esperanto 1976/46; en: W. Auld: EL UNU VERDA VIVO. Poemoj. 44 p. (p. 28-30)

BAGHY, J.
Al unu el la poetofratoj
En: J. Baghy: LA VAGABONDO KANTAS. Poemoj. Budapest: Geamikoj de la aŭtoro. 1933. 59 p. (p. 29-30); en: VERSOJN ONI NE AĈETAS. Postlasitaj poemoj de K Kalocsay. Vieno: Pro Esperanto, 1992, 64 p. (p. 51-52)

Letero al Kolomano Kalocsay Okaze de lia 70-jariĝo.
NP 1961:5-6: p. 139-140; HFM 1961:4,, p. 52-53; 1971 .5, p.58-59; 1990:4, p.51-52.

BALBIN, J.
Estas neeble (27)
En manuskripto.

BAUPIERRE, H. *(ps. de* **H. VATRÉ***)*
Kolomano Kalocsay—Balado, kiun la Poeto dediĉas al la Eterna Nutranta Mamo. En: H. Baupierre: SPECIMENE. Parodioj kaj pastiĉoj. La Laguna: J. Régulo. 1962, 132 p. (p. 28-29).

Sokrataj Sonetoj. Pastiĉo.
En: SPECIMENE p. 40-41; en: H. Vatré: DISAJ GUTOJ. Poemoj. Saarbrücken: A.E. Iltis. 1989. 83 p. (. 75-76)

BELMONT, L. (ps. de **L. BLUMENTHAL**)
Peceto de Piramido – Al Kolomano Kalocsay de Leo Belmont
AD. p. 158.

BOULTON, M.
Saluton al Kolomano Kalocsay – kiun mi neniam renkontis, sed al kiu mi ĉiam estos dankema
En: M. Boulton: KONTRALTE. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1955. 286 p. (p. 267).

La naskiĝo de geniulo
En: M. Boulton: EROJ. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1959. 367 p. (p. 237-239).

Kolomano Kalocsay
En: EROJ. p. 331-332.

DE KOCK, E.
Al Kálmán Kalocsay
NP 1970:1, p. 27; BI 1976:10, p. 2.

DEŜKIN, G.
Al du jubileuloj – Soneto
AD p.177.

DINWOODIE, J.S.
La kantforĝisto
ESk 1951:16, p.2; en KVAROPO* p. 250; SKIZO p.30.

DRESEN, H.
Al K. Kalocsay
AD p. 120; en: H. Dresen: NORDA NATURO. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1967, 143 p. (p. 130).

DUNN, F.
Tri japaneskoj pri K.K.
The Australian Esperantist 1978: Okt.-Nov. p. 188-189.

EMBA *(ps. de* **I. BARANYAI***)*
Al Kolomano Kalocsay
AD p. 178.

FALKONBRIĜ, G.
Poeto – Al Kolomano Kalocsay
AD p. 82; en: NAŬ POETOJ. Poemlibro. Red. K. Kalocsay en 1938. Pro la bankroto de LM kaj la militaj jaroj ĝi ne atingis la legantojn. Eld. Saarbrücken: A.E. Iltis, 1989. 74 p. (p.25).

FRANCIS, J.
Kalocsay—Soneto
ESk 1951:16, p. 2; en: KVAROPO* p.251; EA/1, p.440; EA/2, p. 430.

GIORGI de' A.
Rondeltribute
HdE 1977:15, (1622), p. 3. en: A. de' Giorgi: PRETERTEMPE, Versaĵoj. Pisa, 1982, 63 p. (p. 54)

GRAU-CASAS, J.
Al K. Kalocsay
AD p. 162; EA/1, p. 191; EA/2, p. 186.

GRIGOROV, A.
Forpasis Kalocsay
Paco 1976:4, p.5; en A. Grigorov: GARDU LA PACON! Poemoj. Budapest, 1980. 118 p. (p. 45); en: EPVT p. 108.

GUOZHU
Centjara Duopo—laŭĉinesko
Penseo 1991:11, p. 8.

GUSEV, K.
Al Kálmán Kalocsay
Ĉi-libre p. 89.

HOHLOV, N.
K. Kalocsay
En: N. Hohlov: LA TAJDO. Poemoj. Horrem bei Köln: Heroldo de Esperanto. 1928. 61 p. (p. 12-13); EA/1 p. 202-205; EA/2 p. 196-197; BI 1976:10, p. 2.

JEVSEJEVA, L.
Al K. Kalocsay
AD. p. 83.
Al Kolomano Kalocsay (Kun E. Lippe)
NP 1961:4, p.105; HdE 1961:12, (1326), p. 3.

In memoriam
HdE 1976:6, (1595), p. 1.; HV 1976:3, p. 27.

ĴIKEL, K.
Al K. Kalocsay—Dek-tria gasto
AD p. 178.

KOŘINEK, J.
Sanu longe Kolomano
ESk 1951:16, p.3.

Al poeto – Al sepdekjariĝo de Doktoro Kolomano Kalocsay
NLR 1961:36, p. 216.

Krevis la kordo
HV 1976:3, p. 27.

LAULUM (ps. de **LI Shijun**)
Rimletero al k-do Shi Chengtai. Omaĝe al la ĝemelstela paro okaze de ilia centjariĝa jubileo 1891-1991.
Penseo 1991:11, p.1.

LEJZEROWICZ, I.
Ĉapitro XIII-XIV. *Kalsurmano Galoŝej*
En: I. Lejzerowicz: EL LA „VERDA BIBLIO". Budapest: Literatura Mondo, 1935. 104 p. (p. 50-54).

LIPPE, E.
Al Kolomano Kalocsay (Kun L. Jevsejeva)
NP 1961:4, p. 105; HdE 1961:12, (1326), p.3.

LOGVIN, A.
La konsolo
Paco 1965:140-141, p. 11.

Al Parnas' – Letero al la jubileanta Julio Baghy kaj iom ankaŭ al la jubileonta K. Kalocsay
NP 1966:1, p.9; Paco 1966:151, p.9.

Rekomendo al Esperanto poetoj
IĴ 1972:1, p. 5.

Al karaj kaj estimataj Csiszár Ada – Kalocsay Kálmán (Poemdediĉo)
En manuskripto.

Rekviemo
HdE 1977:15, (1622), p. 3; HFM 1976:1, p.1; derE 1976:4, p. 9.

MAD MEVO (ps. de Madelain STAKIAN-VUILLE)
Al Kalocsay
AD p. 172.

MAURA, G.E. (ps. de G. WARINGHIEN)
En la poemo: E.pistoloj al la Niceano
En: G.E. Maura: DUONVOĈE. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1963. 175 p. (p. 89-91).

Al unu poeto
NLR 1961:36, p.236; en: DUONVOĈE p. 114.

MIJAKE ŝiĥej
Fragmente pri Baghy kaj Kalocsay
AD p. 136-141.

MIYAMOTO masao
Pri la „Lag' forlasita"
NLR 1961:37, p.15.

NERVI, M.
Al Kalocsay (28)
HV 1979:2, p. 55; EA/2 p. 813-814.

NORDENSTORM, L.
Respondo (Al Kalocsay pri la granda manko de lia libro) (29) Kataluna Esperantisto 1984: Decembro, (240) ; BI 1986:2, p. 9.

NÚÑEZ-DUBÚS, A.
Kalocsay
AD p. 69.

PIPER, F.
Vivu Julio Baghy! Vivu Kolomano Kalocsay!
AD p. 88.

PRUMP, T.
Super la Infero de Dante – Al la Esperanta tradukisto
ESk 1951:16, p.3.

PUNT, J.Ph.
Non moritur, cujus fama vivit
En manuskripto.

ROSSETTI, R
Jubileaj versoj
AD p. 162-163.

Soneto (La ŝtonojn ...) (30)
Esperanto 1950/143; en: KVAROPO* p. 246; EA/1, p.450-451; EA/2, p. 440-441.

Jen, kara, via festo
ESk 1951:16, p. 4; en: KVAROPO* p.252.

Kopar
En KVAROPO* p.241.

Monto kaj arbusto
En KVAROPO* p. 244-245; EA/1 p. 449-450; EA/2 p.439-440.

Argumento
En KVAROPO* p.242-243.
Du rondeloj al K.K. dum la tempo de lia silentado
En R. Rossetti: PINTA KRAJONO. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1959. 128 p. (p. 23-24).

Al K. Kalocsay – okaze de lia reapero
NLR 1956:4, p. 121; en: PINTA KRAJONO p. 25.

Je la morto de kara amiko
HdE 1977:15, (1622), p. 3.

SHI CHENGTAI
Sur la postkovrila paĝo de "Ora Duopo"
Penseo 1991:11, p. 6.

La Ĝemelstela Paro brilas
Penseo 1991:12, frontpaĝe

STRÜMPFEL, M.
Pri Kolomano Kalocsay
AD p. 101.

SZATHMÁRI, S.
Gratula letero al Kalocsay
Paco 1967 (hung. eld.) p. 22.

SZILÁGYI, F.
Invito
Prolog-poemo en:K. Kalocsay: RIMPORTRETOJ. Galerio de E-steloj. Rondelformaj poemoj. Budapest: Literatura Mondo, 1931. 128 p.

K. de Kalocsay
AD. p. 190; ESk 1951:16, p. 5.

SU, A.
Soneto
NAER 1963: Nov.-Dec. p. 194.

SUCHARDOVA, E.
Tatjana skribas al Kalocsay, memore pri la traduko de „*Letero de Tatjana al Onegin*" ESk 1951:16, p. 3.

SWIETOSZEWSKI, R.
Soneto pri Kolomano Kalocsay – por memorlibro
AD p. 173.

TOTSCHE/TÁRKONY, L.
La lumgardanto
LM 1931/207; en: DEKDU POETOJ. Poemlibro. Red. K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo, 1934. 126 p. (p. 114-115); EA/1 p. 222-224; EA/2 p. 248-249.

LIX (Kalocsay, unika Nom')
En: RIMPORTRETOJ**; BI 1976:4, p. 3.

Kalocsay (Ero de *Verda Helikono)*
HV 1963:4, p. 9; en: L. Tárkony: SOIFO. Poemaro. La Laguna: J. Régulo, 1964. 231 p. (p. 153).

Kalocsay (Soneto)
HV 1971:3, p. 4.

VATRÉ, H.
Mia poeto
AD, p. 115; en: H. Vatré: DISAJ GUTOJ *** p. 53.

VATRÉ-BAUDIN, J.
Al K.Kalocsay
AD p. 101.

VERMUYTEN, H.
Baghy – Kalocsay
AD p. 124.

Herooj – Kalocsay-Baghy
AD p. 125.

WARINGHIEN, G. (ps. : **MAURA, G.E.**)
LX (Kalocsay – mondvoĉa bardo)
En: RIMPORTRETOJ**; GER 1966: titolpaĝe; BI 1976:4, p. 3.

Sur ŝtuparo...
